



La Gastejo

de la

Gardanêlo.

Verko el la publika fako.

<https://fr.wikisource.org/L'Auberge de l'Ange Gardien>

Enhava tabelo.

Dediĉletero kaj Rolantaro.....	3
01 Sub la ŝirmo de Dio.....	5
02 La Gardanĝelo.....	12
03 Informoj.....	18
04 Netaviŝtuko.....	25
05 Disiĝo.....	33
06 Surprizo kaj feliĉo.....	42
07 Iu amiko savita.....	50
08 Netaviŝtuko lokita.....	60
09 La generalo aranĝas la aferojn de Mutie.....	66
10 Kiam estos la geedziĝo ?.....	73
11 Kverelo por amuzo.....	79
12 La doto kaj la horloĝoj.....	84
13 La Enketjuĝisto.....	91
14 Aliaj strangaj pensoj de la Generalo.....	98
15 La Foriro.....	104
16 Netaviŝtuko senvualiĝas.....	109
17 Unua etapo de la generalo.....	114
18 La Kuracbanejoj.....	122
19 Teatrofrapo.....	128
20 Unua patra maltrankvilo.....	135
21 Netaviŝtuko senvualigita.....	140
22 Kolero kaj pento de la generalo.....	145
23 Plena riparo.....	152
24 Misteroj.....	158
25 La kontrakto.....	162
26 Neatendita malavaraĵo.....	166
27 La geedziĝfestoj.....	176
28 Geedziĝo sen geedziĝofesto.....	185
29 Konkludo, sed sen fino.....	192

Dediĉletero kaj Rolantaro

Al miaj nepoj,
Ludoviko kaj Gastono MALARET.

Karaj infanoj, vi estas bonaj fraĉĵoj, kaj mi ja certas ke se vi troviĝus en la bedaŭrinda situacio de Jakobo kaj Paŭlo, vi, mia kara Ludoviko, vi farus kiel la bonegan Jakĉjo; kaj vi, mia afabla Gastono, vi amus vian fraton kiel Paŭlo amis la sian. Sed mi esperas ke la bona Dio faros al vi la gracon neniam sperti tiajn travivaĵojn, kaj ke la legado de tiu ĉi libro neniam vekos en vi suferigajn memorojn.

La grafino de Segur, naskiĝinta Rostopĉina.

BLD : Unue, gastejestrino de la Gardanĝelo. Poste, S^{ino}
Blidot, dudeksesjara vidvino, sen infano kaj fratino de
ELF.

BRN : Unue, gastejestro de la unua gastejo. Poste, S^{ro}
Burniero kiu estas malbona marĝenulo.

Ĉelito :

ĈFS : La ĉefservisto de la granda hotelo de la kuracejo.

Farmistino : Tiu kiu vendas lakton ĉe la elirejo de la vilaĝo.

GNR : La grafo Durakino, rusa generalo malliberigita de

MUT.

JAK : Unue, nekonata infano dormanta kun sia frato. Poste, Jakobo, la plejaĝa frato de Paŭlo.

JUĜ : La enketjuĝisto nomita en la afero BRN.

Kapitano : La hundo de MUT.

MUT : Unue, nekonata viro vojaĝanta kun sia hundo. Poste, Jozefo Mutie, soldato kiu trovis kaj helpis Jakobo kaj Paŭlo.

NTV : Unue, knabeto kuntrenanta karbosakon en la vilaĝo. Poste, Netaviŝtuko, juna orfo kiu labaras ĉe la gastejo de Burniero, baptita Petroⁿ de la PRP.

Oficisto de la urbodomo komisiita por gardadi la gastejo de BRN.

PAN : La panisto de la vilaĝo tutapude de la Gardanĝelo.

Parabero : Iu jezuita patro kiu militis kun MUT.

PAŬ : Paŭlo, la malplejaĝa frato de Jakobo.

PRP : La preposto kiu loĝas fronte al la Gardanĝelo.

SLD : Unue, nekonata soldato sole manĝanta ĉe Gardanĝelo. Poste, Jakobo Derigni, dungita ĉe la servado de GNR.

VJĜ : Iu vojaĝanto renkontita en la gastejo.

VND : La viandisto de la vilaĝo tutapude de la Gardanĝelo.

01 Sub la ŝirmo de Dio.

Estis malvarme, estis malhele; pluvo falis gutete kaj dense; du infanoj dormis borde de ĉefvojo sub maljuna foliriĉa kverko : trijara knabeto kuŝis sur amaso da folioj; alia sesjara knabeto, kuŝanta ĉe liaj piedoj, revarmigis ilin al li per sia korpo. La etulo surhavis vestaĵojn el lano, ordinarajn sed varmajn; liaj ŝultroj kaj lia brusto estis kovritaj de la jako de la sesjara knabo kiu dormante frostotremis. De tempo al tempo ekstremo skuis sian korpon. Li surhavis kiel nuran veston, ĉemizon kaj pantalonon duone eluzitajn. Lia vizaĝo esprimis suferon, larmoj duone sekigitaj ankoraŭ vidiĝis sur siaj malgrandaj malgrasigitaj vangoj. Kaj tamen li dormis per profunda dormo; lia malgranda mano tenis medalon pendantan ĉe lia kolo per nigra ŝnuro. La alia mano tenis tiun de la plej juna infano. Li verŝajne endormiĝis revarmigante ĝin al li. La du infanoj similis unu la alian, ili devis esti fratoj. Sed la juna havis la lipojn ridetantajn, la vangojn karnodikajn; li certe suferis nek pro malvarmo nek pro malsato kiel sia pliĝa frato.

La kompatindaj infanoj ankoraŭ dormis kiam, ĉe tagiĝo, viro survoje pasis, akompanita de bela hundo, el la specio de hundoj de monto San-Bernardo.

La viro havis la tutan aspekton de soldato. Li paŝis fajfante, rigardante nek dekstren nek maldekstren; la hundo sekvis paŝon post paŝo. Proksimiĝante al la infanoj kiuj dormis sub la kverko, sur la rando de la vojo, la hundo suprenlevis la nazon, streĉis la orelojn, forlasis sian mastron kaj ekkuris al la arbo, sen boji. Ĝi rigardis la infanojn, flaris ilin, lekis al ili la manojn kaj eligis mallaŭtan ĝemon kvazaŭ por alvoki sian mastron sen vekti la dormantojn. La viro

haltis, turnis sin kaj alvokis sian hundon :

"Kapitano ! ĉi tien, Kapitano !"

Kapitano restis senmove, ĝi eligis duan ĝemon pli longdaŭra kaj pli laŭta.

La vojaĝanto, divenante ke necesis savi iun, proksimiĝis al sia hundo kaj surprizite vidis tiujn du senhelpajn infanojn. Ili senmoveco timigis lin ke ili estas mortaj. Sed, klinante sin al ili, li vidis ke ili spiris. Li tuŝis la manojn kaj la vangojn de la infaneto. Ili ne estis tre malvarmaj; tiuj de la pli aĝa estis tute malvarmegaj. Kelkaj gutoj de pluvo estis penetrintaj tra la foliaro de la arbo kaj falis sur liajn ŝultrojn nur kovritajn de lia ĉemizo.

"Kompatindaj infanoj ! diris la viro duonvoĉe; ili estas mortiĝontaj pro malvarmo kaj malsato, ĉar mi nenion vidas apud ili, nek pakaĵojn nek proviantojn. Kiel oni lasis kompatindajn etulojn tiom junajn, solajn, sur iu ĉefvojo ? Kion fari ? Lasi ilin ĉi tie, estas voli ilian morton. Kunkonduki ilin ? Estas granda vojo por iri kaj mi iras piede; ili ne kapablas sekvi min".

Dum la viro pripensis, la hundo malpacientiĝis : ĝi komencis boji; tiu bruo vekis la pliaĝan fraton; li malfermis la okulojn, rigardis la vojaĝanton kun mira kaj peteganta mieno, poste la hundon kiun li karesis, dirante al ĝi :

- Ho ! Silentu, silentu, mi petegas vin; ne bruu, ne veku la povran Paŭlo" kiu dormas, kaj kiu ne suferas. Mi bone kovris lin, vi vidas; li estas bone varma.

- Kaj vi, povra knabo mia, diris la viro, vi estas tre malvarma !

La INFano : Mi, ne gravas; mi estas pli aĝa, mi estas forta; sed li, li estas malgranda; li ploras kiam li malvarmas, kiam li malsatas.

La VIRO : Kial vi estas ambaŭ ĉi tie ?

INF : Ĉar Panjo estas morta kaj paĉjo estis kaptita de

la ĝendarmoj, kaj ni ne plu havas domon kaj ni estas tute solaj.

VIR : Kial la ĝendarmoj forkondukis vian paĉjon ?

INF : Mi ne scias; eble por doni al li panon; li ne plu havis tion.

VIR : Kiu nutras vin ?

INF : Tiuj kiuj bonvolas.

VIR : Ĉu oni sufiĉe donas al vi ?

INF : Kelkfoje, ne ĉiam; sed Paŭlo ĉiam havas sufiĉe.

VIR : Kaj vi, vi do ne manĝas ĉiutage, ĉu ?

INF : Ho ! mi, ne gravas, ĉar mi estas pliaĝa.

La viro estis bona; li sentis sin tre kortuŝita de ĉi tiu frata sindonemo kaj decidiĝis kunkonduki la infanojn kun li ĝis la sekva vilaĝo. "Mi trovos, li diris al si, ian bonan animon kiu ekzorgos pri ili, kaj kiam mi revenos, ni vidos tion kion ni povos fari kun ili. La patro eble estos reveninta".

VIR : Kiel vi estas nomita, povra knabo mia ?

INF : Mi nomiĝas Jakobo, kaj mia frato estas Paŭlo.

VIR : Nu, mia malgranda Jakobo, ĉu vi volas ke mi kunprenu vin ? Mi prizorgos pri vi.

JAKobo : Kaj Paŭlo ?

VIR : Ankaŭ Paŭlo; mi ne volus disigi lin de tia bona frato. Veku lin kaj ni foriru.

JAK : Sed Paŭlo estas laca; li ne kapablos paŝi tiel rapide kiel vi.

VIR : Mi metos lin sur la dorson de Kapitano; vi tuj vidos.

La vojaĝanto delikate levis la etan Paŭloⁿ ankoraŭ dormantan, metis lin rajde sur la dorson de la hundo ripozigante lian kapon sur la kolon de Kapitano. Poste, li demetis sian bluzon kiu kovris lian militan jakon, envolvis la etulon en ĝi kvazaŭ per kovrilo, kaj por malhelpi lin fali, nodis la manikojn sub la ventro de la hundo. "Jen, prenu vian

jakon, li diris al Jakobo, transdonante ĝin al li; surmetu ĝin sur viajn magrajn malvarmegajn ŝultrojn kaj ni foriru".

Jakobo stariĝis, ŝanceliĝis kaj refalis surgrunden; dikaj larmoj ruliĝis el liaj okuloj; li sentis sin malforta kaj frostita, kaj komprenis ke ankaŭ li ne povos paŝi.

VIR : Kio do okazas al vi, povra knabo mia ? Kial vi ploras ?

JAK : Estas ke mi ne plu povas paŝi, mi ne plu havas fortojn.

VIR : Ĉu vi sentas vin malsana ?

JAK : Ne, sed mi estas tro malsata, mi ne manĝis hieraŭ, mi havis nur unu panpeco por Paŭlo.

Ankaŭ la viro sentis siajn okulojn malsekiĝi. Li elprenis el sia dusako dikan panpecon, fromaĝon kaj soldatbotelon da cidro kaj proponis al Jakobo la panon kaj la fromaĝon dum li malŝtopis la botelon.

La okuloj de Jakobo ekbrilis. Li estis enmetonta la panon al sia buŝo kiam iu rigardo ekĵetita al lia frato lin haltigis. "Kaj Paŭlo ? li diras, li havas nenion por matenmanĝi. Mi tuj gardos tion por li".

VIR : Mi ankoraŭ havas por Paŭlo, knabo mia, manĝu, povra infano, manĝu sen timo.

Jakobo ne bezonis diri tion dufoje. Li manĝis kaj trinkis kun ĝuo, ripetante dekfoje : "Dankon, bona sinjoro mia, dankon... Vi estas tre bona. Mi preĝos al la sankta Virgulino por fari vin tre feliĉa".

Kiam li estis sata, li sentis reveni siajn fortojn kaj diris ke li estis preta paŝi. Kapitano restis senmove apud Jakobo. La varmo de ĝia korpo revarmigis la etan Paŭlon kiu dormis pli profunde ol iam. La viro prenis la manon de Jakobo, kaj ili ekvojiris sekvitaj de Kapitano kiu trankvile paŝis sen permesi al si la plej malgrandan salton aŭ ian ŝanĝon en sia regula

paŝado, pro timo veki la infanon. La viro pridemandis Jakoboⁿ piedirante. Li sciigis de li ke lia patrino mortis post esti longe malsana, ke oni vendis ĉiujn iliajn belajn vestaĵojn kaj iliajn beletajn meblojn, ke fine ili manĝis nur panon, ke ilia paĉjo estis ĉiam malgaja kaj serĉis laboron.

"Iam, li diris, ĝendarmoj venis preni paĉjon. Li ne volis iri kun ili. Li ĉiam diris, kisante nin : 'Miaj kompatindaj infanoj ! miaj kompatindaj infanoj !' La ĝendarmoj diris : 'Vi tamen devas veni, knabego mia, ni havas ordonojn'.

"Poste iu ĝendarmo donis panpecon al mi kaj diris al mi : 'Restu tie kun via frato, etulo, mi revenos kunpreni vin'.

"Mi donis panon al Paŭlo, kaj atendis dum momento, sed neniu venis. Tiam mi prenis Paŭloⁿ per mano kaj ni paŝis longan tempon. Mi vidis domon kie oni manĝis, mi demandis supon por Paŭlo. Oni sidigis nin ĉe la tablo, kaj oni donis grandan teleron da supo al Paŭlo, kaj ankaŭ al mi. Poste oni kuŝigis nin sur pajlo. Kiam ni estis vekitaj, oni donis al ni lakton kaj panon. Poste oni metis panon en niajn poŝojn, kaj oni diris al mi : 'Iru, etulo mia, sub la gardo de Dio'.

"Mi foriris kun Paŭlo, kaj ni paŝis tiele dum multaj tagoj. Hieraŭ la pluvo venis, mi ne trovis domon, mi donis al Paŭlo la panon kiun mi gardis. Mi amasigis por li foliojn sub la kverko. Li ploris ĉar li malvarmis, tiam mi memoris ke Panjo diris al mi : 'Preĝu la sanktan Virgulinon, ŝi ne forlasos vin'.

"Mi preĝis la sanktan Virgulinon. Ŝi donis al mi la ideon demeti mian jakon por kovri la ŝultrojn de Paŭlo, poste kuŝi min sur liaj kruroj por varmigi ilin. Kaj tuj li endormiĝis. Mi estis tre kontenta. Mi timis movi por veki lin, kaj mi dankis la bonan sanktan Virgulinon. Mi petis ŝin doni al mi morgaŭ tagmanĝon ĉar mi estis tre malsata kaj havis nenion por Paŭlo. Mi ploris, kaj poste mi ankaŭ ekdormis. Kaj la Virgulino venigis vin sub la kverkon. Ŝi estas tre bona, la sankta Virgulino. Panjo tre ofte diris tion al mi : 'Kiam vi

bezonos ion, petu tion al la sankta Virgulino, vi vidos kiel ŝi aŭskultos vin'.

La viro ne reagis, li premis la manon de la eta Jakobo pli forte en la sia, kaj ili daŭrigis silente paŝi. Post kelka tempo, la viro ekrimarkis ke la paŝado de Jakobo malrapidiĝis. "Ĉu vi estas laca, infano mia?" li bonkore diris.

JAK : Ho ! Mi ankoraŭ povas iri. Mi ripozos en la vilaĝo.

La viro prenis Jakoboⁿ kaj metis lin sur siajn ŝultrojn. "Ni pli rapide iros tiel", li diris.

JAK : Sed mi estas peza; vi lacigos vin, mia bonulo.

VIR : Ne, etulo mia, ne turmentu vin. Mi portis pli pezan ol vi kiam mi estis soldato kaj militanta.

JAK : Vi estis soldato; sed ne ĝendarmo ?

VIR (ridetante) : Ne, ne ĝendarmo; mi reeniras en la hejmlandon post esti plenuminta mian tempon.

JAK : Kiel vi estas nomita ?

VIR : Mi estas nomita Mutie.

JAK : Mi neniam forgesos vian nomon, sinjoro Mutie.

MUTie : Mi ankaŭ ne forgesos la vian, mia eta Jakobo; vi estas brava infano, bona frato.

Ekde kiam Jakobo estis sur la ŝultroj de Mutie, tiu ĉi paŝis multe pli rapide. Ili ne malfruis alvenis en vilaĝo ĉe la enirejo de kiu li ekvidis bonan gastejon. Mutie haltis ĉe la pordo.

- Ĉu estas loĝejo por mi, por tiuj ĉi infanetoj kaj por mia hundo ? li demandis.

- Mi gastigas homojn, sed ne bestojn, respondis la gastejestro.

- Do vi havos nek la viron nek lia sekvantaro, diris Mutie daŭrigante sian vojon.

La gastejestro rigardis lin foriri kun ĉagreno. Li pensis ke malpravus forpeli viron kiu ŝajnis ami sian hundon kaj siajn infanojn, kaj kiu eble estus bone paganta.

- Sinjoro ! Hej ! Sinjoro la vojaĝanto ! li kriis kurante post li.

- Kion vi volas al mi ? diris Mutie turnante sin.

BNR (la gastiganto) : Mi havas loĝejon, sinjoro, mi havas ĉion kio necesas al vi.

MUT : Gardu ĝin por vi, ulo mia; la unua vorto estas ĉefa por mi.

BRN : Vi ne trovos pli bonan gastejon en la tuta vilaĝo, sinjoro.

MUT : Des pli bone por tiuj kiujn vi gastigos.

BRN : Vi ne faros la ofendon rifuzi al mi la loĝejon kiun mi proponas al vi.

MUT : Vi ja faris al mi la ofendon rifuzi tiun kiun mi petis al vi.

BRN : Dio mia, estas ĉar mi ne rigardis vin, mi parolis tro rapide.

MUT : Kaj mi ankaŭ, mi ne rigardis vin; nun kiam mi vidas vin, mi dankas vin pro tro rapide paroli, kaj mi iras aliloken.

Mutie, turnante al li la dorson, direktis sin al alia gastejo kun modesta aspekto, kiu troviĝis ĉe la fino de la vilaĝo, lasante la unuan gastejestreron palan pro kolero, kaj tre ĉagrenitan esti maltrafantan okazon akiri monon.

02 La Gardanĝelo.

- Ĉu estas loĝejo por mi, por du infanetoj kaj por mia hundo ? rekomencis Mutie ĉe la pordo de la gastejo.

- Eniru, sinjoro, estas por gastigi ĉiujn, respondis gajeta voĉo.

Kaj virino kun freŝa kaj ridetanta mieno aperis ĉe la pordosojlo.

- Envenu, sinjoro, mi liberigu vin de via rajdanto, diris la virino ridante kaj milde forprenante la etan Jakoboⁿ el supre la ŝultroj de la vojaĝanto. Kaj tiu kompatinda etulo kiu kviete dormas sur la dorso de la hundo ! Iu beleta infano kaj iu brava besto ! Ĝi ne movas pli ol hundo el plumbo pro timo veki la infanon.

Tamen la bruo fine vekis la etan Paŭloⁿ, li malfermegis la okulojn, rigardis ĉirkaŭ si kun mirigita mieno. Kaj, ne vidante sian fraton, li paŭtis kiel por plori kaj vokis per tremanta voĉo : "Jakoboⁿ ! volas Jakoboⁿ !"

JAK : Mi estas ĉi tie; jen mi, Paŭlo mia. Ni estas tre feliĉaj ! Ĉu vi vidas ĉi tiun bonulon ? Li venigis nin ĉi tien; vi baldaŭ ricevos supon. Ĉu ne, sinjoro Mutie, vi ja volos doni supon al Paŭlo ?

MUT : Certe, mia knabo, supon kaj ĉion kion vi volos.

La gastejestrino rigardis kaj aŭskultis kun mirigita mieno.

MUT : Vi nenion komprenas, bonulino mia, ĉu ne ? Estas tuta afero kiun mi rakontos al vi. Mi trovis tiujn du kompatindajn etulojn perdintajn en arbaro, kaj mi kunkondukis ilin. Tiu ĉi etulo, li aldonis ameme karesante la kapon de Jakobo, tiu ĉi etulo estas bona kaj brava knabo, mi rakontos al vi tion. Sed tuj donu al ni supon por la infanoj

kiuj havas la stomakon malplenan, kelkan kuirajon por ĉiuj, kaj mi zorgas pri la hundo, iu malnova amiko, ĉu ne, Kapitano ?

Kapitano respondis skuante la voston kaj lekante la manon de sia mastro. Mutie liberigis Paŭloⁿ de la bluzo kiu envolvis lin kaj li metis lin sur la grundon. Paŭlo rigardis ĉion kaj ĉiujn; li ridis al Jakobo, ridetis al Mutie kaj brakumis Kapitanoⁿ. La gastigantino kiu havis supon sur la fajro, pretigis la tagmanĝon. Ĉio baldaŭ estis preta. Ŝi sidigis la infanojn sur seĝojn, metis antaŭ ĉiu el ili plenan teleron da supo, panpecon, alportis sur la tablon fromaĝon, freŝan buteron, rafanetojn, salaton.

- Estas por atendi la stufaĵon, sinjoro. La fromaĝo estas bona, la butero ne estas malbona, la rafanetoj estas tutfreŝe eltiritaj el la tero, kaj la salato estas bone miksita.

Mutie altabliĝis. Jakobo kaj Paŭlo, kiuj malsategis, ĵetis sin sur la supon. Jakobo zorgis manĝigi kelkajn kulerojn al Paŭlo antaŭ ol mem gustumi ĝin. Poste Paŭlo manĝis per si mem kaj la bona eta Jakobo povis kontentigi sian apetiton. Post la supo, li manĝis kaj donis al Paŭlo panon kaj buteron. Ili trinkis cidron. Poste alvenis ŝaf-raguo kun terpomoj. La bona kaj beleta vizaĝo de Jakobo estis radiantanta. Paŭlo ridis, kisis la manojn de Jakobo ĉiufoje kiam li povis kapti ilin. Jakobo direktis al sia frato la plej kortuŝajn atentojn. Neniam li forgesis lin, li mem pasis nur due. Mutie rigardadis ilin. Ankaŭ li ridis kaj sentis sin feliĉa.

- Kompatindaj etuloj ! li pensis, kion ili fariĝus se Kapitano ne trovis ilin ? Tiu eta Jakobo havas bonan koron ! Kia tenereco por lia frato ! Kiajn zorgojn li donas al li ! Kion fari, Dio mia ! Kion fari kun ĉi tiuj infanoj ?

La gastigantino ankaŭ atente observis la zorgojn de Jakobo por lia frato, kaj la belan, honestan fizionomion de

Mutie. Ŝi senpacience atendis la klarigon kiun promesis al ŝi ĉi tiu lasta kaj servis al li la plej bonajn pecojn, sia plej bonan cidron kaj sian plej malnovan brandon.

Mutie ankoraŭ manĝis, la infanoj estis finintaj, ili apogis sin kontraŭ la dorson de siaj seĝoj kaj komencis oscedi.

- Iru ludi, bubetoj, diris al ili Mutie.

- Kien necesas iri, sinjoro Mutie ? demandis Jakobo saltante malsupren de sia seĝo kaj helpante Paŭloⁿ malsupreniri el lia.

MUT : Vere, mi ne tro scias. Diru do, bona gastigantino mia, kien vi lokos la knabojn por ke ili amuziĝas sen perturbi ion ?

- Tiun ĉi flankon, al la ĝardeno, infanoj miaj, diris la gastigantino malfermante malantaŭan pordon. Jen ĉe la fino de la aleo, kuvo plene da akvo kaj poto apude, vi povos amuziĝi akvumante legomojn kaj florojn.

JAK : Ĉu mi povas utiligi la akvon kiu estas en la kuvo por lavi Paŭloⁿ kaj ankaŭ lavi min, sinjorino ?

BLD (la gastigantino) : Certe, knaĉjo mia, sed atentu ne malsekigi al vi la krurojn.

Jakobo kaj Paŭlo malaperis en la ĝardenon; oni aŭdis ilin ridi kaj babili. Mutie manĝis malrapide kaj pripensi. La gastigantino prenis seĝon kaj metis sin vidalvide al li, atendente ke li estas fininta por forigi la manĝilaron. Kiam Mutie englutis sian lastan guton da kafo kaj da brando, li suprenrigardis, vidis la gastigantino, ridetis, kaj alkubutiĝante al la tablo : "Vi atendas la rakonton kiun mi promesis al vi, li diris; jen ĝi : ĝi ne estas longa, kaj eble vi helpos min fini ĝin".

Li donis al ŝi raporton pri sia renkontiĝo kun la infanoj. Lia voĉo tremis pro kortuŝo redirante la parolojn de Jakobo kaj rakontante la zorgadojn kiujn li havis por sia malpliaĝa frato, lian sindonemon, lian amemom por li, la kuraĝon kiun li

malŝparis pro ilia forlaso kaj la kortuŝan fidon al la sankta Virgulino.

- Kaj nun ke vi scias tiom multe kiom mi, bonulino mia, helpu min eliĝi el embaraso. Kion mi povas fari pri tiuj infanoj? Forlasi ilin? Mi ne kuraĝas pri tio, estus malakcepti ŝarĝon kiun mi povas entute elporti, kaj rifuzi la donacon kiun faras al mi la bona Dio. Sed mi havas longan vojon por iri: mi forlasas mian regimenton kaj reiras al hejmolando. Estas ke mi ne ankoraŭ alvenis tien, mi devas fari kvar etapojn je sep ĝis ok leŭgoj. Kaj kiel treni ĉi tiujn infanojn tiom junaj, tra pluvo, koto, vento? Kaj plie, mi estas fraŭlo; mi ne restas hejme, neniŭ por varti ilin. Mia frato estas gastejestro, kiel vi, kaj tute ne bezonas de mi, miaj gepatroj estas delonge apud la bona Dio, miaj fratinoj estas edziniĝintaj kaj ili havas sufiĉe kun la siaj, sen aldoni kompatindajn etulojn sen gepatroj, kaj sen mono. Nu, bona gastigantino mia! Vi ŝajnas al mi bravulino... Diru... Kion vi farus sur mia loko?

BLD: Tio kion mi farus?... Tio kion mi farus?...

Honorvorte, mi tute ne scias.

MUT: Sed ne estas konsilo, tio! Tio decidas nenion.

BLD: Kion vi volas ke mi diru al vi?... Unue mi certe ne lasus ilin vagadi sencele.

MUT: Estas ja tio kion mi diris al mi.

BLD: Mi ne donus ilin al iu ajn.

MUT: Estas ja mia ideo.

BLD: Mi ne kunkondukus ilin piede tiom for.

MUT: Estas tio kiun mi diris.

BLD: Do... mi vidas nur unu eblecon... Sed vi ne volos.

MUT: Eble jes. Diru pli.

BLD: Estas lasi ilin al mi.

Mutie rigardis la gastigantinon kun surprizo kiu mallevigis al ŝi la okulojn kaj kiu ruĝigis ŝin kvazaŭ ŝi diris

azenaĵon.

BLD : Mi ja sciis, ŝi embarase diris, ke vi ne volus. Vi ne konas min. Vi diras al vi ke mi eble ne estas la bona virino kiun mi ŝajnas, ke mi malfeliĉigus la infanojn, ke vi sentus ilin en la konscio kaj kion mi ankoraŭ scias ?

MUT : Ne, bona gastigantino mia, mi nek dirus nek pensus ion pri tio ĉio. Nur... nur... mi ne scias kiel diri... mi estas ŝuldanta al vi, dankema... sed vere, mi ne multe scias pri vi... kaj... kaj...

BLD : Vi ja povas diri ke vi tute ne konas min. Sed vi ne povos diri same, se vi volas iri informiĝi pri la virino Blidot, gastejestrino de la Gardanĝelo. Iru ĉe s^{ron} la parokestron, ĉe la viandiston, la ĉarfariston, la hufoferiston, la instruiston, la paniston, la butikiston, kaj ankoraŭ multajn aliajn. Ili ĉiuj diros al vi, ke mi ne estas malica virino. Mi estas vidvino, mi estas dudek ses jaroj, mi ne havas infanojn, mi estas sola kun mia fratino kiu estas dek sep jaroj, ni perlaboras nian porvivaĵon sen tro da malfacilaĵo, ni mankas nenion, ni eĉ realigas etajn ŝparaĵojn kiujn ni investas ĉiujare. Mankas al mi infanoj, jen du tute trovitaj. Mi ja demandas nenion al vi por varti ilin. Mi ne komplikas la aferon. Nur, mi scias ke mi amos ilin, ke mi tute ne malfeliĉigos ilin kaj ke vi havos trankvilan konsciencon rilate al ili.

Mutie stariĝis, premis la manojn de la gastigantino en la siaj kaj rigardis ŝin kun amema dankemo. "Dankon, li diris per konvinkita tono. Kie loĝas via preposto ?"

BLD : Ĉi tie, aliflanken, jen la ĝardeno de la pastrejo, puŝu la pordon kaj vi estas tie.

Mutie prenis sian kepon kaj iris viziti la preposton por paroli kun li pri sinjorino Blidot kaj peti al li bonan konsilon. Necesas kredi ke la informoj ne estis malbonaj ĉar Mutie revenis post kvaronhoro, kun la mieno kvieta kaj ĝoja. "Vi gardos la etulojn, mia bonega gastigantino, li diris ridetante.

Mi lasos ilin al vi... morgaŭ. Ĉu vi bonvolos gastigi min ĝis morgaŭ ? Ĉu ne ?"

BLD : Tiom kiom vi volos, mia kara sinjoro. Estas ĝuste, mi komprenas ke vi volis doni al vi iom da tempo por scii tian kia mi estas kaj por vidi loĝigi miajn infanojn... ĉar mi ja povas nun diri miajn infanojn, ĉu ne ?

MUT : Ili ja restas ankaŭ iom al mi, sen riproĉo. Kaj mi ne diras ke mi ne revenos viziti ilin iun tagon aŭ alian.

BLD : Kiam vi volos, mi ĉiam havos liton por vi tranokti kaj bonan vespermanĝon por revigligi vin. Kaj nun, mi iras vidi miajn infanojn. Ĉu jen la patrinaj zorgadoj kiuj komencas ? Unue necesas al mi kuŝigi ilin ne for de mi kaj mia fratino. Kaj poste, necesos al ili tolaĵo, vestoj, ŝuoj.

MUT : Tamen estas vere ! Mi ne kalkulis kun tio. Estas mi kiu hontas kaŭzi al vi tiujn malfacilaĵojn kaj tiun elspezon. Tion, komprenu, bona gastigantino mia, ne estas utile kaŝi al mi, mi ne havas sufiĉe por pagi tiun tuton, mi havas tute ĝuste miajn vojaĝkostojn kaj unu moneron je dek frankoj por la neatenditaĵo : cigaro, riparo de ŝuoj, eta almozdono pasante por pli malriĉulo ol mi. Ekzemple, mi povas dividi la moneron kaj lasi al vi kvin frankojn. Mi tamen alvenos, mi bone detenos min de tabako kaj ŝuoj. Estas tiom multaj kiuj paŝadas nudpiede ! Oni banas ilin pasante antaŭ rivereto, kaj oni paŝas nur pli bone.

BLD : Gardu vian moneron, mia bona sinjoro, pli malpli kvin frankoj ne ĝenas min. Gardu ĝin, via bona intenco sufiĉas, kaj la infanoj ne mankos ion ajn.

La gastigantino stariĝis, ridetante faris amikan kaptionon al Mutie kaj eliris.

03 Informoj.

S^{ino} Blidot alvokis sian fratinnon Elfiaⁿ kiu lesivis la lavataĵon, rakontis al ŝi la aventuron kiu ĵus okazis kaj petis ŝin veni helpi ŝin pretigi por la infanoj, la kabineto apud la ĉambro kie ili ambaŭ kuŝiĝis. "Estas la bona Dio kiu sendas al ni tiujn infanojn, diris Elfia, la sola afero kiu mankis por vigligi nian hejmon! Ĉu ili estas afablaj? Ĉu ili aspektas bonaj knaboj, bonedukitaj infanoj?"

BLD: Ĉu ili estas afablaj, bonaj knaboj, bonedukitaj? Mi vere kredas tion! Necesas nur vidi ilin! Beletaj kiel anĝeletoj, ĝentilaj kiel ĉambristinoj, trankvilaj kiel prepostoj. Iru, ili ne estos malfacile edukeblaj; ne kiel tiuj de la patro Kvietemulo, transen!

ELFia: Bone! Kie ili estas ke mi alĵetu ekrigardon al ili. Oni ĉiam pli bone ŝatas vidi per siaj okuloj, vi bone scias. Ĉu ili estas en la akceptejo?

BLD: Ne, mi sendis ilin en la ĝardenon.

Elfia kuris al la ĝardenon. Ĉi tie trovis Jakoboⁿ okupinta elradikigi la herbaĵojn el bedo de karotoj. Paŭlo zorge kolektis ĉi tiujn herbojn kaj penis fari kun ili malgrandajn faskojn.

Pro la bruo kiun faris Elfia, la infanoj turnis la kapon kaj montris siajn beletajn vizaĵojn dolĉajn kaj ridetantajn. Jakobo vidante ke Elfia rigardis ilin sen diri vorton, stariĝis kaj ankaŭ rigardis ŝin kun malkvieta mieno.

JAK: Ne estas malbone, ĉu ne, sinjorino, tio kion ni faras, Paŭlo kaj mi? Ĉu vi ne koleras kontraŭ ni? Ne estas kulpo de Paŭlo, estas mi kiu diris al li amuzi faskigi la herbon kiun mi elŝiras.

ELF: Ne malbone, tute ne malbone, etulo mia, mi ne

koleras. Kontraŭe ja, mi tre ĝojas ke vi senigas la ĝardenon de herbaĵoj kiuj sufokas niajn legomojn.

Paŭlo : Ĝi do estas al vi, tio ?

ELF : Jes, ĝi estas al mi.

PAŬ : Ne, mi kredas ne, ĝi ne estas al vi, ĝi estas por la sinjorino de la kuirejo kiu donas bonan stufaĵon. Mi volas ne ke oni prenas al ŝi ŝian ĝardenon.

ELF : Ha, ha, ha ! Kiel li estas amuza, ĉi tiu etulo ! Kaj kiel vi malebligis min depreni la legomojn de la ĝardeno ?

PAŬ : Mi kaptus dikan bastonon, poste mi dirus al Jakobo helpi min forpeli vin, kaj jen !

Elfia ekĵetis sin al Paŭlo, kaptis lin, kunprenis lin, kisis lin tri aŭ kvar fojojn, kaj remetis lin surgrunden antaŭ ol li elsurpriziĝis kaj antaŭ ol Jakobo havis tempon fari movon por helpi sian fraton.

- Mi estas la fratino de la virino kun bona stufaĵo, ekkriis Elfia ridante, kaj mi loĝas kun ŝi, estas pro tio ke ŝia ĝardeno estas ankaŭ la mia.

- Des pli bone ! ekkriis Jakobo. Vi aspektas tiel bona kiel la sinjorino. Mi dezirus ke S^{ro} Mutie kiu estis tiom bona, ĉiam restus ĉi tie.

ELF : Li ne povas resti, sed li lasos vin ĉe ni, kaj ni bone prizorgos vin, kaj ni bone amos vin se vi estas saĝaj kaj bonaj.

Jakobo ne respondis, li klinis la kapon, iĝis tre ruĝa, kaj du larmoj ruliĝis laŭ liaj magraj vangetoj.

ELF : Kial vi ploras, mia eta Jakobo ? Ĉu vi estas kolera resti kun mia fratino kaj mi ?

JAK : Ho ne ! Male ! Sed mi estas kolera ke Mutie foriras, li estis tiom bona por Paŭlo kaj por mi.

ELF : Li revenos, trankviliĝu. Kaj plie li ne estas forironta hodiaŭ, vi vidos lin post momento.

La eta Jakobo viŝis siajn okulojn per la mandorso,

revigligis sian gajan mienon kaj daŭrigis sian laboron interrompita de Elfia. Kapitano, kiu vizitis la apartamenton, trovante la ĝardenan pordon malferma, eniris kaj proksimiĝis al Paŭlo sidanta meze de liaj pakaĵoj da herboj. Kapitano tretis la herbojn, malaranĝis ilin, Paŭlo penis vane forpuŝi ĝin, la hundo estis pli forta ol la infano.

- Jakobo Jakobo, ekkriis Paŭlo, foririgu la hundon ! Ĝi piedpremas miajn garbojn da fojno.

Jakobo alkuris helpi Paŭloⁿ ĝuste kiam Kapitano, puŝante lin amike per sia muzelo, ruligis lin sur la grundo. Jakobo ĉirkaŭigis per siaj brakoj la kolon de la hundo kaj tiris ĝin malantaŭen per ĉiuj siaj fortoj, sed Kapitano ne retropaŝi.

- Mi petegas vin, mian bonan hundon, foriru. Mi petegas vin, lasu mian kompatindan Paŭloⁿ ludi trankvile. Vi ja vidas ke vi ĝenas lin, ke vi estas pli forta ol li, li ne kapablas malhelpi vin... nek ankaŭ mi, li aldonis senkuraĝigita ĉesante siajn klopodojn por foririgi la hundon.

Kapitano turnis sin al Jakobo, kaj kvazaŭ li komprenis liajn parolojn, ĝi lekis al li la manojn, donis lekadon sur la vizaĝo de Paŭlo, amikece rigardis ilin kaj malrapide foriris kiel li venis. Ĝi reiris apud sia mastro.

Mutie restis, post la foriro de la gastigantino, kun la kubutoj sur la tablo, la kapo ripozanta sur siaj manoj, li pripensis.

- Mi timas, li diris al si, esti estinta tro rapida, esti doninta tro facile tiujn infanojn al la bonan gastigantino... ĉar, fine, ŝi pravas ! Mi apenaŭ konas ŝin... kaj eĉ tute ne... La preposto parolis al mi favore pri ŝi, estas vere. Sed bona preposto (ĉar li aspektas kiel bravulo, bona homo, sankta homo !), bona preposto ĉiam estas tro bona, li indulge parolas pri ĉiuj, li kredus peki dirante malbonaĵojn... Kaj tamen... li parolis kun entuziasmo, konvinkita mieno !... Li sciis ke ĉi tiuj du kompatindaj etaj orfoj estus sub la potenco de la

gastigantino, S^{ino} Bli... Blikot, Blindot... mi ne plu scias ŝian nomon... Mi rememoras, Blidot !... jen ŝi !... Blidot kaj ŝia fratino... Komprenoble ! Mi volas forigi la dubojn kaj certigi al mi kia ŝi estas. Mi havas tempon de nun ĝis la vespermanĝo, kaj mi tuj iros de domo al domo por kompletigi miajn observaĵojn pri S^{ino} Blidot. Tiuj kompatindaj etuloj, ili estas tiom afablaj kaj Jakobo estas tiom bona ! Estus malagraba ago meti ilin ĉe malbonuloj, malfeliĉigi ilin ! Ne, ne, mi ne volas havi ŝarĝitan konsciencan.

Kaj Mutie, lasante sian malgrandan vojaĝsakon sur la tablo, eliris post esti alvokinta Kapitanoⁿ. Li unue iris en la apudan domon, ĉe la viandisto.

- Senkulpigu, Sinjoro, li diris enirante, mi venas pri iu afero... pri iu afero..., tio ne estas pri afero... sed pri io kiel afero... kiu ne estas tio por vi... ankaŭ ne pli por mi, se paroli sincere.

La viandisto rigardis Mutie^{on} kun mira mieno, duone ridetanta, duone malkvieta. "Kion do ? kio estas do ?" li fine diris.

MUT : Jen ! Estas ke mi ŝatus scii vian opinion pri S^{ino} Blidot, gastigantino, ĉi apude...

La ViaNDisto : Kial ? Opinion pri kio ?

MUT : Sed pri ĉio. Mi bezonas scii kian virinon ŝi estas. Ĉu oni povas konfidi al ŝi infanojn por varti. Ĉu ŝi estas brava virino, bona virino, virino por feliĉigi infanojn.

VND : Rilate al tio, mia bona sinjoro, ne estas plej bona virino en la mondo : ĉiam bonhumora, ĉiam ridetanta, ĝentila, afabla, agrabla, laborema, bonkora. Ĉiuj amas ŝin ĉi tie. Ĉiu bone opinias pri ŝi. Ŝi ne mankas diservon, ŝi faras servon al ĉiuj kiuj petas tion. Ŝi kaj ŝia fratino, ili estas la perloj de la lando. Demandu al S^{no} preposto, li multe diros pri ili, kaj ĉio bona ĉar li konas ilin ekde ilia naskiĝo kaj li neniam havis riproĉon por esprimi kontraŭ ili.

MUT : Sufiĉas. Dankegon, sinjoro, kaj pardonu pro trudiĝemo.

VND : Nenia trudiĝemo. Estas plezuro al mi doni bonan ateston pri S^{ro} Blidot.

Mutie salutis, eliris kaj iris du pordojn pli for, ĉe la panisto. "Ne estas pano kiun mi bezonas, Sinjoro, li diris al la panisto kiu proponis al li panon de du funtoj, estas informo kiun mi venas serĉi. Via opinio pri S^{ino} Blidot, gastigantino ĉi apude, por konfidi al ŝi infanojn por guberni ?"

La PANisto : Konfidu al ŝi ĉion kion vi volus, brava militisto (ĉar mi vidas pro via vesto ke vi estas militisto). Viaj infanoj ne povus esti en pli bonaj manoj. Estas bona virino, brava virino, kaj ŝia fratino ja valoras ŝin. Ne ekzistas pli bonaj kreitaĵoj en dek mejloj ĉirkaŭe.

MUT : Dankon miloble, estas ĉion kion mi volis scii. Bonegan tagon.

Kaj Mutie, kontenta pro la informoj kiujn oni donis al li, estis reironta ĉe S^{ino} Blidot kiam venis al li la ideo ankoraŭ eniri ĉe la gastejestro kiu mastrumis la belan gastejon ĉe la eniro de la vilaĝo. "Ankoraŭ tiu, li pensis, li estos la lasta, kaj se tiu viro ne malfavore raportas al mi pri ŝi, mi povos esti trankvila, ĉar li ŝajnas al mi malafabla kaj lia atesto ne lasos al mi dubon pri la feliĉo de miaj bubetoj".

La gastejestro estis ĉe sia pordo. Li vidis veni Mutie^{on} kaj rekonis lin je la unua ekrigardo. Unue, li kuntiris siajn dikajn brovojn, poste vidante lin alproksimiĝi, li pensis ke li revenis peti al li por tagmanĝi kaj li afektis sian plej komplezan mienon. "Envenu, Sinjoro. Bonvolu eniri, mi tute estas je via servo".

Mutie tuŝis sian kepon, eniris kaj devis penege kvietigi Kapitanoⁿ kiu rondiris ĉirkaŭ la gastiganto flarante lin, grumblante kaj malkaŝante akrajn dentojn pretajn por mordi kaj ŝiri. "Ha ! Ha ! diris Mutie al si, Kapitano ne montris

multe da dolĉeco nek da ĝentileco. Estas io tie ĉi sube, la viro estas malbona, mia hundo havas flarpovon".

La gastiganto, maltrankvila pro la agmaniero de Kapitano turnis, ŝanĝis de loko kaj ĵetis al ĝi furiozajn rigardojn, al kiu Kapitano respondis per iu pliigo de grumbladoj.

Mutie tamen sukcesis silentigi kaj kuŝigi ĝin apud sia seĝo. Li fiksas al gastejestro akrajn okulojn kaj demandis al li sen alia antaŭparolo ĉu li konis S^{inon} Blidot^{on}.

- Pri tio ne, respondis la gastejestro kun disdega mieno, mi ne frekventas homojn de tiu speco.

- Ŝi estas do el la plej malbona speco, ĉu ?

- Senvalora virino. Ŝi kaj ŝia fratino estas megeroj kies oni ne povas akiri parolon; stultulinoj kiuj kredas sin supre ĉiujn, kiuj neniam iras al danco aŭ al festoj de la ĉirkaŭaĵoj; orgojlulinoj kiuj restas hejme aŭ kiuj iras promeni survoje kun mienoj de princinoj. Ŝajnus ke oni ne indus alproksimiĝi ilin, ili krevus prefere ol direkti al vi bonan parolon aŭ rideton. Babilulinoj kiuj aĉigas la metion, kiuj vendas kvin soldojn tion kion mi donas por dek aŭ dek kvin. Tiel, la akiro valoras la elspezon : malbona kuŝejo, malbona cidro, malbona manĝaĵo. Mi bone vidis vin eniri, vi ne restis tie. Vi bone agis, ĉe mi, vi trovos la aliecon. Mi tuj servos al vi zorgatan tagmanĝon, vi nenie trovos ion similan.

Li turnis sin kvazaŭ por serĉi iun kaj alvokis per tondra voĉo : "Netaviŝtuko ! Kie vi estas enŝovinta, malbona bubajo, besto, mallaboremulo ?"

- Jen, Sinjoro, respondis per obtuza voĉo pro timo, malaltgrada povrulo, maldika, pala, duone vestita de vestaĉoj, kiu elvenis el malantaŭ pordo kaj kiu, tuj ekrektiĝante, restis duonklininta antaŭ sia terura mastro.

- Kial vi estas ĉi tie ? Kial vi ne estas en la kuirejo ? Kiel vi aŭdacas veni aŭskulti tion kion oni diras ? Respondu,

fiuleto ! Respondu, besto !

Ĉiu "respondu" estis akompanita de piedbato kiu eligis akrajn kriojn de la infano. Li volis paroli, sed sia dentoj kunbatis, kaj li ne sukcesis eldiri eĉ vorton.

- En la kuirejon kaj petu al mia edzino bongustan tagmanĝon por Sinjoro. Kaj rapide, aliel...

Li faris geston kies la infano ne atendis la finon, li kuris plenumi la ordonojn de la mastro tiel rapide kiel ebligis al li siaj mallongaj kruroj kaj sia stato de malforteco.

Mutie indigne aŭskultis kaj rigardis. "Sufiĉe, li diris, stariĝante, mi ne volas vian tagmanĝon, ne estas por ekloĝi ĉe vi ke mi venis, sed por ricevi informojn pri S^{ino} Blidot. Tiuj kiujn vi donis al mi, sufiĉas al mi. Mi konsideras ŝin kiel la plej bona kaj la plej honesta virino de la lando, kaj estas al ŝi ke mi konfidos la trezoron kiun mi penis por loki".

La gastejestro ŝvelis pro kolero laŭmezure kiel Mutie parolis. Sed kiam li aŭdis la vorton de trezoro, sia vizaĝaspekto ŝanĝiĝis, sia foina vizaĝo vidigis gracian aspekton kaj li volis halti Mutie^{on}, kaptante al li la brakon. Je la movado de malsimpatio kiun Mutie afektis, liberigante sin el tiu preno, Kapitano kuregis al la gastejestro, faris mordon al li ĉe la mano, alian ĉe la kruro, kaj estis saltonta al la vizaĝo kiam Mutie ekkaptis ĝin per ĝia ĉirkaŭkolo kaj kuntiris ĝin for. La gastejestro minacis per pugno al Mutie kaj haste reeniris hejmen por bandaĝigi la mordadojn de la brava Kapitano. Mutie iom riproĉis sian kompatindan hundon pri ĝia vigleco, kaj revenigis ĝin al la Gardanĝelo.

04 Netaviŝtuko.

Estis neniŭ en la ĉambro kiam Mutie eniris. Li esploris la apartamenton kaj iris al la ĝardeno kies pordo estis malfermita. Post esti ekzameninta la florojn kaj la legomojn, li alvenis ĉe laŭbo el hedero kaj eniris. Benko ornamis la laŭban bordon, rustika tablo estis kovrita de libroj, de faritaĵoj el ordinaraĵoj tolaĵoj. Li rigardis la librojn : Imitado de Jesuo Kristo, Nova Testamento, Perfekta kuiristo, Manlibro de mastrumantinoj, Memuaro de soldato.

Mutie ridetis : "Bonege ! Jen libroj kiujn mi ŝatas vidi ĉe bona mastrumantino ! Tio donas fidon vidi tian elekton. Tiaj manlibroj, estas bone; se mi ne ricevintus mian manlibron de soldato dum miaj kampanjoj, mi neniam kapablus elteni ĉion kion mi suferis tie ! Kaj garnizone ! Tial la enuo ! Jen terura malamiko por venki kaj kiu pelas vin al trinkejo kaj de tie al la policoĉambro. Feliĉe mia amiko la manlibro ĉeestis, kaj malhelpis min fari malsaĝaĵojn kaj lasi min cedi al ĉagreno, al senkuraĝiĝo ! Estu feliĉa tiu kiu donis ĝin al mi kaj tiu kiu inventis ĝin !"

Parolante Mutie estis preninta la Memuaron de soldato; li malfermis la libron, en ĝi legis linion, poste du, poste dek, poste paĝojn, sekvitajn de aliaj paĝoj, tiel ke post horo, li ankoraŭ estis tie, staranta antaŭ la tablo, ne pensante forlasi la malgrandan volumon. Li eĉ ne aŭdis S^{inon} Blidot^{on} kaj Elfiaⁿ veni serĉi lin en la ĝardeno.

BLD : Jen li en nia laŭbo, Dio pardonu min ! Ej ! kion do li faras tie, senmova antaŭ nia tablo ? Estas ke li ne movas pli ol statuo !

ELF, ridante : Ĉu li mortis ? Ŝajnas ke li dormas, tute staranta.

GST, mallaŭte : Hm ! Hm ! S^{ro} Mutie !... Li ne aŭdas.

ELF, same : S^{ro} Mutie ! La tagmanĝo estas preta, ĝi atendas vin... Surda kiel morto ! Parolu pli laŭte, mi ne kuraĝas, mi ne konas lin.

- S^{ro} Mutie ! pli laŭte ripetis S^{ino} Blidot alproksimiĝante al la tablono kaj metante sin antaŭ li.

Li suprenrigardis, vidis ŝin, pasis la manon sur sian frunton kvazaŭ por rememorigi siajn ideojn, rigardis ĉirkaŭ si konsternite.

- Multajn pardonpetojn, sinjorino Blidot, mi nek vidis vin, nek aŭdis vin. Mi estis tute kapita de mia libro, tio estas, de via libro, li ĝustigis ridetante. Mi neniam kredintus ke libro povus tiom amuzi kaj interesi. Mi estis leganta pri la policoĉambro; estas ja tiel, ekzakte tiel ! Mi iris tien nur unu fojon kaj pro falsa raporto, sen ke tio estis mia kulpo... Estas tiel bone rakontita ke mi kredis ankoraŭ esti tie !

BLD : Mi estas plenkontenta ke ĉi tiu libro plaĉas al vi. Vi povas konservi ĝin se vi deziras finlegi ĝin. S^{ro} preposto donos alian al mi, li havas ilin tiom kiom oni volas.

MUT : Mi ne malkonsentas, S^{ino} Blidot. Mi akceptas, kaj dankegon. Mi legos ĝin honore al vi, kaj mi esperas dank' al ĝi pliboniĝi.

BLD : Pri tio, sinjoro Mutie, vi tute aspektas esti tiel bona kiel iu ajn. Sed ni venas, mia fratino kaj mi, sciigi al vi ke la tagmanĝo estas servita, antaŭ baldaŭ du horoj, la infanoj devas malsati; kaj mi pensas ke vi mem ne bedaŭrus manĝeti.

MUT : Tio estas la vero; mia matenmanĝo estas tre for kaj ne malutilos al tagmanĝo.

Mutie salutis Elfiaⁿ, kiun li ankoraŭ ne konis, kaj sekvis la du fratinojn al ĉambro kie atendis la infanoj. Paŭlo forte deziris tuŝi tion kion estis sur la tablo, sed Jakobo malpermesis al li.

JAK : Atendu, Paŭlo; estu saĝa; vi bone scias ke necesas nenion tuŝi sen permeso.

PAŬ : Do, Jakobo, doni permeson ?

JAK : Mi, mi ne povas, tio ne estas al mi.

PAŬ : Sed estas ke mi malsatas. Voli manĝi.

JAK : Atendu mimuton; S^o Mutie baldaŭ venos, poste la sinjorino, poste la alia, ili donos al vi por manĝi.

PAŬ : Ĉu longe, minuto ?

JAK : Ne, ne tre longe... Nu, jen ili kiu alvenas.

Ĉiuj altablĝis. Jakobo suprentiris sian fraton sur lian seĝon kaj sidiĝis apud li por servi lin. Mutie amike manfrapetis ilin, kaj ili ĉiuj komencis manĝi brasikosupon al kiu Mutie donis laŭdojn de kompetentulo. Kiam la supo estis finita, Elfia volis stariĝi por meti sur la tablon raguon el bovaĵo kaj fazeoloj, kiu atendis sian vicon, sed Mutie restigis ŝin.

- Pardonu, fraŭnjo, ne estas kutime ke la sinjorinoj servas la sinjorojn. Permesu ke mi domaĝu al vi la penon.

- Same, diris S^{ino} Blidot ridante, vi estas iom de la hejmo de kiam vi donis al ni ĉi tiujn infanojn. Faru laŭ via ideo, kaj senĝeniĝu kiel ĉe vi.

- Certe, Sinjorino Blidot, tio kion vi diris, estas vera; mi sentas min kvazaŭ mi estis hejme, kaj mi uzas ĝin, kiel vi vidas.

La tagmanĝo finiĝis gaje. Jakobo plezuriĝis pro vidi Paŭloⁿ manĝi ĝis senspiriĝi. Post tagmanĝo, Mutie sendis ilin eksteren amuziĝi, li mem komencis fumi. La du fratinoj okupiĝis pri la mastrumado kaj servadis la vojaĝantojn kiu haltis por tagmanĝi. Mutie babilis kun la el- kaj en-irantoj, kaj ekhelpis kiam estis tro multe por fari.

Jakobo kaj Paŭlo promenadis en la strato. Ili rigardis la maloftajn butikojn de legomvendisto, viandisto, panisto, selisto. Ili transiris la vilaĝon kaj renkontis malriĉan

knabeton je ok aŭ naŭ jaroj, vestita per vestaĉoj, kiu pene kuntrenis sakon da karbo tro peza rilate al sia aĝo kaj siaj fortoj. Li senĉese haltis, viŝis per la sia mandorso la ŝviton kiu fluis de sia frunto. Lia malgraseco, lia malĝoja aspekto emociis la bonan etan Jakoboⁿ.

- Kial vi kuntrenas tiom pezan sakon ? li demandis al li, alproksimiĝante al li.

- Ĉar mia mastro ordonis tion al mi, respondis la knabeto kun ploretanta voĉo.

- Kaj kial vi ne diras al li ke ĝi estas tro peza ?

- Mi ne kuraĝas, li batus min.

- Ĉu li do estas malafabla ?

- Ŝŝ ! diris la knabeto, rigardante ĉirkaŭ si kun teruro.

Se li aŭdus vin, li donus al mi vipbatojn.

- Kial vi restas ĉe tiu malbona viro ? daŭrigis Jakobo mallaŭte.

NTV (la knabeto) : Oni konfidis min tie, necesas fakte ke mi restas tie. Mi havas neniun kien iri : nek patron nek patrino.

JAK : Estas kiel mi kaj Paŭlo. Sed imitu min, demandu al la bona Sankta Virgulino helpi vin, vi vidos ke ŝi faros tion, ŝi estas tiel bona !

NTV : Sed mi ne konas ŝin, mi ne scias kie ŝi loĝas.

JAK : Ha ! sed ankaŭ mi ja ne scias ! Sed ne gravas, ĉiam petegu, ŝi aŭdos vin.

NTV : Ho ! Mi ne petus pli bone. Sed se mi vokas tro laŭte, mia mastro ankaŭ aŭdos tion, kaj li frapos min.

JAK : Ne necesas krii, diru mallaŭte : "Sankta Virgulino, sukuru min. Vi kiu estas la patrino de malfeliĉuloj, bona sankta Virgulino, helpu min".

La eta malfeliĉulo faris kiel Jakobo diris al li, poste li atendis.

- Neniu venas, li diris, kaj necesas ke mi foriras kun

mia sako, la mastro atendas tion.

- Atendu, mi tuj helpos vin iom, ni ambaŭ trenos ĝin. La sankta Virgulino ne tuj venas tiele, sed ŝi tamen helpas.

Jakobo tiris la sakon post esti instiganta Paŭloⁿ puŝi; la knabeto ne havis tiom multe da forto kiom Jakobo kiu tiris tiel bone ke la sako eksaltis sur la ŝtonoj de la vojo, ke ĝi ŝiriĝis ĉe pluraj lokoj kaj ke la karbopecoj eskapis el ĉiuj flankoj. La infanoj haltis konsternitaj, sed Jakobo ne perdis la kapon pro tiom malmulte da bagatelo.

- Atendu, li diris, ne moviĝu; mi iras alvoki S^{non} Mutie^{on} kiu estas tre bona. Estas li ke la sankta Virgulino sendis al ni. Ŝi ankaŭ sendos lin al vi. Venu, Paŭlo, ni rapide kuru.

Li tenis Paŭloⁿ per la mano kaj ambaŭ kuris tiel rapide kiel la malgrandaj kruroj de Paŭlo permesis tion, ĝis ĉe S^{ino} Blidot kie ili trovis Mutie^{on} fumantan kun kelkaj vojaĝantoj.

JAK : Sinjoro Mutie, vi kiu estas tiom bona, rapide venu al la helpo de kompatinda knabeto, multe pli malfeliĉa ol mi kaj Paŭlo. Li ne povas treni dikan sakon da karbo kiun ni krevigis, kaj lia malbona mastro frapos lin. Tiu kompatinda etulo tiom timas ! Kaj la sankta Virgulino faras diri al vi rapide iri por helpi lin.

- Kie vi vidis la sanktan Virgulinon, knabo mia, por fari al mi ĉiajn komisionojn ? Mutie diris ridante kaj stariĝante.

- Mi ne vidis ŝin, sed mi sentis ŝin en mia kapo kaj mia koro. Vi bone scias ke estas ŝi kiu sendis vin por savi nin, Paŭloⁿ kaj min; necesas ankoraŭ savi tiun malfeliĉan etulon.

- Estas bone, brava knabeto mia; mi estas ironta; vi kondukas min tien.

Mutie sekvis lin post esti petanta al Elfia gardi Paŭloⁿ kiu ne paŝis sufiĉe rapide. Jakobo kondukis lin kurante sur la vojo kie ili trovis la knabeton kiun Mutie tuj rekonis. Estis Netaviŝtuko, la povra turmentato de la malbona gastejestro Burniero. Li proksimiĝis al li kun kompatema mieno, levis la

sakon, ekzamenis ĝin, eltiris el la poŝo de sia jako, kudrilon kaj dikan fadenon, kiel la soldatoj kutime havas tion, kudris la truojn, kaj babilante, demandis al la knabo : "ĉu ne eblas alporti karbon sen trapasi la vilaĝon kaj sen esti vidita de via mastro, povra knabo mia ? Mi ne ŝatus renkonti tiun malbonulon; mi timus allasi min doni al li batadon kiu ne estus tre bona efekto.

NTV : Jes, sinjoro, ni povas pasi malantaŭ la domoj, kaj malplenigi la sakon en la karbujojn kiu estas ekstere apogata al la staplo.

- Tiam ek, mia amiko ! diris Mutie ŝarĝante la sakon sur siajn ŝultrojn.

Netaviŝtuko rigardis kun admiro.

- Ho ! Sinjoro, mia bona sinjoro ! Nepre diru al la sankta Virgulino kiom mi dankas ŝin sendi vin. Tiu bona sankta Virgulino !... Tiu etulo tamen pravis, li aldonis rigardante Jakoboⁿ kun gaja mieno.

- Mi ja diris al vi, reparolis Jakobo kun feliĉo.

Mutie priridis la naivecon de la infanoj. Ili ne prokrastis alveni al la karbujo. Mutie malplenigis la sakon, faldis ĝin kaj metis ĝin en angulon. Li sin pretigis foriri kiam la infano timeme revokis lin.

- Sinjoro, ĉu vi estus sufiĉe bona por petegi la sanktan Virgulinon sendi al mi manĝaĵojn ? Oni donas tion al mi tiom malmulte, ke mi suferas tie (montrante sian stomakon) kaj ke mi ne havas fortojn.

- Kompatinda malfeliĉulo !... respondis Mutie teneriĝinta. Aŭskultu; venu ĉe la Gardanĝelo, mi rekomendos vin al S^{ino} Blidot, bonulino se iam tio ekzistis.

NTV : Ho ! Sinjoro, mi ne povos ! Mia mastro mortigus min se mi irus tien. Li ege malamas ŝin.

MUT : Tiam mi kunportos al vi ion kiun mi petos al S^{ino} Blidot; kaj poste, mia bona Jakĉjo ĉiutage kunportos al vi

nutraĵon. Ĉu vi bonvolas, Jakĉjo mia ?

JAK : Ho ! Jes, sinjoro Mutie. Mi ĉiutage gardos ion de mia tagmanĝo por li. Sed kiel fari por doni ĝin al li ? Mi timas sian mastron.

NTV : Vi povas meti ĝin en la kavon de la arbo apud la puto, mi tien iras ĉiutage por ĉerpi akvon.

MUT : Estas bone, estas promesite. Post kvaronhoro, vi havos vian aferon. Jakĉjo portos ĝin al la puto. Ni foriru nun, tiel ke oni ne surprizu nin, estas tio kio farus problemon al tiu ĉi kompatinda Netaviŝtuko !

Mutie foriris kun Jakobo. Enirante en la Gardanĝelon, li raportis al S^{ino} Blidot la travivaĵon de Netaviŝtuko kaj petis ŝin permesi Jakoboⁿ ĉiutage fari ĉi tiun almozon.

- Sed, li aldonis, mi ne volas ke vi akaparus ĉiujn miajn bonfarojn, kaj mi volas pagi la manĝaĵon de tiu ĉi malfeliĉa knabeto. Vi diros al mi kiom vi taksas tion kaj tion kion mi estos ŝuldanta al vi. Mi venos kalkuli niajn kontojn po unu aŭ du fojoj jare.

BLD : Niaj kontoj ne estos longe por kakuli, sinjoro Mutie; sed, tamen, mi plene ĝojos revidi vin, por ke vi venos kontroli niajn infanojn kaj vidi ĉu vi estas malĝuste loĝiginta ilin konfidante ilin al mi. Nu, Jakĉjo mia, portu tion en la arban kavon de la puto, por ke la kompatinda infano ne enlitiĝu sen vespermanĝi.

Jakobo feliĉe ricevis pakon enhavanta panon kaj viandon. Li prenis Paŭloⁿ per la mano kaj direktis sin al la puto kiun S^{ino} Blidot montris al li kaj kiu estis je cent paŝoj de la Gardanĝelo. Li lokis sian malgrandan pakon en la arbo, kaj post malmulte da minutoj, li vidis la kompatindan Netaviŝtukoⁿ alveni kun kruĉo. Dum ĝi pleniĝis, Netaviŝtuko kaptis la pakon, malfermis ĝin, avide manĝis parton de provianto kiun ĝi enhavis, relokis la ceteron en la arban

kavon, gestis de malproksime amikan salutsignon al Jakobo kaj reiris, pene portante sian plenan kruĉon.

05 Disiĝo.

La tago daŭris, kaj gaje finiĝis por ĉiuj loĝantoj de la Gardanĝelo. La infanoj ludis, vespermanĝis kun bona apetito kaj frue enlitiĝis, lacaj pro sia tago kaj ĉefe pro sia antaŭa nokto. Mutie daŭrigis siajn afablaĵojn al sinjorino Blidot kaj ŝia fratino por la servado de la malmultaj vojaĝantoj kiuj haltis por sensoifiĝi kaj ripozi. Kiam la infanoj estis kuŝintaj, li restis por babilo kun ili pri tio kio taŭgis fari por ĉi tiuj kompatindaj etuloj forlasitaj.

MUT : Ili ankoraŭ havas sian patron, el tio kiun Jakobo rakontis al mi, sed kiel trovi lin ? Mi eĉ nek povas scii sian nomon nek la lokon kie li loĝis kiam la ĝendarmoj forkondukis lin. Eble li estas en malliberejo aŭ en punlaborejo pri kelka grava eraro kiun li kulpis. Eble pli bone valoras por ili ne koni sian patron. Sed tamen necesas ke morgaŭ, antaŭ ol foriri, mi iru meti mian deklaron ĉe la urbodomo. Ni povus tra ĝi sukcesi scii kiu nomo ili ricevos. Se la urbestro venas pridemandi vin, vi diros la simplan veron. Mi lasos al vi mian adreson por ke vi povus sciigi al mi la novaĵojn en okazo de bezono.

BLD : Sed vi ne estos sen reveni por havi tion per vi mem, sinjoro Mutie, ĉar mi rigardas tiujn infanojn kiel restantajn sub via protekto kaj apartenantajn pli al vi ol al mi.

MUT : Mi estus tre embarasita se mi havus ilin, mia bona sinjorino Blidot. Ili estas pli bone metita ĉe vi, ol ĉe mi kiu havas nek hejmon nek aliajn vivrimedojn ol miajn ambaŭ brakojn. Sed jam malfruas. Mia tago komenciĝis antaŭ la tagiĝo, kaj mi ne bedaŭrus vidi la finon.

BLD : Kial vi ne diris tion pli frue ? Mi irigus vin al via

ĉambro kiu estas ĉi tie apude, ĉe la teretaĝo, rigardanta al la ĝardeno. Mia fratino kaj mi kuŝiĝas tie supre, estas pli sekura por du virinoj solaj. Ne ĉar la lando estas malbona, sed se iu malbona regato venas por terure brui...

MUT : Ke li do venu dum mi estas ĉi tie. Mi kaj Kapitano, ni konvene regalos lin kaj lerte, mi certigas al vi.

Sinjorino Blidot ridetis, ekbruligis kandelon kaj portis ĝin en la ĉambron preparitan por Mutie. Li dankis ŝin, salutis ŝin, fermis sian pordon, bruligis cigaron, fumis kelkan tempon, pensante, faris al si grandan signon de kruco, mallongan preĝon, enlitiĝis kaj ekdormis ĝis la morgaŭa mateno.

Ŝajnas ke li longtempe dormis ĉar, je sia vekigo, li aŭdis la babiladojn de infanoj kaj la gajan ridon de Elfia kaj de sinjorino Blidot. Honta pro sia longa dormo, li saltis el sia lito kaj komencis sin lavi.

- Bonan liton, li pensis; mi ne havis iun tiom bonan antaŭ longe, estas tio kio malfruigis min... Jen mi preta; rapide, ke mi iru helpi tiujn virinojn en ilia laboro.

Malfermante la pordon, li trovis sin antaŭ siaj du gastigantinoj kiuj purigis kaj pretigis ĉiu sian infanon.

MUT : Pardonu, mi bedaŭras, sinjorinoj, mi malfruas. Tio tamen ne estis mian kutimon en la regimento, sed la loĝejoj estas bonaj, tro bonaj, oni dormas tro bone en viaj litoj.

JAK : Saluton, sinjoro Mutie, ĉu vi bone dormis ?

MUT : Mi ja kredas tion ke mi dormis, tro bone, kiel vi vidas, mia knabo, tial ke mi malfruas. Vi ankaŭ ne havas malbonan mienon, vi, via lito estis pli bona ol tiu de la pasinta nokto, ĉu ?

JAK : Ho ! Kiel ĝi estis bona ! Paŭlo sentis sin tiom varma ! Li estis tiom feliĉa ! Li tiel bone dormis ! Mi estis tiel feliĉa, kaj mi estis tiom dankanta vin, mia bona sinjoro

Mutie !

MUT : Estas tiuj sinjorinoj ke necesas danki, mia infano, kaj ne mi kiu estas malbonŝanculo sen rifuĝejo.

JAK : Sed estas vi kiu savis nin en la arbaro, estas vi kiu venigis nin ĉi tien, estas vi kiu konfidis nin al sinjorino Blidot kaj fraŭlino Elfia. Ili diris al mi antaŭ momento ke estis la sankta Virgulino kaj vi kiuj estis niaj savantoj.

Mutie ne respondis; li brakumis Jakoboⁿ kaj Paŭloⁿ, kisis ilin plurfoje, donis manpremon al ĉiu el fratinoj kaj sidiĝis apud la tablon atendente ke la lavado de la infanoj finiĝis.

- Kion mi povas fari por helpi vin ? li demandis.

ELF : Ĉar vi estas tiel servema, sinjoro Mutie, iru serĉi por mi branĉfaskon ĉe la ŝtipejo funde de la ĝardeno, por bruligi mian fajron. Kaj poste ŝovelprenon da karbo por la forno. Mi atendente preparos la kafon.

BLD : Ĉu vi pensas tion, Elfia, ŝarĝi S^{ron} Mutie^{on} per tia tasko ?

MUT : Lasu, lasu, mia bona gastigantino ! Fraŭlino Elfia bone scias ke ŝi helpas min utiligante min por servi vin. Ĉu vi kredas ke mi neniam kunportis lignon aŭ karbon ? Mi faris multajn aliajn ĉe la regimento. Mi ne estas tia grandsinjoro, kiel vi pensas !

Mutie iris kurante kaj ne malfruis reveni kun grandega brakpleno de branĉfaskoj.

ELF : Ha, ha, ha ! Estas trioble tro. Lasu al mi ĉi tiujn branĉetojn kaj reportu la ceteron al la ŝtipejo irante preni la karbon.

BLD : Elfia ! Mi certigas vin ke vi estas tro aŭdaca !

ELF : Ne, ne; necesas ke li konvene lernas sian servon. Li ne pli bone petas, estas facile videbla. Sed li ne scias, tial necesas tion diri al li.

MUT : Dankon, fraŭlino Elfia, dankon. Mi vidas kiom vi estas bona kaj ke vi havas amikecon por mi.

"Vi bone aŭdas", diris triumfe Elfia dum Mutie reiris kun sia brakpleno da ligno. Sinjorino Blidot ridetis skuante la kapon...

BLD : Pensu do ke ni konas lin nur ekde hieraŭ kaj ke ni estas ĉe ni por servi la vojaĝantojn kaj ne por laborigi ilin.

ELF : Sed li ne estas vojaĝanto kiel iu alia. Li konfidis al ni ĉi tiujn infanojn kiuj estas tiel afablaj, kaj kiuj faros al ni vivon tiom gaja, tiom bona ! Estas donaco tio, kiu estas pagita de amikeco. Kaj mi, kiam mi amas homojn, mi laborigas ilin. Estas nenio kiun mi tiom malŝatas kiom homoj kiuj faras nenion, kiuj lasas vin peni sen nur proponi al vi la fingropinton por helpi vin.

- Kaj vi ja pravas, fraŭlino Elfia diris Mutie kiu aŭdis tion kion ŝi diris al sia fratino. Kaj estas vere ke mi ne estas vojaĝanto kiel alia, ĉar mi ŝuldas al vi dankemon pro la ŝarĝo kiun vi bonvolis akcepti. Kaj bone kedu ke mi ne havas sendankan karakteron.

ELF redetante : Mi bone komprenas tion, sinjoro Mutie, vi ne bezonis diri tion. Mi estas subtila, nu, mi divenas multe da aferoj.

Mutie siavice ridetis, sed li nenion diris, kaj prenante la balailon, li komencis balai la ĉambron.

ELF : Lasu tiun balailon, prenu la spongon kaj la viŝtukon. Kiam vi estos lavinta kaj viŝinta la tablon kaj la fornon, tiam vi balaos.

Mutie obeis laŭlitere. Kiam li finis : "Ĉu mia majoro estas kontentigita ? li diris salutante per militista gesto. Kion necesas fari poste ?"

- Tre bone, diris Elfia, post esti tranrigardinta. Nun iru serĉi por ni lakton ĉe la farmejo ĉi proksime, ĉe la elirejo de la vilaĝo. Mi estus tre dankema se vi kunkondukus la infanojn kun vi. Ili konos la vojon kaj ili kapablos iri serĉi nian lakton kiam vi estos foririnta.

Mutie prenis la manon de Jakobo, kiu jam tenis tiun de Paŭlo, kaj ĉiuj tri ekvojiris gaje, saltante kaj ridante.

- Lakton, bonvolu, diris Mutie al dika farmistino kiu filtris la nove melkitan lakton.

La farmistino turnis sin kaj mirigite rigardis tiun novan vizaĝon. "Po kiom ?" ŝi fine diris.

MUT : Vere, mi ne demandis. Sed donu kiel kutime : vi scias tiom kiom oni prenas al vi ĉiutage.

La farmistino : Tio estas por kiu ?

MUT : Por sinjorino Blidot, ĉe la Gardanĝelo.

La farmistino : Jen ! Vi do estas en ŝia servo ? Ekde kiam ?

MUT : En ŝia servo nune. Nur ekde hieraŭ.

- Tamen estas stranga, grumblis la farmistino donante tri mezurojn da lakto.

- Ĉu necesas pagi ? diris Mutie priserĉante en sia poŝo.

La farmistino : Sed ne. Vi bone scias ke ni kalkulas niajn kontojn ĉiujn mardojn, la bazartagon.

MUT : Mi ja scias nenion. Kiel mi scius tion, ekde hieraŭ ke mi estas en la lando ? Bonan tagon, sinjorino.

La farmistino kapsignis kaj rekomencis sian laboron, demandante al si kial sinjorino Blidot akceptis en sia servo, soldaton kiun ŝi tute ne bezonis.

Mutie foriris kun la infanoj kaj sia poto da lakto, ridante pro la mirego de la farmistino.

- Jen fraŭnjo, li diris revenante, mi vetas ke vi baldaŭ estos vizitita de la dika farmistino.

ELF : Kial tion ?

MUT : Estas ke ŝi aspektis tiom surprizita kiam mi diris al ŝi ke mi servis vin, ke ŝi certe venos al klarigadoj.

ELF : Kaj kial vi diris... tian aferon ? Ĉu oni iam vidis tiel elpensi ?

MUT : Kiel do fraŭnjo ? Sed estas la pura vero. Ĉu mi

ne servas vin, tute en via servo ?

ELF : Vi ĉagrenas min per viaj ridadoj kaj viaj vortludoj.

MUT : Tamen tio ne gravas, fraŭnjo Elfia. Mi ridas ĉar mi estas kontenta. Nu, tio ne okazas ofte al mi. Iu malriĉa soldato for de sia lando, sen patro nek patrino, kiu havas nenium korligon en tiu mondo, eble povas sin forgesi dum momento kaj senti sin feliĉa inspiri kelkan intereson kaj esti amikece traktita. Mi eble eraris. Mi maŝine faris malbonan ŝercon, bonvolu senkulpigi min, fraŭnjo. Pensu ke mi baldaŭ foriros kaj sendube dum longa tempo. Necesas ne tro rankori kontraŭ mi.

ELF : Estas mi kiu malpravas kvereli kun vin pro bagatelo, mia bona sinjoro Mutie, kaj estas al vi senkulpigi min. Estas ke, komprenu, estis tiom ridinde pensi ke mia fratino kaj mi, ni dungis vin ke mi timis ke oni moku nin.

MUT : Kaj vi iom pravas, fraŭnjo, ĉu vi volas ke mi reiros ĉe la farmistino, diri al ŝi...

BLD : Sed ne, sinjoro, ĉio estas nur infanaĵo de Elfia. Ŝi estas juna, vi komprenas, iom tro gaja laŭ mi, kaj ŝi misuzis vian komplezon.

MUT : Estas tio kion mi ne akceptas, sinjorino Blidot. Kaj kiel pruvo, mi denove metas min sub la ordono de fraŭlino Elfia kaj demandas al ŝi tion kion ŝi volas ke mi faru.

- Helpu min por fari la kafon, varmigi la lakton, diris Elfia duonridante, duonruĝiĝante.

La tagmanĝo baldaŭ estis preta, la infanoj malpacience atendis ĝin kaj bonapetite manĝis ĝin. Kiam ĝi estis finita, Mutie iris al la urbodomo, sinjorino Blidot kaj Elfia okupiĝis pri sia laboraĵo kaj la infanoj amuzis en la ĝardeno. La mateno rapide fluis. Mutie ankoraŭ tagmanĝis kun la infanoj kaj la du fratinoj, poste li pretiĝis por foriri. Li petis por pagi sian elspezaron, sed sinjorino Blidot neniam volis konsenti tion. Ili disiĝis amikece kaj bedaŭre. Jakobo ploris

kisante sian bonfaranton, Paŭlo viŝis la okulojn de Jakobo. ambaŭ ĉirkaŭprenis Kapitanoⁿ per iliaj braketoj.

- Adiaŭ, mia bona Kapitano, diris Jakobo, adiaŭ, mia bona hundo, ankaŭ vi savis nin en la arbaro, estas vi kiu unue vidis nin, estas vi kiu portis Paŭloⁿ sur via dorso. adiaŭ, mia amiko, adiaŭ, mi ne forgesos vin, ne pli ol mian bonan amikon S^{ron} Mutie^{on}.

Mutie estis kortuŝita kaj malĝoja. Li forte manpremis la du bonajn kaj bonegajn fratinojn, donis lastan kison al Jakobo, alĵetis lastan rigardon al la ĉambro de la Gardanĝelo kaj malproksimiĝis rapide sen nur unufoje turni la kapon.

La infanoj estis ĉe la pordo, rigardante sian novan amikon foriri kaj malaperi. Jakobo viŝis siajn okulojn. Kiam li ne plu vidis ion, li reiris en la ĉambron kaj sin ĵetis plorante en la brakojn de sinjorino Blidot.

- Nun ke S^{ro} Mutie estas foririta, vi ne elpelos nin, sinjorino, ĉu ne ? Vi ankoraŭ vartos mian karan Paŭloⁿ, kaj vi permesos min resti kun li.

BLD : Povra infano ! Ne, mi ne forpelos vin, mi ĉiam gardos vin; mi amos vin kvazaŭ vi estas miaj infanoj. Kaj por komenci, mi petas al vi, tiel kiel al Paŭlo, ne nomi min sinjorinon, sed panjon.

JAK : Ho jes ! Vi estos nia panjo, kiel kompatinda panjo kiu mortis kaj kiu estis tre bona. Paŭlo, vi neniam plu diros sinjorinon al sinjorino Blidot, sed panjo.

PAŬ : Ne, ne volas; volas iri kun Kapitano kaj Mutie.

JAK : Sed ĉar ili estas foriritaj !

PAŬ : Ne gravas : Venu konduki min al Kapitano.

JAK : Ĉu do vi ne amas panjon Blidot^{on} ?

PAŬ : Mi amas, sed mi pli amas Kapitanoⁿ.

ELF : Lasu lin, Jakĉjo mia. Li iom post iom kutimiĝos; li amos nin tiom kiom li amas Kapitanoⁿ, kaj li nomos mian fratinton panjon kaj mi, onklino mia. Vi ankaŭ, mi estas via

onklino.

- Jes, onklino mia, diris Jakobo kisante ŝin.

Jakobo, trankvila pri la sorto de Paŭlo, sin allasis al sia tuta gajeco. Li imagis por okupi sian fraton, amason da amuzaj ludoj per malgrandaj ŝtonoj, lignaj pecetoj, paperĉifaĵoj. Li mem provis esti helpema al sinjoro Blidot kaj al Elfia farante iliajn aĉetojn, lavante la vazaron, servante la vojaĝantojn. Ĉirkaŭ la vespero, li proksimiĝis al sinjorino Blidot, kaj diris al ŝi kun iom da ĝeno : "Panjo, vi promesis al S^{ro} Mutie doni iom da manĝaĵo al kompatinda Netaviŝtuko. Mi vidis lin antaŭ momento, li kuris kun dika pano sub la brako, li faris signon al mi ke li estis venonta, por ĉerpi akvon el la puto. Ĉu vi bonvolas doni al mi ion por ke mi portu tion al li en la kava trunko ?"

BLD : Jes, mia amiko. Jen resto da viando kaj peco da pano. Iru meti ĝin en la kavon de la arbo. Kaj, pro timo ke mi ekde nun ne plu forgesus ĝin, rememorigu tion al mi ĉiutage dum tagmanĝo; ni faros la parton de la eta kompatindulo.

JAK : Dankon, panjo, vi estas tiel bona kiel S^{ro} Mutie.

Kaj Jakobo kunprenis liajn proviantojn kiujn li iris meti en la arbon de la puto. Li baldaŭ vidis Netaviŝtukoⁿ alveni kun lia kruĉo. Li paŝis malrapide, kaj vorante la panon kaj viandon de sinjorino Blidot viŝis al si la okulojn. Li trinkis akvon el la kruĉo, malgaje salutis Jakoboⁿ kaj Paŭloⁿ kiuj rigardis lin de la pordosoĵlo, kaj revojiris al sia gastejo.

La tagoj tiel fluis, feliĉaj por Jakobo kaj por ĉiuj loĝantoj de la Gardanĝelo, malgajaj kaj kruelaj por la malbonsorta Netaviŝtuko kiun lia mastro malbone traktis senĉese. Multfoje Jakobo kaŝe helpis lin plenumi la ordonojn kiujn li ricevis kaj kiuj superis liajn fortojn. Jen estis tro peza objekto por alporti for, tiam Jakobo kaj Paŭlo kuniĝis kun li ĉe la eliro de la vilaĝo kaj helpis lin alporti lian ŝarĝon.

Jen estis longa trabutikado por plenumi je la tagfino, kiam la laceco de senĉesa laboro igis lin nekapabla realigi longan paŝadon. Jakobo tiam ricevis de sinjorino Blidot la permeson trabutiki por Netaviŝtuko, dum tiu ĉi ripozis ĉe la piedo de arbo kaj manĝis la proviantojn kiujn sendis al li sinjorino Blidot.

06 Surprizo kaj feliĉo.

Estis tri jaroj ke S^{ino} Blidot kaj sia fratino havis la etajn orfojn. Ili ĉiutage pli korligiĝis al ilin, kaj ili fariĝis pli kaj pli afablaj kaj ĉarmaj. La tenereco de Jakobo por sia frato vekis la intereson de ĉiuj kiuj estis vidintoj de tio. Paŭlo amis sian fraton per la sama korinklino. Ambaŭ estis tenere korligitaj al sinjorino Blidot kaj al Elfia. Ĉiuj ofte parolis kun amikeco kaj dankemo de la bona S^{ro} Mutie, de longe oni ne plu havis novaĵojn pri li. Dum la unuaj monatoj, li estis dufoje reveninta por viziti kun Kapitano dum kelkaj tagoj ĉe la Gardanĝelo. Li plurfoje skribis por informiĝi pri tio kio okazis tie. Sinjorino Blidot ĝuste kaj abunde respondis al li, ŝi sciigis ke li forlasis la landon por soldatiĝi, ŝi ne konis aliajn detalojn. Dum tiu longedaŭra silento, la Krimea milito okazis. Ĝi finiĝis kiel ĝi komenciĝis, kun multe da gloro kaj da laŭroj. Sed sennombraj funebroj estis la necesa konsekvenco de tiuj eterne famaj venkoj. En la vilaĝo de la Gardanĝelo, pli ol unu familio ploris pri iu filo, frato, amiko. Kelkaj revenis kun iu kruro aŭ brako malpli, aŭ vundoj kiuj igis ilin nekapablaj daŭrigi ilian servon.

Iun matenon, Jakobo kaj Paŭlo balais la antaŭaĵon de la pordo de la Gardanĝelo. Sinjorino Blidot kaj Elfia preparis la tagmanĝon kiam iu viro, kiu senbrue alproksimiĝis, dolĉe haltigis la balailon de Paŭlo. Tiu ĉi turnis sin kaj komencis krii :

- Jacobo, helpon ! Oni ekprenas mian balailon.

Jacobo eksaltis al sia frato por vigle defendi li kiam rigardo ekĵetita al la kvazaŭa ŝtelisto igis lin forlasi sian balailon; li ĵetegis sin en la brakojn de la viro kriante :

- Panjo ! Onklino mia ! S^{ro} Mutie, nia bona S^{ro} Mutie !

SinJORINO Blidot kaj Elfia tuj aperis kaj trovis sin antaŭ Mutie kiu lasis Jakoboⁿ kaj Paŭloⁿ por doni amikan saluton al siaj du amikinoj. Estis ĝojega momento. Ĉiuj samtempe parolis kaj metis mil demandojn sen doni tempon por respondi. Finfine, Mutie sukcesis komprenigi kial li ne plu donis siajn novaĵojn.

- Iom da tempo post mia rehejmiĝo, bonaj gastigantinoj miaj, mi ekaŭdis ke kuris onidiro pri milito kun Rusio. Mi neniam renkontiĝis kun la rusoj ĉar ni vivis en paco kun ili. Mi sciis ke ili bone batalis, ke ili estis bravaj soldatoj. Mi jam plenumis mian servon, fakte sed... soldato ĉiam restas soldato. Mi havis ion en la koro kiu puŝis min rekuniĝi kun miaj malnovaj kamaradoj. Kiam la milito estis deklarita, mi resoldatiĝis por du jaroj ĉe la zuavoj, kaj foriris. Ekde tiu tago, neblas skribi. Ĉiam en kampanjo. Kaj kia kampanjo! Tuj post la elŝipiĝo en **Kalipoliso**, ĥolero kiu preskaŭ forprenis min. Apenaŭ resaniĝinta, marŝadojn, retromarŝadojn, invado en **Krimeo**, batalo en **Almo** kiel oni neniam vidis, ni ĉiuj senpretende batalis kiel leonoj. Mi ne parolas pri la angloj kiuj, laŭ ilia kutimo, malfruiĝis ĉar ilia rostbefo kaj pudingo estis ne kuiritaj. Sed ni ja, ni faris tion kion neniu popoloj en la mondo kapablos refari. Ni grimpis apikajn ŝtonblokojn sub hajlo da kugloj kaj mitrajlo. Ni forpelis la Rusojn el la altebenaĵo kie ili tre trankvile instaligiĝis. Tiuj kompatinduloj! Ha! Mi ankoraŭ ridas pri tio! Vidante nin grimpi tiujn rokavandojn kaj supreniri, ĉiam supreniri, ili rigardis nin kiel diablojn, kaj post interŝanĝo de senesperaj batoj, ili fuĝis kaj kuris tiel rapide ke pli ol la duono eskapis. Ilia generalo, la princo Menĉikof, kiu ĉeestis por vidi kiel oni faligus nin de supre la rokoj, estis preskaŭ kaptita. Li forkuris lasante sian veturilon, siajn vestaĵojn, siajn rajtigilojn kaj ĉiun. - Poste, venis la sieĝo de **Sebastopolo**. Bela afero, vere. Grandaj bataloj! Bone

atakita, bone defendita. En **Inkermano**, ĉe la angla bivako, la Rusoj draŝis ilin kaj mortigis ĝis ne ebleco kiel en **Balaklavo**. Sed ni alkuris, ni ja francoj, kaj ni faris niavice kaĉon de tiuj kompatindaj Rusoj kiuj batalis kiel leonoj, ne estas por riproĉi al ili, sed la rimedo por elteni antaŭ Francoj bone regita ! Mi forviŝas la detalojn de la sieĝo kiu estis belega kaj terura, kaj mi alvenas en **Malakofon**, iu el tiuj viglaj bataloj kie ĉiu soldato estas heroo, kaj kie ĉiu meritis la krucon kaj gradon. Tie mi trafiĝis per du kugloj, unu en la maldekstra brako kiu restis iom rigida, kaj unu tra la korpo kiu preskaŭ forprenis min kaj kiu liberigis min de la militservo. Tuj resaniĝinta, tuj foririnta, kun la ideo fari rekonon ĉe la flanko de la Gardanĝelo. Estas ke mi neniun forgesis ĉi tie, nek la kompatindajn infanojn, nek la bonajn kaj karajn gastigantinojn. Mi estis certa trovi bonan akcepton, mi pensis ke mi povis bone veni dum kelkaj tagoj meti min ĉe la servo de fraŭlino Elfia kiu tiom bone kapablas komandi.

Mutie ridetis dirante tiujn vortojn, sinjorino Blidot ridis tre sincere. Elfia ruĝiĝis.

ELF : Kiel, sinjoro Mutie ! Vi ne forgesis miajn malsaĝaĵojn de antaŭ tri jaroj ? Mi estas malpli malsaĝa ol mi estis, kaj mi ne permesus al mi komandi vin kiel mi tiam faris tion, kiam mi estis nur deksepaĝa.

MUT : Domaĝe, Fraŭnjo, necesos ke mi divenos, kaj mi kapablos fari malsaĝaĵojn kredante bonfari. Koncerne forgesi, mi nenion en tiom mallonga daŭro forgesis pri tio kio koncernas la malmultajn tagojn kiujn mi travivis ĉe vi, neniun vorton, neniun geston, ĉio restis stampita tie, li aldonis montrante sian koron. Kaj vi, mia povra Jakĉjo, vi rapide rekonis min, vi ne hezitis eĉ minuton.

JAK : Kiel mi ne estus rekonanta vin ? Mi ĉiam pensis pri vi, mi ĉiutage kisis vin en mia koro, kaj ĉiam mi preĝis por

vi; ĉar S^{ro} la preposto instruis al mi preĝi kaj mi instruis tion al Paŭlo.

MUT : Kaj ankaŭ mi, knabo mia, mi lernis preĝi kiel mi neniam faris antaŭe, tio kio pruvas ke oni lernas ĝismorte kaj ĉie. Estis bona patro Parabero, iu jezuito, kiu montris al mi kiel oni vivas laŭ bona kristano. Fama jezuito tiu patro Parabero ! Kuraĝa kiel Zuavo, bona kaj tenera kiel fratino de karitato, pia kiel sanktulo, nelacigebla kiel iu Herkulo.

JAK : Kie li estas tiu ĉi bona patro ? Mi ja ŝatus vidi lin aŭ skribi al li.

MUT kortuŝita : Parolu al li, mia amiko; li aŭdos vin, ĉar li estas apud la bona Dio.

- Kion vi havas tie ? diris Paŭlo kiu estis apud Mutie kaj kiu ludis kun lia honorkruco.

MUT : Estas iu kruco kiun mi gajnis en Malakofa.

ELF : Kaj vi ne diris tion al ni ! Tamen certe vi vere meritis ĝin.

MUT : Dio mia, Fraŭnjo, ne pli ol miaj aliaj kamaradoj. Ili faris tiom kiom mi, nur ili ne estis bonŝancaj kiel mi.

ELF : Sed por ke vi ricevis la krucon, necesas ke vi faris ion pli ol la aliaj.

MUT : Pli, ne, sed jen ! Estas ke mi estis bonŝanca alporti al la bivako iun flagon kaj iun generalon.

ELF : Kiel iun generalon ?

MUT : Jes; iu kompatinda maljuna rusa generalo vundita kiu ne kapablis sin tiri el la kadavroj kaj la disrompitaĵoj de Malakofa. Mi sukcesis eltiri lin el tio kiam la fortikaĵo ĵus eksplodis, kaj mi kunportis lin en la flago kiun mi prenis. Kunirante, kiam mi alproksimiĝis al la niaj, iu terura kuglo lokiĝis en mian brakon. Estis nenio, mi povis ankoraŭ paŝi, kiam alia kuglo trairis mian korpon. Ĉifoje mi falis, konfidante min kaj mian vunditon al la sancta Virgulino kaj al la bona Dio. Oni retrovis nin. Mi ne scias tion kion diris tiu

generalo kiam li kapablis paroli, sed ĉiaokaze, mi ricevis la krucon kaj mi estis enskribita en la tagordo. Estas la plej bela pri mia afero, mi konfesas ke mi sentis momenton de gloreteco, sed tio ne daŭris, dankon al Dio.

BLD : Vi estas modesta, sinjoro Mutie, alia trumpetus laŭtege tion kion vi penas malpliigi.

PAŬ : Panjo, mi malsatas, mi ŝatus tagmanĝi.

MUT stariĝante : Estas mi kiu malfruigis vin, kiu malordigis vian servadon. Fraŭnjo Elfia, jen, mi estas preta servi vin, mi atendas ordonojn.

ELF : Mi ne havas ordonon por doni al vi, sinjoro Mutie. Lasu vin servi de ni, tio estas tio kion mi petas al vi. Jakobo surmetu rapide la manĝilaron por via amiko.

Jakobo volontege akceptis. En tri minutoj, la manĝilaro estis surmetita. Dum tiu tempo, Mutie stranĉis panon, transversis cidron de la kelo, metis supron en la supujo kaj la raguon de viando en pladon. Oni altablighis. Jakobo petis sidiĝi apud Mutie, Paŭlo prenis sian kutiman lokon apud sia frato.

- Jen kiel vi kreskis, mia amiko ! diris Mutie karesante amike la kapon de Jakobo. Kaj Paŭlo ! Jen li, granda kiel vi tiam estis la unuan fojon kiam mi vidis vin.

ELF : Kaj li estas tiel saĝa kiel Jakobo, tio estas dirita sen troigo. Li jam legas flue, kaj komencas skribi.

MUT : Kaj vi, Jakobo ? Kiom da progreso vi faris pri via lernado ?

JAK : Ho ! Mi estas pli aĝa ol Paŭlo, mi devas scii pli ol li. Mi vidigos al vi miajn kajerojn.

MUT : Ho, ho ! miajn kajerojn ! Vi do estas tre instruita ?

JAK : Mi faras mian plejbonon, la instruisto diras ke mi bone laboras. Mi ĉiam provas.

MUT : Bona knabo ! Ja ! Vi estas modesta, mi vidas

tion.

PAŬ : Sinjoro Mutie, ĉu vi ankoraŭ estas soldato ?

MUT : Mi estas serĝento, knabo mia.

ELF : Kaj vi ne diris tion al ni ! Kiam vi estis promociita serĝenton ?

MUT : Post Inkermano ! Mi ĉiam estis bonŝanca ! Post Almo, kaporalon, poste serĝenton, poste la medalon, poste la krucon.

JAK : Rakontu al ni tion kion vi faris por akiri ĉion ĉi, mia bona sinjoro Mutie.

MUT : Dio mia, mi faris kiel la aliaj. Nur en Almo, mi havis la feliĉon savi mian pafvunditan kolonelon. Mi renkontis grupon da rusoj kiu venkis. Mi sabris, enpikis, mi tiom baraktis ke mi mortigis, vundis ilin. La aliaj foriris kuregante kaj kriante "Ĉiorte ! Ĉiorte !", tio kio signifas : "La diablo ! La diablo !".

BLD : Kaj poste, pri la cetero ?

MUT : Nu, post Inkermano, ili nomumis min serĝenton ĉar ili diris ke mi plenumis la laboron de dek kaj ke mi liberigis kanonon kiun la Rusoj najlis^[1], iun anglan kanonon ! Bela merito ! Ĝi ne valoris la dekduon da kompatinduloj kiun mi ekstermis por reakiri ĝin. Sed, finfine, estas tiel, mi tamen iĝis serĝento.

ELF : Kaj la medalon ?

MUT : Vi nenion forgesas, Fraŭnjo Elfia ! La medalo, estas en **Traktiro**, pro esti faliginta kelkajn Rusojn en la rivereton suben. Niaj knabegoj estis perdintaj siajn leŭtenanton, estas mi kiu prenis la komandon ĝuste je la taŭga momento. Denove kaj denove la bonsorto ! Sed... kio okazas, Fraŭnjo Elfia ? Vi havas la okulojn plenajn de larmoj. ĉu mi ĉagrenintus vin sen voli tion ?

ELF : Ne, mia kara sinjoro Mutie, estas via humileco kiu

1 Difekti kanonon enŝovante najlon en ĝian prajmotruon.

emocias min. Tiel kuraĝa kaj tiel modesta ! Ne zorgu, tio finiĝos, estas la unua momento.

La konversacio iom malvigligis la tagmanĝon kiu tamen progresis. La infanoj avide aŭskultis la rakontojn de Mutie. Kiam ni estis trinkantaj la kafon, Jakobo demandis al li kio fariĝis la mallibera generalo.

MUT : Ni kune alvenis, ambaŭ tre malsanaj. Li havis kiel mi, la korpon trapafita de kuglo kaj ankoraŭ aliajn vundojn. Li estas bravulo kiu neniam volis forlasi min. Ni iris en la malsanulejon de Marsejlo, li volis ke oni metis min apud li en privata ĉambro, kaj, por komplete resanigi nin, oni ordonis nin al la kuracbanejo de **Bagnolo**. Ni alvenis en Parizo kie la generalo devis pasloĝi. Li volis konduki min al la kuracbanejo por evitigi al mi la piedvojaĝon laŭ etapoj, sed mi rakontis al li mian historion, kaj mi diris al li ke mi nepre volis revidi miajn infanojn... kaj ankaŭ... miajn bonajn amikinojn... Diable ! Mi ja povas nomi vin miajn bonajn amikinojn, ĉar vi zorgas tiujn infanojn kaj ke mi havas neniun en la mondo ol vi kiuj amis min, kaj ke mi ricevis feliĉon nur ĉe vi, apud vi, kaj ke, se ne estus konveneco kaj neceseco fari al mi estonton, mi ne plu moviĝus de ĉi tie, kaj ke mi fariĝus via servisto, via defendisto, ĉiu kiun vi volus.

GST ridetante : Ho ! Mi unue ja ne malpermesas al vi trakti nin per amikeco, ĉar ni vere amas vin kaj ni estas tre feliĉaj revidi vin ! Ĉu ne, Elfia ?

ELF : Estas la vero, mia kara sinjoro Mutie; ni tre ofte parolis pri vi kaj deziris vian revenon.

MUT : Dankon, miaj bonaj amikinoj, dankon. Sed estas iu kiun mi forgesas en mia ĝojo retroviĝi ĉi tie. Kio fariĝas la povra Netaviŝtuko ?

JAK : Ankoraŭ tre malfeliĉa, tre mizera ! Ekde tri tagoj mi ne vidis lin, eble estas ĉar li havas pli por labori. Venis tiujn ĉi tagojn iu viro ĉe la gastejo de Netaviŝtuko, iu

bela sinjoro en bela aŭto. Li reiris hieraŭ kun sia bela aŭto. Tio kio estas amuza, estas ke tiu sinjoro ne unufoje eliris el la gastejo, verŝajne Netaviŝtuko estis okupita de li ene.

MUT : Ni iros esplorigardi ĉe tiu flanko, sed necesos lerte plenumi tion, je la noktiĝo, tiel ke la malamiko ne surprizu nin.

JAK : La gastejestro ne ankoraŭ revenis, restas nur lia edzino.

PAŬ : Kaj la bona Kapitano, kio okazis al ĝi ?

MUT : Kapitano brave mortis dum la sieĝo de Sebastopolo, la kapo forhakita de kuglego, gardostarante kun mi sub dudek gradoj de frostoj.

JAK : Kompatinda Kapitano ! Mi vere esperis revidi ĝin.

07 Iu amiko savita.

La posttagmezo fluis en konversacioj kaj promenoj, sed ni evitis iri flanke de la gastejo Burniero. Estis nur post la vespermanĝo, kiam komencis noktiĝi, ke Mutie, akompanata de Jakobo, sin direktis al tiu flanko por provi havi novaĵojn pri la kompatinda Netaviŝtuko. Ili sekvis grandan ĉirkaŭvojon por alveni al la malantaŭaĵoj de la gastejo. Mutie paŝis, gvidata de Jakobo, en la padoj kaj la plej senhomaj vojetoj. Ili tiel alvenis ĝis la konstruaĵoj kiuj estis uzataj kiel servistarejo. Ĉio estis malluma kaj silenta, la pordoj estis fermitaj. Neniu rimedo por penetri enen. Iu malfermita hangaro permesis al ili alpaŝi. Ili estis tie de kelkaj momentoj, serĉante manieron alveni ĝis Netaviŝtukoⁿ, kiam malantaŭa pordo malfermiĝis. Iu viro senbrue eliris el tio, Mutie rekonis la gastejestrinon, apenaŭ lumigata de la ŝtellanterno kiun li tenis per la mano. Li sin direktis al la karbejo, apartigita de la hangaro per vando el tabuloj, li singardeme malfermis ĝian pordon kaj eniris.

- Jen via vespermanĝo kiun mi alportas al vi, li diris per raspa voĉo, sed mallaŭta. La fremdulo foriris, morgaŭ vi rekomencos vian laboron, kaj se vi havas malbonan ideon paroli unu vorton pri tio kion vi vidis kaj aŭdis, diri al iu ajn kiel vi estis enŝlosita ĉi tie dum la fremdulo estis en la gastejo, mi rompos al vi la ostojn, kaj bruligos vin per malvigla fajro... ĉu vi aŭdas tion kion mi diras al vi, bruto ?

- Jes, sinjoro, respondis la tremanta voĉo de Netaviŝtuko.

La gastejestrino eliris, refermis la pordon kaj eniris en la domon.

Kiam Mutie estis tute certa ke oni ne povas aŭdi lin, li

alproksimiĝis al la vando kaj diris al Jakobo mallaŭte alvoki Netaviŝtukoⁿ.

- Netaviŝtuko, mia povra Netaviŝtuko, diris Jakobo, kial vi estas enŝlosita en tiu nigra loko ?

NTV : Ĉu estas vi, mia bona Jakobo ? Kiel vi sciis ke tiu kruelulo enŝlosis min ? Mi ne scias kial li metis min ĉi tie.

JAK : Ekde kiam vi estas tie ?

NTV : Ekde la tago kiam alvenis bela sinjoro, en bela aŭto, kun kofreto plene da aferoj el oro. Li kompatis al mi, li diris al mia mastro ke mi ŝajnis malsana kaj malfeliĉa. Li proponis al li doni monon por loki min aliloken; mia mastro rifuzis. Tiam, tiu bona sinjoro donis al mi oran moneron dirante al mi iri aĉeti por li tabakon por unu franko kaj teni la reston por mi. Mia mastro sekvis min, forŝiris de mi la oran moneron antaŭ ol mi havus nur tempon eliri en la straton. Mi volis kriegi, li kaptis min ĉe la kolo, kuntiris min en ĉi tiun karbejon kaj ĵetis min enen dirante al mi ke, se mi alvokis, li mortigus min. Li ĉiuvespere alportas al mi panpecon kaj kruĉon da akvo.

MUT : Kompatinda knabo !

La voĉo de Mutie ekstremigis Netaviŝtukoⁿ.

NTV : Dio mia ! Dio mia ! Estas iu kun vi, Jakobo ! Mia mastro scios tion; li diros ke mi parolis, kaj li mortigos min.

MUT : Estu trankvila, kompatinda infano ! Estas mi kiu helpis vin, antaŭ tri jaroj, por porti vian sakon da karbo. Mi estas la amiko, la patro de Jakobo, kaj mi ne perfidos vin. Kiam la viro foriris ?

NTV : La mastro diras ke li estas foririnta, sed mi ne kredas ĉar mi aŭdis tiuvespere la voĉon de la sinjoro kiu parolis laŭtege poste mian mastron kiu sakris, kaj poste multe da bruo kiel oni interbatalis, kaj poste la fraton kaj la edzinon de mia mastro kiu parolis tre laŭte kaj poste nenio sekvis, kaj li venis alporti al mi mian panon.

Mutie tremetis pro indigno. Ĉu ili faris krimon ? li demandis al si, aŭ ĉu ili prepariĝis por fari tion ? Kiel agi por malhelpi tion, se ne jam estas tro malfrue ? Ĉio estas fermita... Ne eblas eniri sen brui... Ne estas ĉar mi timas ilin ! Per mia alĝeria ponardo kaj miaj poŝpistojoj, mi finvenkus facile ilin. Sed se la kompatinda fremdulo ankoraŭ vivas, ili mortigos lin antaŭ ol mi kapablas rompi pordon kaj eniri en tiun kavernon de rabisto. Bona Dio inspiru min kaj venu helpe al mi ! Ĉiu malfrua minuto povas kaŭzi morton de la fremdulo.

Mutie enpeniĝis dum momento kaj diris al Jakobo : "Reiru hejmen, infano mia, vi ĝenus min al tio kion mi estas farenda".

JAK : Mi ne forlasos vin, mia bona amiko. Mi kredas ke vi volas vidi ĉu estas io timinda por la fremdulo, kaj mi volas resti apud vi por helpi vin.

MUT : Anstataŭ helpi min, vi ĝenus min, knabo mia. Foriru, mi volas tion... ĉu vi aŭdas ? Mi ordonas tion al vi.

Tiuj ĉi lastaj vortoj estis flustre dirataj kiel la resto, sed per tono kiu ne permesis rebaton. Jakobo kisis al li manon kaj foriris. Apenaŭ li estis sufiĉe for por ke oni ne plu aŭdis liajn paŝojn, ĝuste kiam Mutie estis forlasonta la malluman hangaron kiu ŝirmis lin, la pordo de la gastejo ankoraŭfoje malfermiĝis, la gastejestro Burniero ŝtelpaŝe eliris, aŭskultis, kaj turnante sin, mallaŭte diris : "Neniu ! neniu bruo ! Ni rapidu, la luno tuj leviĝos, kaj nia afero malsukcesus".

Li eniris, lasante la pordon malfermitan. Mutie enŝoviĝis post li, sekvis lin, kaj haltis antaŭ ĉambro en kiun la gastejestro eniris. Malforta lumo lumigis tiun ĉi ĉambron; viro kuŝis sur la planko, streĉe ligita kaj buŝŝtopita. La frato kaj la edzino de Burniero levis lin per la ŝultroj, la gastejestro prenis la krurojn, kaj ĉiuj tri preparis sin por

ekpaŝi kiam Mutie sin ĵetis al ili, kaj rompis la femuron de la gastejestro per pistolpafo, frakasis la kranion de la frato per la tenilo de ĉi tiu pistolo, kaj renversis la virinon per pugnobato sur la kapo. Ĉiuj tri falis, la gastejestro sole eligis krion falante. Mutie rulis lin en angulon, sen konsideri liajn kriadojn, tranĉis per sia ponardo la ŝnurojn kiuj ligis la malfeliĉan fremdulon, detiris la poŝtukon kiu sufokis lin, streĉe ligis la gastejestrinon, kuris al la enira ĉambro, malfermis la pordon kiu rigardis al la strato kaj pafis supren pistolpafon kriante : "Ŝtel ! Murdisto !"

Dekduo da pordoj malfermiĝis, teruritaj kapoj aperis.

"Tie ĉi, ĉe la gastejon ! kriis Mutie. Rapide alvenu; ne plu estas danĝeron".

Tiu certigo donis kuraĝon al la plej aŭdacaj. Kelkaj viroj armitaj de tranĉiloj kaj bastonoj sin direktis, ne sen tremi, al la gastejo. Ili eniris heziteme en la ĉambron kaj grupiĝis apud la pordo, ne kuraĝante antaŭeniri pro necerteco pri la danĝeroj kiujn ili povis ankoraŭ riski kaj en la nesciado de la eventoj kiuj okazis.

Dum ili hezitis kaj diskutis, Elfia hastege eniris; ŝi aŭdis la pistolpafon, la vokon de Mutie, kaj alkuris alvokante la vilaĝanojn por helpi lin, tiel kiel Jakoboⁿ kiun ŝi kredis ankoraŭ kun Mutie.

ELF : Kio okazas ĉi tie ? Kial vi restas en la ĉambro ? Kie estas S^{ro} Mutie ? Kial vi ne eniras en la ĉambraron ?

Bravulo : Estas ke, komprenu fraŭlino Elfia, ni ne scias tion kio povas okazi, ne estas prudente iri tro antaŭen sen scii kun kiu ni traktas. Tiu Burniero estas malbona marĝenulo ! Ni ne ŝatas instigi kverelojn kun tiaj homoj.

ELF : Kaj eble vi lasas tranĉi la gorĝon de iu pro timo ricevi baton aŭ havigi al vi malamikon ? Mi, virino, mi havus pli da kuraĝo ol vi.

Elfia, eltirante tranĉilon el manoj de iu el la hezitag

timemuloj, rapidigis al la ĉambroj kiuj troviĝis apud la enirhalo alvokante : "Sinjoro Mutie kie vi estas ? Kie estas Jakobo ? Kio okazis al vi ? Ni venas helpi vin !" Ŝi ne malfruis por eniri en la ĉambron kie la gastejestro kuŝis streĉe ligita, la frato donanta neniun signon de vivo, la virino sveninta. Mutie ĵetis akvon sur la sangantan vizaĝon de la fremdulo kiu restis sur la planko. Li nesciis ĉu estis neniu gravaj vundoj kaj ĉu la sango kies li estis la vizaĝon inunditan, devenis de vundo aŭ de forta nazsangado. Je la voĉo de Elfia, li restariĝis kaj, irante al ŝi : "Mia bona, mia kara Elfia, mi bedaŭras vidi vin ĉi tie. Ne restu, mi petegas vin. Sendu al mi homojn. Kial vi venis ?

ELF : Mi aŭdis la pistolpafon kaj vian voĉon, mi timis ke okazis al vi malfeliĉaĵon, kaj mi alkuris. Ili estas tie en la enirhalo, dekduo da viroj, sed ili ne kuraĝas eniri, do mi venis.

- Sen konsideri la danĝeron ! Mi ne forgesos tion, Elfia ! diris Mutie tutkore premante al ŝi la manojn. Ne, neniam !... Sed ĉar vi estas ĉi tie, alvoku al mi homojn; necesas trakti tiujn friponojn, iru venigi la ĝendarmojn kaj eltiri el ĉi tie tiun malfeliĉan sinjoron kiun ili volis mortigi por sendube ŝteli lin. Mi sendis Jakoboⁿ al vi antaŭ eniri.

Elfia, sen meti demandojn, reiris al la enirhalo, koncize diris al la viroj tion kion Mutie petis al ili, kaj hastege reiris al la Gardanĝelo por trankviligi sian fratinton kiu estis restinta kun Paŭlo. Elfia renkontis ĉe la pordo de la gastejo de Burniero, la malgrandan Jakoboⁿ kiu ankaŭ alkuris tute timigita. Li aŭdis la pistolpafon, kaj li hastis alveni por helpi sian amikon. Li estis malfruigita pro la pli longa vojo kiun li devis preni por reveni al la vilaĝo. Elfia klarigis al li per malmulte da vortoj tion kio ĵus okazis, kaj revenigis lin kun ŝi, pensante ke li pli malhelpus Mutie^{on} ol li servus lin.

La viroj kiujn Elfia trovis tremetantaj en la enirhalo de

la gastejo disvolvis heroan kuraĝon, tuj kiam ili eksciis de Elfia kia estis la nuna stato de la aferoj kaj la helpan specon kiun petis Mutie. Ili ĵetis sin brue en la ĉambron kie kuŝis la vunditoj, kaj diligentis proponi al la venkinto la helpon de siajn brakojn por teren ĵeti liajn malamikojn.

MUT : Pri tio, sinjoroj, mi ne lasis al vi laboron, jen ili ĉiuj surplanke; sed necesas ke vi helpu min loĝigi ilin, ŝtatpage, en la malliberejon de la plej proksima urbo. Mi estas ĉi tie nur pasante; mi konas neniun. Kaj poste vi bonvolos, kelkajn el vi, helpi min por transporti la malfeliĉan fremdulon al kiu ili volis tranĉi la gorĝon, kaj kiu ne ankoraŭ rekonsciiĝis. Por tiu estas kuracisto kiun necesos kaj bonajn prizorgojn.

La bravaj loĝantoj metis sin sub la dispono de Mutie, kies la arma vesto, la kruco kaj la serĝentaj galonoj emigis ilin al respekto. Li ekspedis du el ili al la urbo por postuli la ĝendarmojn; li donis al kvar aliaj la gardadon de la kanajloj, kun la nepra ordono streĉe ligi la virinon kaj ŝian fraton. Li sendis unu el ili demandi al sinjorino Blidot ĉu ŝi povus akcepti la fremdulon, kaj li konservis la aliajn por helpi sin elsvenigi la vunditon kaj iri liberigi Netaviŝtukoⁿ kies li montris la malliberejon. Sinjorino Blidot ne atendigis la respondon.

- Ĉio kion vi volos kaj kiam vi volos, sinjorino Blidot dirigis al vi, sinjoro serĝento. Ĉio estos preta por gastigi vian sinjoron.

Mutie metis matracon surplanken, kuŝigis sur ĝin la fremdulon. Helpita de tri fortikaj viroj, li tiel kunportis kaj demetis lin ĉe sinjorino Blidot en la ĉambron kaj sur la liton kiun ŝi indikis al ili. Ŝi helpis Mutie^{on} formeti liajn vestaĵojn, lavi la koaguligitan sangon el lia vizaĝo kaj kiu igis lin nere koneblan. Kiam li estis bone purigita, Mutie rigardis lin; li eligis miran ekkriion.

- Kiu ŝanco, bona sinjorino Blidot mia ! Ĉu vi scias kiu mi ĵus savis el la tranĉilo de tiuj friponoj ? Mian kompatindan malliberulan generalon ! Estas li ! Kiel diable li enŝoviĝis tie ? Jen li kiu malfermas la okulojn; li baldaŭ tute elsveniĝos.

Efektive, la generalo rekonsciiĝis, rigardis ĉirkaŭ si, strebis konantiĝi; li ekzamenis sinjorinon Blidot^{on}. Li ne ankoraŭ vidis Mutie^{on} kiu kaŝis sin malantaŭ la kurteno de la lito. Sed kiam la generalo demandis "Kie mi estas ? Kio okazis ?", Mutie vidigis sin kaj, prenante al li la manon : "Vi estas ci tie ĉe miaj bonaj amikinoj, mia generalo. La kanajlo, ĉe kiu vi engastiĝis havas la femuron rompita, lia frato havas la kranion frakasita, kaj la virino ricevis baton de klabo de kiu restos al ŝi ion se ŝi elsveniĝos.

La GeNeRalo : Kiel ! Ankoraŭ vi, mia brava Mutie ? Estas por vi, ke mi venis meti la manon en tiun vesponeston^[2], kaj estas vi kiu eltiras min el ĝi, kiu ankoraŭfoje estas mia brava savanto ?

MUT : Tro feliĉa, mia generalo, esti farinta al vi tiun malgrandan servon. Sed kiel por mi, vi kantonmentis ĉe tiuj friponoj ?

Antaŭ ol respondi, la generalo petis glason da vino. Li englutis ĝin, sentis sin revigligita kaj diris al Mutie : "Vi diris al mi ke vi volis pasi tra ĉi tie por vidi viajn bonajn amikinojn kaj la infanojn. Mi volis evitigi al vi la vojon laŭ etapoj de ĉi tie ĝis la kuracbanejo de Bagnolo, kaj mi venis atendi vin ĉe tiu bandito kiu tiel bone malsukcesis tranĉi al mi la gorĝon.

MUT : Kiel ili faris por ekkapti vin ? Kaj kial ili volis mortigi vin ?

GNR : Ni havis kverelon pri kompatinda etulo kiu

² En la franca, la vesponesto povas preni la signifon de embusko, de kaptilo, de malfacila, labirinta situacio, de embarasa afero. Tiel, la generalo estas ĉi tie, pro nesingardo aŭ mallerteco, meze de personoj de kiuj li povas nur ricevi problemojn.

aspektis tiel malfeliĉa, tiel malsana, tiel terurita ke mi kompatis. Mi petis al li butikumadon kaj donis dudek frankojn por pagi, la troaĵo restus por li. La fripona gastejestro ŝtelis la dudek frankojn ĉar mi ne plu revidis la infanon. Mi reparolis kun li pri tio, la morgaŭon. Mi aŭdis ke la infano estis la filo de almozulino kiu lasis lin ĉe la gastejestro por helpi lin en lia laboro. Mi vidis ke la infano devis esti traktita tre severe. Mi petis por pagi sian metilernadon ien, la fripono rifuzis. Mi diris ke mi iros petition al la urbestro de la loko, li ekkoleris kaj malĝentile parolis al mi. Mi faris stultaĵon lasi lin vidi mian orplenan monujon, monbiletojn kaj juvelojn en mia monskatolo, kaj mi diris al li ke li pro sia malĝentileco perdis bonan okazon ricevi kelkajn milojn da frankoj. Li kvietiĝis, diris al mi ke li akceptis la negocon. Mi miavice rifuzis, kaj mi relokis ĉion en mian monskatolon. La viro ĵetis al mi demonan rigardon kaj eliris. Post unu horo, la virino transirigis min en malgrandan malapudan ĉambron kaj alportis al mi mian tagmanĝon, la edzo eniris ĝuste kiam mi finis. Mi ne atentis pri tio. Mi aŭdis ke elirante, ili duturne ŝlosis la pordon. Mi saltis al la pordo, mi skuis, mi puŝis, mi vokis, neniu kaj nenia rimedo por malfermi. Mi iris al la fenestro, malfermis, nenia eblo por salti eksteren, feraj stangoj grandegaj kaj densaj ĝis ne lasi pasi sciuron.

Mi kriis per la tuta gorĝo, sed tuj la ŝutroj fermiĝis, mi aŭdis ekstere barikadi. Ĉifoje, timo kaptis min, mi estis tie kvazaŭ en muskaptilo. Neniaj armiloj! Mi ne havas tion kun mi, kaj ili forigis la manĝilaron kaj la tranĉilojn. Mi kriis, estas kvazaŭ mi restis muta. Neniu aŭdis min. Kion fari? Atendi? Estas tio kion mi faris. Necesos ke ili alportos al mi por manĝi, mi pensis. Starante apud la pordo, mi ekĵetos min eksteren tuj kiam ĝi estos malfermetita. Mi longe atendis, kaj kiam oni venis, ne estis la pordo kiu

malfermetiĝis, sed la ŝutro, oni transdonis al mi pantranĉojn.

"Estas akvo en la karafo", diris la voĉo de la gastejestro, kaj la ŝutro refermiĝis.

"Mi tiel restis dum du tagoj, laca ĝis morti, havante nur unu seĝon por ripozi, panon kaj akvon por nutri min, terure maltrankvila pri tio kio baldaŭ okazus al mi. Mi bolegis kiam mi pensis ke eble vi estis ĉi tie, je kvincent paŝoj de mi kaj ne povanta helpi min. Finfine, la trian tagon, mi aŭdis nekutiman movon direkte al la pordo. Mi repostenis min, preta ekĵeti min sur la unuan kiu aperus. Efektive, mi aŭdas alproksimiĝi, la ŝlosilo turniĝas en la seruro, la pordo malrapide malfermiĝas. La mallumo de mia malliberejo ne permesis ilin vidi min. Mi atendas ke la porda aperturo estu sufiĉe larĝa por lasi min pasi, kaj mi ĵetegas min al tiu kiu eniras. Mi ricevas pugnobaton sur la nazon. La sango elfluas kaj ĝenas la vidon, tio kio ne malhelpas min serĉi malbari al mi trapason. Sed ili ŝajne estis pluraj, ĉar mi sentis la batojn amase fali sur mian kapon, sur mian dorson, kaj ĉefe sur mian vizaĝon. La sango blindigis min, mi ne plu vidis kie mi estis. Mi vokas, krias helpon, la friponoj elkraĉas sakraĵojn kaj fine sukcesas ĵeti min planken. Unu el ili saltis sur mian bruston, dum aliaj streĉe ligas al mi la piedojn, la manojn kaj enpuŝas en mian buŝon poŝtukon kiu senspirigis min. Mi baldaŭ perdis konscion, kaj mi ne scias kiel mi estis liberigita aŭ kiel vi sukcesis diveni la danĝeron en kiu mi troviĝis.

MUT : Mi rakontos tion al vi, mia generalo, kiam vi estos ripozinta, vi aspektas laca. Necesas al vi kuracisto, kaj mi tuj iros venigi lin.

GNR : Mi volas nur ripozon, mia amiko. Nenia kuracisto, per la amo de Dio ! Lasu min dormi. La penso ke mi troviĝas ĉi tie, ĉe viaj bonaj amikinoj kaj apud vi, donas al mi kontentiĝon kaj trankvilon kiujn mi volas profiti por ripozi.

Ĝis morgaŭ, mia brava Mutie, ĝis morgaŭ.

La generalo trinkis duan glason da vino, turnis la kapon sur la kapkusenon kaj endormiĝis.

08 Netaviŝtuko lokita.

SinJORino Blidot kaj Mutie restis dum kelkaj momentoj apud la generalo, sed vidante lin tiel trankvila, sinJORino Blidot diris : "Mi estas restonta apud li iom da tempo por vidi ĉu la dormo estas ne malkvieta, kara sinJORo Mutie, purigonte kaj ordigonte la ĉambron. Kaj vi, iru vidi tion kion fariĝas tien tiuj rabistoj Burniero".

MUT : Vi pravas, mia bona sinJORino Blidot. Kie estas mia kompatinda Jakobo ?

BLD : Kun Elfia sendube; vi trovos ilin en la ĉambrego.

Mutie eliris, fermis la pordon kaj eniris en la ĉambregon. Elfia estis tie kun la infanoj. Jakobo rapidegis renkonte al Mutie. "Kiel mi timis pri vi, mia kara bona amiko. Kiam mi aŭdis la pistolpafon, mi kredis ke oni mortigis vin".

Mutie klinis sin al Jakobo, kisis lin plurfoje, poste, alproksimiĝante al Elfia, li prenis al ŝi la manojn kaj premis ilin ridetante. Elfia rigardis lin kun ĝoja kontentiĝo.

ELF : Kaj mi do ! Kiun timon mi ja ankaŭ havis !

MUT : Timo kiu donis al vi kuraĝon por maleviti ĉion. Vi ja ne hezitis dum momento ! Via bravega mieno kiam vi eniris, inspiris al mi veran impreson de admiro, kaj ankaŭ de dankemo, estu certa pri tio.

ELF : Mi estas tre feliĉa ke vi estas kontenta pri mi, kara sinJORo Mutie. Mi tre timis esti farinta stultaĵon.

Mutie ridetis. Necesas ke mi iru vidi tion tion kio okazas, li diris. Mi provos kiel eble plej mallongigi, kaj mi vidos tion kio fariĝas la povra Netaviŝtuko.

JAK : Ĉu vi volas ke mi iru kun vi, mia bona amiko ? Ĉifoje, estos nenia danĝero.

MUT : Mi certe volas, mia knabo, sed kion ni faros pri

Netaviŝtuko ? Se ni kondukus lin ĉe la preposto ?

ELF : Kial vi ne venigus lin ĉi tie ?

MUT : Ĉar via domo ne estas rifuĝejo, mia bona Elfia; cetere ĉu ni scias kiu estas tiu malfeliĉa knabo, kaj ĉu lia ĉeesto ne estus danĝera por ni ? Se la preposto bonvolas gardi lin, estas la plej feliĉaĵo kiu povus okazi al li, kaj estus maniero fari de li iun bonan knabon, se li ne ankoraŭ estas tion, kaj pli poste iun bravan viron, iun bonan kristanon.

ELF : Vi estas prava, ĉiam prava. Adiaŭ do, kaj ne estu tro longe forestanta.

MUT : Malplej kiel mi povos. Venu, Jakĉjo; ĝis baldaŭ, Elfia.

Mutie eliris, tenante Jakobon permane. Enirante en la gastejon Burniero, ili aŭdis koncerton de ĝemadoj, de blasfemoj kaj de sakraĵoj, la vunditoj estis rekonsciiĝintaj. La kuraĝuloj de la vilaĝo jam ligis ilin streĉe kaj gardis ilin paŝante antaŭ ili tien kaj reen. Ili respondis per malbenoj kaj piedbatoj al insultoj kiujn la malliberuloj adresis al ili. Kiam Mutie eniris en la ĉambron, li demandis ĉu Netaviŝtuko estis liberigita. Oni forgesis lin, kaj Mutie iris kun Jakobo malfermi la pordon de la karbejo, sed la ŝlosilo ne estis tie. Jakobo volis iri preni ĝin en la poŝoj de la gastejestro.

"Ne necesas, mia amiko, mi ne bezonas de ŝlosilo, vi tuj vidos kiel".

Mutie donis ŝultrobaton al la pordo : ĝi rezistis. Li donis duan skuon : krako aŭdiĝis kaj la pordo falis en la karbejon. Netaviŝtuko estis terure timigita. Li ne kuraĝis eliri el la angulo kie li rifuĝis. Jakobo trankviligis lin klarigante al li kial Mutie frakasis la pordon, kaj kiel la malafabla Burniero baldaŭ estos enprizonigata de la ĝendarmoj kiujn oni atendis. Netaviŝtuko ne povis kredi je sia liberiĝo kaj la aresto de sia malafabla mastro. En sia ĝojo, li ĵetis sin ĉe la genuojn de Mutie kaj de Jakobo kaj

volis kisi ilin. Mutie malpermesis tion al li.

"Estas la bona Dio kiun necesas danki, mia knabo; estas li kiu savis vin".

NTV : Mi kredis ke estis vi, sinjoro, kun la bona Jakobo.

MUT : Mi ne diras ne, mia amiko, sed tamen estas la bona Dio kiun necesas danki. Vi ne komprenas, mi bone konstatas tion, sed iam vi komprenos. Sekvu nin, mi tuj kondukos vin ĉe S^{ro} preposto.

NTV kunigante la manojn : Ho, ne ! Ne la preposto ! Ne la preposto ! Mi petas, mi petegas vin !

MUT : Kial ĉi tiu timo de S^{ro} preposto ? Kion li faris al vi ?

NTV : Li faris nenion ĉar mi neniam proksimiĝis al li. Sed se li ektuŝus min, li manĝus min tute viva.

MUT : Jen granda stultaĵo ! Kiu fabelis al vi tiujn malseriozaĵojn ?

NTV : Estas mia mastro kiu tre malpermesis min alproksimiĝi al li por ne esti manĝita.

JAK : Ha, ha, ha ! Kaj mi kiu iras tie ĉiutage, ĉu mi estas vorita ?

NTV : Ĉu vi ? Vi aŭdacas ?... Kiel do tio okazas ?

MUT : Estas ke via mastro estas malbona fripono, kanajlo, kiu timas ke la preposto venus savi vin, kaj kiu kredigis vin ke se vi parolis al li, li manĝus vin. Nu, mia povra knabo, lasu tiajn sensencaĵojn, kaj sekvu min.

Netaviŝtuko sekvis Mutie^{on} kaj Jakoboⁿ kun malinklino. Mutie trairis la gastejo, vidigis al li sian streĉe ligitan mastron tiel kiel lian edzinon kaj la fraton, poste li eliris, kaj paŝis al la prepostejo.

La pordo estis fermita ĉar estis iom malfrue. Mutie frapis. La preposto mem venis malfermi la pordon. Li rekonis Mutie^{on}.

La PRePosto : Bonegan tagon, mia bona sinjoro Mutie; vi

estas do reveninta ? Ekde kiam ?

MUT : Ekde tiu mateno, sinjoro preposto, kaj jen mi venas proponi al vi bonan faradon.

PRP : Bonege, sinjoro Mutie, disponu pri mi, mi petegas vin.

MUT : Sinjoro preposto, estas ke necesas doni dumtempe loĝadon kaj manĝadon al tiu jena kompatinda etulo.

Mutie prezentis Netaviŝtukoⁿ tremanta.

PRP : Lia mastro do liberigis li ? Estas miascie la sola bonfaro kiun li faris. Tiu infano vere bezonas esti edukata. antaŭ longe mi voluntus havi lin, sed ne estis rimedo por alproksimiĝi al li.

La preposto volis preni la manon de Netaviŝtuko kiu retiris ĝin eligante krion. "Nu ! Kio do okazas ? diris la preposto surprizita".

MUT : Estas, sinjoro preposto, ke ĉi tiu naivulo imagas ke vi tuj formanĝos lin kun apetito. Estas lia diabla gastejestro kiu faris al li tiun stultan fabelon por maleblegi lin sin turni al vi.

- Mia kompatinda knabo, diris la preposto ridante, estu tre trankvila, mi nutras min pli bone ol tion, vi estus malbona peco por manĝi. Ĉiuj infanoj de la vilaĝo venas ĉe mi, kaj mi manĝis neniun, ne eĉ la plej grasajn; petu plivole al Jakobo.

JAK : Estas tio kion mi diris al li, sinjoro preposto, kiam li diris al ni tiun ĉi ridigan aferon. Nu, ĉu vi vidas, Netaviŝtuko ? Mi ne timas pri S^{ro} preposto.

Kaj Jakobo, prenante la manojn de la preposto plurfoje kisis ilin. Netaviŝtuko rigardadis lin; li ankoraŭ aspektis timigita, sed li ne plu provis eskapi.

PRP : Necesas do gardi tiun infanon dum tempeto, sinjoro Mutie ? Sed kiel lia mastro akceptos la aferon ?

Mutie rakontis al li la okazaĵojn kiuj ĵus okazis. La

preposto akceptis la zorgon de tiu forlasita infano. Li alvokis sian servistinion, transdonis al ŝi Netaviŝtukoⁿ postulante al ŝi doni al li vespermanĝon kaj aranĝi por li liton en ajna kabineto.

- Nun, li diras, mi tuj iros viziti la vunditojn por provi revenigi ilin al pli bonaj amsentoj. Ĝis morgaŭ, mia bona sinjoro Mutie, mi iros vidi vin ĉe la Gardanĝelo.

Kaj la preposto eliris kun Mutie kaj Jakobo. La du lastaj transiris la straton por reheimeniri. Ili trovis sinjorinon Blidot^{on} kaj Elfiaⁿ kiuj malpacience atendis ilin. "Venu rapide enlitiĝi, mia Jakĉjo, diris sinjorino Blidot, Paŭlo jam dormas.

- Adiaŭ panjo, adiaŭ onklino mia, adiaŭ mia bona amiko, diris Jakobo brakumante ĉiujn ameme.

BLD : Kiajn amindajn infanojn, vi donis al ni, mia kara sinjoro Mutie ! Se vi scius la tenerecon kiun mi havas por ili kaj kiom nia vivo estas ŝanĝita kaj plibeligita fare ilin !

MUT : Kaj por ili, kia beno vivi ĉe vi, miaj bonaj kaj karaj amikinoj ! Kiajn patrinajn prizorgojn ili ricevas ! Kiel oni estas feliĉa sub via tegmento !

BLD : Kial vi ne restas, ĉar vi trovas ke oni estas tiom bone ?

MUT : Iu viro kun mia aĝo ne devas vivi senutile, nenifaradante. Antaŭ ĉio, nun, necesas ke mi iru al la kuracbanejo de Bagnolo, por bone resanigi mian vundon, ankoraŭ malbone fermita.

ELF : Jes, estas bone en tiu momento, kaj poste ?

MUT : Poste ? Mi ne scias. Mi vidos tion kion mi devas fari. Per la graco de Dio !

ELF : Vi ne pli soldatiĝos, mi esperas ?

MUT : Eble jes, eble ne, mi ankoraŭ ne scias.

ELF : Vi tamen ne soldatiĝos sen paroli al mi pri tio, kaj ni vere vidos ĉu vi kuraĝos kaŭzi al mi ĉagrenon.

MUT : Ne estos mi kiu iam propravole kaŭzos al vi ĉagrenon, kara Elfia mia.

ELF : Bone ! Tiel mi estas trankvila, vi ne soldatiĝos.

La du fratinoj kaj Mutie iom plidaŭrigis la vesperon. Mutie kaj sinjorino Blidot iris vidi de tempo al tempo, ĉu la generalo nenion bezonis. Vidante ke li ankoraŭ dormis, ili parolis pri iri kuŝiĝi. Mutie diris ke li tranoktos sur seĝo por priatenti la generalon. Elfia kaj sinjorino Blidot protestis kaj deklaris al li ke ili ne tolerus tion. Dum sinjorino Blidot diskutis la aferon kun Mutie, Elfia malaperis kaj baldaŭ revenis kun matraco kiun ŝi ĵetis sur la plankon por kuri serĉi alian.

- Elfia ! Elfia ! kriis Mutie, kion vi faras ? Kial tiel lacigi vin ? Mi ne volas ĝin.

Elfia revenis kun iu dua matraco kiun ŝi ĵetis al Mutie kiu volis senigi ŝin de tio, kaj kurante denove malaperis.

- Tio transpaŝas la mezuron ! diris Mutie. Ĉu ŝi alportos duonan dekduon de tio ?

Kaj li postkuris ŝin por malhelpi ŝin demeti la litojn de la domo. Li renkontis ŝin portanta kolbaskusenon, kapkusenon, litkovrilon kaj littukojn. Post sufiĉe vigla diskuto, li sukcesis forigi ĉion de ŝi, kaj malsupreniris akompanata de ŝi ĝis en la ĉambro.

- Se ne estas honte por soldato, li diris, fari al si liton kiel por iu princo !

Babilante kaj ridante, la lito estis farita. Mutie premis la manojn de siaj amikinoj, dirante adiaŭon al ili, kaj ĉiu iris enlitiĝi.

09 La generalo aranĝas la aferojn de Mutie.

La generalo dormis kiel gliro ĝis iu horo sufiĉe malfrua en la mateno, tiel ke Mutie, kiu antaŭvidis trapasi malbonan nokton, estis tre surprizita je sia vekigo vidi la plentagigon. Li elsaltis malsupren de la lito, lavis kaj vestis sin haste. Li aŭdis la horloĝon soni la sesan. Ne aŭdante bruon ĉe la generalo, li malrapide eniris kaj trovis lin en la sama pozicio en kiu li lasis lin dormantan antaŭvesperon. Li povintus kredi lin senigitan de vivo, se la brua spirado kaj la kvieta sinteno de la malsanulo ne tute trankviligis lin. Li eliris tiel malrapide kiel li eniris, revenis al la ĉambro, volvis kaj ordigis sian improvizitan liton, ne forgesis la preĝon de la bona Patro Parabero kaj ekbruligis la fajron por domaĝi la penon de liaj gastigantinoj. Li balais per broso, purigis, aranĝis ĉion kaj atendis. Apenaŭ li sidiĝis sur seĝo antaŭ la ŝtuparo ke li aŭdis delikatajn paŝojn, oni malsupreniris tre milde. Estis Elfia, ŝi diris al li amikan saluton.

ELF : Mi timis ke vi estis ankoraŭ dormanta, vi aspektis laca hieraŭ.

MUT : Sed mi dormis kiel bebo en tiu princa lito, mia bona Elfia, kaj mi sentas min freŝa kaj feliĉa, kaj preta obei al vi.

ELF : Vi ĉiam diras tion, kvazaŭ mi tirane ordonis al vi.

MUT : Estas ke mi volus esti ĉiam utila al vi kaj evitigi al vi ĉiun laboron, ĉiun laciĝon.

ELF : Kaj tial vi tiel taŭge volvis viajn matracojn, kaj ordigis ĉion en la angulo ĝuste antaŭ la enirpordo... Estas tre bone volvita, ŝi aldonis alproksimiĝante kaj ekzamenante ĝin... tre bone... sed necesas malfari.

MUT : Kaj kial tio, bonvolu ?

ELF : Ĉar iu lito, volvita aŭ ne volvita, ne povas resti en la ĉambrego kie ĉiuj eniras kaj kie ni restadas dum la tuta tago, kaj mi tuj forportos ĝin.

MUT : Vi ! Mi ŝatus vidi tion, diru al mi kien necesas meti ĝin.

ELF : En tiun ĉi apudan ĉambron, tiel ni ne devos malsuprenigi ĝin ĉivespere, se vi ankoraŭ volas tranokti apud la generalo.

Mutie prenis la tute volvitan liton kaj portis ĝin en la ĉambron indikitan de Elfia. Post esti metinta ĝin en iu angulo, li rigardis tute ĉirkaŭ si. "La beleta ĉambro ! li diris. Iun freŝan paperon ! Novajn meblojn ! Kaj kelkajn librojn. Nenio mankas, vere. Bone zorgata ĉambro, oni ja povas diri".

ELF : Estas ke ĝi estas destinita al vi. Ni ankoraŭ nenium loĝis tie, kaj ni nomas ĝin : ĉambro de nia amiko Mutie. Ĝi estis memoro por vi kaj de vi. Jakobo kelkfoje iras balai, viŝpurigi enen, kaj ĉiam diras ĝemante : "Kiam do nia bona amiko Mutie estos en ĝi ?"

Antaŭ ol Mutie havis tempon por danki Elfia", Jakobo kaj Paŭlo kuregis en la ĉambron kaj en la brakojn de Mutie. "Ha ! Vi fine estas en via ĉambro, diris Jakobo. Restu en ĝi, mia amiko, mia bona amiko. Restu, ni ĉiuj estus tiel feliĉaj !

MUT : Neeble, mia infano ! Mi nur servus por malhelpi vian panjon kaj vian onklinon.

JAK : Ĝeni ! Ha ! Ne kredinde ! Ili diris, mi ne scias kiom da fojoj, ke vi estus tre utila al ili, kaj ke vi estas tiel bona kaj tiel komplezema ke ili estus kontentegaj ĉiam havi vin.

MUT : Bonege, mia amiko, mi dankas vin pro bonaj paroloj kiujn vi diras al mi, kaj kiam mi iom riĉiĝos, mi ankaŭ estos tre feliĉa ĉi tie. Sed mi estas nur kompatinda soldato sen mono kaj mi ne povas resti tie kie mi ne povas lukri mian vivteni.

Mutie denove kisis Jakoboⁿ, kaj eliris el la beleta ĉambro por eniri ĉe la generalon. Elfia okupiĝis pri la matenmanĝo. Ŝi rompis sukeron, filtris la kafon kaj iris serĉi la lakton en la farmejon.

La generalo estis vekita, kaj krom kelkaj malgravaj doloroj ĉe lia nazo kaj liaj bluringaj okuloj, li fartis tre bone kaj volis nur manĝi. "Tri tagoj je pano kaj akvo, li diris, terure apetitigis min, kaj se vi povus havigi al mi tason da laktokafo, vi kaŭzus al mi senseblan plezuron.

MUT : Tuj, mia generalo, ni alportos tion al vi antaŭ ol dek minutoj.

Mutie eniris en la ĉambron ĝuste kiam Elfia ankaŭ eniris kun bovlo da lakto. Elfia mienis malĝoje kaj diris nenion. Mutie petis al ŝi kafon por la generalo, ŝi metis ĝin sur la fajrujo sen respondi.

MUT : Elfia, kion vi havas ? Kial vi malĝojas ?

ELF : ĉar mi vidas ke vi ne korligiĝis al ni kaj ke vi ne maltrankviliĝas vidi ĉagrenon al ni, Jakobo kaj mi.

MUT : Mi konfesas ke la ĉagreno de Jakobo, kiu estas ĉi tie feliĉa kiel reĝo, ne maltrankviligas min, sed la via, Elfia, iras en la fundo de mia koro. Mi ĵuras al vi ke, se mi havus sufiĉe por vivteni min sen ricevi vivtenon de vi, mi estus la plej feliĉa el la homoj, ĉar mi tiam povus esperi neniam forlasi vin, mia kara, bonega amikino. Sed vi komprenas ke mi povus resti kun vi, nur se mi estus ligita al vi de ligoj de parenceco... aŭ... de edzeco ... kaj...

Elfia suprenrigardis, ridetis kaj diris : "Kaj vi ne aŭdacas ĉar vi estas malriĉa kaj mi estas riĉa ? Ĉu estas via sola kialo ?

MUT : La sola, mi certigas tion al vi. Ha ! Se mi kapablas ĵeti sorĉon sur vi, mi estus tiom feliĉa ke mi ne kuraĝas kaj ne volas pensi pri tio. Sen amikoj, sen ajna ligo en la mondo, ligiĝi kun milda, pia, ĉarma virino kiel vi, Elfia;

vivi apud bona kaj afabla virino kiel via fratino; okupi pozicion kiel tiun kiun mi havus ĉi tie; tio estus tro da feliĉo !

ELF : Kaj kial malakcepti tion kiam ĝi sin proponas al vi ? Vi nomas nin viajn amikinojn, vi ankaŭ estas nia amiko, kial pensi pri via manko de riĉaĵo kiam vi povas, partigante la nian, doni al ni tiun saman feliĉon kiu mankas al vi ? Kaj mia fratino kiu tiom amas vin, kaj la kompatinda Jakobo, ni estus ĉiuj tiom feliĉaj ! Mia amiko, kredu min, restu, ne forlasu nin.

Mutie, tre kortuŝita, hezitis respondi kiam la generalo, kiu estis senpacienciĝinta pro atendi kaj kiu estis enirinta antaŭ kelkaj monentoj en la ĉambro, alproksimiĝis al Mutie kaj Elfia sen tio ke ili ekrimarkis lin kaj , prenante Elfiaⁿ en siaj brakoj, li puŝis ŝin en tiujn de Mutie dirante : "Estas mi kiu geedzigas vin ! Diable ! ĉu mi ne ĉeestas, mi ? Ĉu mi ne povas doti mian savanton, mian dufojan savanton ? Mi donas al li dudek mil frankojn, li ne plu faros manierojn, mi esperas, por akcepti vin".

MUT : Mia generalo, mi ne povas akcepti tiom altan sumon ! Mi havas nenian rajton pri via riĉaĵo.

GNR : Nenian rajton ! Sed vi havos tiom da rajto kiom mi, mia amiko. Sen vi, ĉu mi ankoraŭ ĝuus tion ? Vi parolas pri konsiderindan sumon ! Ĉu mi ne valoras dekmil frankojn, mi ? Ĉu vi ne savis min dufoje ? Duoble dekmil, ĉu tio ne estas dudek mil ? Ĉu vi kuraĝos subteni al mi ke estas tro multe pagi min, ke mi valoras malpli ol dudek mil frankojn ? Diable ! Ni ankaŭ havas sian memestimon, ni ne povas ankoraŭ lasi sin taksi tro malmulte.

Elfia ridis, kaj Mutie ridetis pro vidi ŝin ridi kaj pro la kolero de la generalo.

MUT : Mi konsentas, mia generalo, li fine diris. La kuraĝo mankas al mi por ellasi tiun karan Elfiaⁿ kiun vi donas al mi tiom malavare.

GNR viŝante sian frunton : Estas tre feliĉa ! Vi fine koncedas ke mi valoras dudek mil frankojn !

MUT : Ho ! Mia generalo ! Mia dankemo...

GNR : Ta, ta, ta, estas nenia dankemo ! Mi volas esti pagita de la amikeco de la geedzo, kaj mi unue kisas mian novan amikineton.

La generalo ekprenis Elfiaⁿ kaj donis al ŝi dikan kison sur ĉiu vango. Elfia premis al li la manojn.

ELF : Dankon, generalo, ne pro la dudek mil frankoj kiujn vi donas tiom malavare al... al... kiel vi nomiĝas ? Ŝi diris al Mutie turnante sin al li.

- Jozefo, li respondis ridetante.

- Al Jozefo do, daŭrigis Elfia ridante, sed mi dankas vin decidigi lin por... Ha ! Dio mia ! kaj mi kiu nenion diris al mia fratino ! Mi devontigas min sen eĉ antaŭsciigi ŝin.

Elfia foriris kurante. La generalo restis kun la malfermita buŝo kaj la okuloj malfermegigitaj.

GNR : Kiel ! Kio tio estas ? Ŝia fratino scias nenion, kaj ŝi edziniĝas mem sen eĉ koni vian nomon !

MUT ridante : Ne atentu, mia generalo, ĉio glatiĝos.

GNR : Glatiĝi ! Glatiĝi ! Mi ja nenion komprenas en tio. Sed tio kion mi vidas, estas ke ŝi estas ĉarma.

MUT : Kaj bona, kaj saĝa, kaj pia, kuraĝa, milda.

GNR : Ktp, ktp, ni konas tion, mia amiko. Mi ne naskiĝis hieraŭ. Mi ja ankaŭ edziĝis ! Iu aminda, milda, bona virino !... Kia demono, fulmotondro ! Se mi povintus eksedziĝi unu jaron poste, mi saltintus super mian sonorilturon pro mia ĝojo.

MUT vikle : Mi esperas, mia generalo, ke vi ne opinias pri Elfia...

GNR ridanta : Ne, diable ! Iu anĝelo, mia amiko, iu anĝelo.

Mutie ne tro sciis ĉu li devis ridi aŭ ĉagreniĝi. La feliĉa

mieno de la generalo kaj lia pufa kaj kolora vizaĝo forigis al li ĉiun penson de incito, kaj li kontentiĝi gaje diri : "Vi revidos nin post dek jaroj, mia generalo, kaj vi retrovos nin tiel feliĉaj kiel ni estas hodiaŭ".

GNR emocie : Dio aŭdu vin, mia brava Mutie ! La fakto estas ke knabino vere estas ĉarma kaj ke ŝi havas vizaĝaspekton oni ne povas pli agrablan. Mi kredas kiel vi ke vi estos feliĉaj. Pri ŝi, mi responsas pri ŝia feliĉo, jes, mi responsas ĉar ekde pluraj monatoj kiujn ni estas kune...

La generalo ne finis, kaj forte premis la manon de Mutie. Sinjorino Blidot tiam eniris, sekvita de Elfia kaj de la infanoj. Mutie kuris al sinjorino Blidot kaj tenere kisis ŝin.

MUT : Pardonu, mia kara, mia bonega amikino, esti konkerinte Elfiaⁿ sen atendi vian konsenton. Estas la generalo kiu hastigis la aferon !

BLD : Mi atendis tiun okazaĵon por la feliĉo de Elfia. Ekde via unua gastado, mi bone vidis ke vi ambaŭ konvenis unu la alian; via dua, via tria gastado kaj viaj leteroj subtenis mian ideon. Vi ĉiam parolis pri Elfia. Kiam vi revenis, la aferoj kreskis, kaj la peripetio de Elfia kiam ŝi kredis vin en danĝero, klare montris la korinklinon kiun ŝi havas por vi. Vi ne povintus trompiĝi pri tio.

MUT : Tial mi ne erarigis min, mia kara fratino, kaj estas tio kio donis al mi kuraĝon por klarigi kiom mi pensis pri tio, sed ke mi estis barita de mia manko de riĉaĵo. Mia bona generalo plejparte provizis ĝin. Kaj jen mi, baldaŭ via feliĉa frato, li diris denove kisante sinjorinon Blidot^{on}, kaj via tre feliĉa edzo kaj servanto, li aldonis turnante sin al Elfia.

- Mia bona amiko, mia bona amiko, ekkriis Jakobo siavice, mi estas kontenta, mi estas feliĉa ! Vi konservas vian belan ĉambron kaj vi ĉiam restos kun ni ! Kaj mia onklino Elfia ne plu estos malgaja ! Ŝi ploris ĉimatene, mi bone vidis

ŝin !

- Ŝŝ, ŝŝ, babiluleto ! diris Elfia kisanter lin, ne diru miajn sekretojn.

JAK : Mi vere povas diri ilin al mia bona amiko ĉar li estas ankaŭ la via.

GNR : Ha do ! Ĉu ni fine tagmanĝos ? Mi ja malsategas ! Vi ĉiuj forgesas ke mi vivis dum du tagoj nur per pano kaj akvo, kaj ke la stomako taŭzas min ĝis kiam mi ne plus eltenas. Mi ja ne havas iun Elfiaⁿ por roli al mi kiel tagmanĝo, kaj mi petas mian kafon.

BLD : Jen ĝi tute preta. Altabligu vin, generalo.

- Pardonu, Elfia, estas mi kiu servas ekde hodiaŭ, diris Mutie forprenante la pleton el la manoj de Elfia, vi donis al mi la rajton.

- Faru kiel vi volos ĉar vi estas la mastro, respondis Elfia ridante.

- La mastro-servanto, rebatis Mutie.

- Kiel mi, malliberulo-generalo, diris la generalo suspirante.

MUT : Ne estos longe, mia generalo, la paco estas faronta, kaj vi reiros hejmen.

GNR : Vere, mia amiko, mi plivole ŝatus resti ĉi tie dum momento.

MUT : Vi ĉeestos ĉe mia geedziĝo, generalo.

GNR : Mi ja kredas tion, diable ! Estas mi kiu elspezos pri la geedziĝofesto. Kaj iun bongustegan manĝon kiun mi donos al vi ! Ĉio el ĉe Ĉelito. Vi ne konas tion, sed mi, kiu venis pli ol unu fojon en Parizon, mi konas lin, kaj mi konigos lin al vi.

10 Kiam estos la geedziĝo ?

La generalo komencis kontentigi sian apetiton, li konatiĝis kun la infanoj kiujn li trovis laŭ sia plaĉo kaj kun kiuj li promenis post la tagmanĝo. Jakobo kondukis lin viziti Netaviŝtukoⁿ ĉe la preposto. Sed Netaviŝtuko travivis ŝanĝiĝon kiu ne plu permesis lin konservi sian nomon. La servistino de la preposto, tre bona virino, kaj kiu delonge kompatis la povran infanon, purigis, kombis lin. Ŝi havigis al si subvestojn, puran pantalonon, kitelon kun zono, dikajn ŝuojn de kamparo. La preposto baptis lin kaj donis al li la nomon Petro. Ĉia timo malaperis, Petro Netaviŝtuko ŝajnis kontentega, kaj estis kun granda ĝojo ke li vidis alveni Jakoboⁿ kaj la generalon. Tiu lasta eksciis, pridemandante Netaviŝtukoⁿ, kiom Jakobo estis bona por li, kaj la parton kiun li kaj Mutie prenis por lia liberigo. La generalo aŭskultis, pridemandis, karesis Jakoboⁿ, premis la manon de la preposto.

GNR : Sinjoro parokestro, mi ne konas homon kiu estus faranta tion kion vi faras por tiu knabo, kaj ne unu kiu estus donanta al Jakobo la instruon kaj la edukon kiujn vi donis al li. Vi estas bona, estiminda preposto : plaĉas al mi agnoski tion.

PRP : Mi estis tiel bone helpita de sinjorino Blidot kaj ŝia bonega fratino ke mi ne povis fari alie ol sukcesi.

GNR : Pri la fratineteto, mi edzinigas ŝin.

PRP : Vi edzinigas ŝin ! Elfiaⁿ ! Ne eblas !

GNR : Kaj tamen estas tiel ! Estas mi kiu dotas la edziĝonton; tiu diknazulo ne volis ĉar ŝi posedas ion kaj li posedas nenion. Mi trovis la aferon tiom stulta, ke mi ekkoleris, kaj ke mi donis al li dudek mil frankojn por finsolvi

la problemon. Nun estas li kiu estas la plej riĉa el la du.
Bonan ŝercon, tion !

PRP ridetanta : Sed kiu Elfia povas edziniĝi ? Ŝi rifuzis ĉiujn junulojn kiu sin prezentis, kaj kiam ni riproĉis, ŝia fratino kaj mi, sin montri tiel postulema, ŝi ĉiam respondis : "Mi ne ŝatas lin". Kaj se mi insistis : "Mi malamas lin". Poste ŝi ridis kaj certigis ke ŝi neniam edziniĝos.

GNR : Necesas neniam kredi tion kion diras la fraŭlinoj ! Mi ja diras al vi ke ŝi edzigos Mutie^{on}, mian savanton, la bravulon el la bravuloj, la plej bonegan el la viroj.

PRP : Mutie^{on} ! Ha ! La brava knabo ! Mi estas plenkontenta, li plaĉas al mi kaj mi aprobas la elekton de Elfia.

GNR : Kaj la mian, bonvolu. Kiam ni ambaŭ estis vunditaj, mi lia malliberulo, kaj li mia amiko, li senĉese parolis al mi pri Elfia kaj ŝia fratino, kaj ripetis al mi tion kion vi rakontis al li kaj tion kion li mem vidis pri la kvalitoj de Elfia. Mi tiom diris al li : "Edzinigu do ŝin, mia knabo, edzinigu ŝin, ĉar vi trovas ŝin tiom perfektan", ke li fine akceptis la ideon. Nur li volis atendi por okazigi al si ŝparaĵojn. Inter ni, estas por aranĝi sian aferon ke mi venis en la vilaĝo, kaj ke mi metis la manon en vesponeston^[3] de Burniero, aro da friponoj ! Li savis min, kaj li bonfaris. Mi demandas al vi kiel li povintus okazigi al si ŝparaĵojn sen Durakino.

PRP : Kiu estas tiu Durakino ?

GNR : Estas mi mem kiu havas la honoron paroli al vi. Mi nomiĝas Durakino, stulta nomo ĉar ruse, "durake" signifas stultulo.

La preposto ĝojege ridis kun Durakino, kiu ricevis tion plezure kaj kiu proponis al li iri gratuli la fratinojn de la Gardanĝelo.

La preposto konsentis. Dum ili interbabilis, Jakobo kaj

³ Vidu ĉe la ĉapitro 07 (paĝo 56).

Netaviŝtuko ankaŭ ne perdis sian tempon. Netaviŝtuko rakontis al Jakobo ke li estis kiel li, sen patro kaj patrino, ke li estis okjaraĝa kiam la virino kiu mortis en la vilaĝo donis lin al tiu malafabla Burniero, ke tiu virino diris al li antaŭ morti ke ŝi ne estis lia patrino, ke ŝi ŝtelis lin tute malgrandan por venĝi sin kontraŭ homoj kiuj forpelis ŝin sen almozdoni al ŝi, kaj ke, kiam ŝi estus resaniĝinta, ŝi reirus tien por redoni lin al liaj gepatroj ĉar li ĝenis ŝin pli ol li gajnis al ŝi, sed ke li ne estus pli feliĉa ĉar liaj gepatroj estis malriĉaj kaj havis sufiĉe da infanoj sen li. Kaj ke ŝi pli poste diris la saman aferon al Burnieroj, kaj indikis al ili la domon kaj la nomon de liaj gepatroj.

Jakobo instigis Petroⁿ rakonti tion al la bona preposto kiu eble povus iri viziti la Burniero^{jn} kaj sciigi de ili la indikojn ke la almozulino donis al ili pri la gepatroj de Netaviŝtuko.

Jakobo kaj Paŭlo petis al la preposto la permeson resti ĉe li kun Netaviŝtuko, tio kiun la preposto plezure konsentis al ili.

La generalo kaj la preposto revenis al la Gardanĝelo. Mutie babilis kun Elfia, sinjorino Blidot finis la mastrumadon kaj fojfoje esprimis sian opinion.

GNR : Jen ili, sinjoro preposto ! Mi diris al vi !

La preposto alpaŝis al Elfia kaj donis al ŝi sian benon kun kortuŝita voĉo.

PRP : Estu feliĉa, mia infano ! Via elekto estas bona, ĉi tiu junulo estas pia kaj saĝa. Mi tiel taksis lin de la unua fojo kiam li venis hejmen por informiĝi pri vi, kaj ĉefe per la kelkaj tagoj kiujn li travivis ĉe vi ekde tiam.

MUT : Sinjoro preposto, mi dankas vin pro via bona opinio, kaj ĉar en la estonteco ĉiu devos esti kune dividita inter Elfia kaj mi, mi petas al vi doni al mi pecon de la beno kiun ŝi ĵus ricevis.

Mutie fleksis unu genuon teren kaj ricevis, kapon klinitan, la benon kiun li petis. Antaŭ ol restariĝi, li prenis la manon de Elfia kaj diris kun tute konvinkita tono : "Mi ĵuras antaŭ Dio kaj antaŭ vi, sinjoro preposto, fari mian tutan eblon por feliĉigi kaj dolĉigi la vivon de ĉi tiu kara Elfia, kaj neniam forgesi ke estas de Dio ke ni ŝuldas nian feliĉon.

Mutie restariĝis, tenere kisis la manon de Elfia. Sinjorino Blidot ploris, Elfia plorsingultis, la generalo svingiĝis.

GNR : Diable ! Mi kredas ke ankaŭ mi baldaŭ elprenos mian poŝtukon. Ĉu vi baldaŭ finos, vi du ? Mi kiu alvenigas sinjoron preposton por vidigi al li kiel vi ĉiuj estas feliĉaj, kaj jen Mutie kiu ludas scenon por plorigi sian fianĉinon kaj ŝian fratinnon. Mi ja baraktas kiel diablo en benita akvo por gardi la okulon sekan. Sinjoro preposto havas la okulojn ruĝaj, kaj Mutie mem vere havis tre tremetantan voĉon.

MUT : Mia generalo, la larmoj kiujn mi retenas, estas larmoj de feliĉo, la unuaj kiujn mi verŝas en mia vivo. Estas al vi kiun mi ŝuldas ĉi tiun dolĉan emocion ! Vi estas de hodiaŭ mia bonfaranto ! li aldonis ekprenante la ambaŭ manojn de la generalo kaj premante ilin forte en la siajn.

La ekscitiĝo de la generalo kreskis. Finfine, li sin ĵetis ĉe la kolon de Mutie, premis en siajn brakojn la mirigitan preposton, preskaŭ faligis lin teren forlasante lin tro abrupte, kaj rapidpaŝe piediris al la pordo de sia ĉambro kiun li refermis malantaŭ li.

La preposto sidiĝis, sinjorino Blidot eksidigis sin apud lin, Elfia sidiĝis apud sia fratino kaj Mutie lokis sian seĝon apud Elfia.

La pordo de la generalo remalfermiĝis, li elŝovis la kapon kaj kriis : Por kiam la geedziĝo ?

- Kiel la geedziĝo ? diris Elfia, ĉu ni havis tempon por pensi pri tio ?

GNR : Sed mi kiu pripensas pri ĉio, mi petas la tagon por mendi mian vespermanĝon ĉe ĉelito.

MUT : Ĉesu ! Mia generalo, vi tro frue impetas sturmopaŝe. Vi forgesas niajn kuracbanejojn de Bagnolo kaj niajn vundojn.

GNR : Mi nenion forgesas, mia amiko, sed estas tempo por ĉio, kaj la geedziĝo antaŭe.

ELF : Tute ne, generalo, Jozefo pravas, vi devas unue iri al kuracbanejoj, kaj li devas akompani vin tien por resanigi vin.

MUT : Estas bone, kara Elfia, vi estas tiom saĝa kiom bona kaj kuraĝa. Ni disiĝos por kuniĝi poste.

ELF : Kaj por neniam plu disiĝi.

GNR : Ha do ! sed por kiu oni prenas min ? Oni disponas pri mi kiel pri stultulo ! "Vi tion ĉi plenumos; vi tion faros. Estas bone, mia aminjo; estas bonege, mia amiko". Ĉu mi ne havas la aĝon de prudento ? Ĉu, ja sesdek tri jaroj, oni ne scias tion kion oni faras ? Kaj se mi ne volas iri al Bagnolo kiu malamuzas min, se mi ne volas moviĝi antaŭ la geedziĝo ?

ELF : Tiam vi restos ĉi tie por gardi min, kaj Jozefo solsole iras al la kuracbanejoj. Necesas ke mia kompatinda Jozefo bone resanigas sian pafvundon, por ne devi forlasi min poste.

GNR : Ej ! Vidu ĉi tiun aminjon ! Ta, ta, ta, ta, kiel ŝia lango rapide funkcias en sia buŝo ! Necesas do ke mi submetiĝu. Tio kion vi diras estas vera, mia infano, bezonas ke via Jozefo (ĉar Jozefo estas) resaniĝu bone kaj rapide, kaj ni foriros morgaŭ.

ELF : Ho ! Ne, ne morgaŭ. Mi apenaŭ havis tempon por diri al li du vortojn, kaj mia fratino ankoraŭ faris neniun aranĝon. Kaj plie... Nu, mi ne volas ke li foriras antaŭ... antaŭ... Dio ! Kiel tio estas embarasa !... Sinjoro preposto, kiam necesas lasi lin foriri ?

La generalo frotis al si la manojn kaj ridis.

GNR : Jen, jen ! La prudento foriras ! La korinklino posedas la batalkampon ! Hura por la geedziĝo !

ELF : Sed tute ne, generalo ! Dio ! Kiel vi malpacienciĝas ! Vi prenas ĉion ekstreme ! Kun viaj belaj ideoj de geedziĝo, poste de tuja foriro, tuj, vi nebuligis ĉion en mia kapo. Mi ne scias kie ni estis !... Kaj unue, Jozefo ne povas foriri antaŭ fari sian deklaron pri la afero de la Burnieroj. Kaj ankaŭ vi, necesas ke vi estu pridemandata. Ĉu ne, sinjoro preposto ! Jozefo nenion diris; li lasas al mi aranĝi tutsole la tutan aferon.

Mutie ridetis kaj ne estis malfeliĉa pri la deziro kiun Elfia montris gardi lin dum iom da tempo. "Mi nenion diras, li diris, ĉar vi pledas nian kazon multe pli bone ol mi povus fari tion, kaj mi havas tro da plezuro aŭdi vin tiel bone paroli por voli interrompi vin.

PRP : Mia kara infano, vi pravas, necesas atendi iliajn pridemandadojn, tio estas kelkaj tagoj, kaj foriri ekde la morgaŭo.

BLD : Bone juĝita, sinjoro preposto, mi dirintus ĉion kiel vi. Ŝi prete ŝvebis sur mia lango ekde la komenco.

ELF : Kaj kial vi ne tuj diris tion ?

BLD : Ĉu vi lasis tempon al mi ? Vi estis tiel vigla ke eĉ Jozefo ne povis diri nur unu vorton.

11 Kverelo por amuzo.

La generalo fine konsentis vojaĝi al la kuracbanejoj antaŭ la geedziĝo, sed li postulis ke tuj post la reveno, ni decidu la tagon por ke li povu mendi sian vespermanĝon. Li volis listigi ĉiujn pladojn kiujn li petus, sed neniu aŭskultis lin, kaj li ekrakontis ilin, en angulo, al Jakobo kaj Paŭlo kiuj estis revenintaj de momento. Ili lekis al si la lipojn aŭskultante kaj rondokule rigardis.

PAŬ : Kio estas iu babao ?

GNR : Tiu estas bongusta kuko, kun malgrandaj nigraj bonegaj vinberoj kaj franda krusto.

JAK : Ha jes ! Kiel la pomdariolojn kiujn onklino Elfia bakas.

GNR : Naivulo, ja ! Tio estas centoble pli bona !

La generalo daŭrigis la detaladon de la vespermanĝo.

PAŬ : Kio estas nugato ?

GNR : Iu bongusta kuko farita kun muelitaj migdaloj kaj sukero.

PAŬ : Kiel la migdaloj kiujn ni pistas, Jakobo kaj mi, por fari migdallakton ?

GNR : Ha do ! Sed !... Diru do, panjo Blidot, viaj infanoj estas malkleraj kiel ŝtipoj ! Unu demandas al mi ĉu iu babao estas kiel la pomdarioloj de onklino Elfia; la alia, ĉu iu nugato estas kiel la migdallakto kiun ili pistas. Ili scias nenion, sed tute nenion.

PRP : Atentigu, mia generalo ! Estas multaj aferoj kiujn ili konas kaj pri kiuj ili kapablus malpravigi vin pri malĝustaĝo.

GNR : Mi kredas vin laŭ vian vorton, sinjoro preposto, kaj mi daŭrigas mian vespermanĝon... Nu ! Nu ! Oho etuloj, mi ne finis.

JAK : Sinjoro generalo, estas ke... tio ne multe amuzas Paŭloⁿ; kaj mi ne multe komprenas en tio.

Kaj Jakobo kuris kuniĝi kun Paŭlo kiu fuĝis en la ĝardenon.

La tago fluis gaje por ĉiuj. Venis pluraj vojaĝantoj peti por tagmanĝi aŭ sensoifiĝi per cidro, pano kaj fromaĝo.

Jakobo, kiu feris tiun tagon, helpis al la servado kun aktiveco kaj afableco kiuj valorigis al li laŭdojn de la vojaĝantoj kaj kelkajn gratifikajn monerojn. Paŭlo sekvis ĉiujn paŝojn de Jakobo, la generalo amuzis sin rigardi, aŭskulti kaj eĉ babili kun la venantoj kaj irantoj. Oni rigardis lin kiel iun vendiston de bovoj aŭ ŝafoj.

- Kiel la varojn vendiĝis ĉe la foiro de *Gaceo*, Sinjoro ? demandis iu vojaĝanto.

- Ne bone, Sinjoro, aplombe respondis la generalo.

- Kiom po funto vivante vendita ?

- Du aŭ tri frankoj, diris la generalo, kiu ne scias pri kio temis.

La VoJaĜanto : Kaj vi nomas tion "ne bone" ?

Skorzonero ! Vi estas postulema, Sinjoro ! Neniam la varoj atingis tiun ĉi prezon, mi vivanta, estas por ne kredi tion.

GNR : Kiel vi volas, Sinjoro.

VJĜ : Ha ! Sinjoro, ĉu vi mokas min, hazarde ?

GNR : Mi, Sinjoro, ne kredinde ! Mi tro respektas vin tiel kiel ĉiujn vojaĝantojn, por permesi al mi...

VJĜ : Sed, Sinjoro !

GNR : Kion ! Sinjoro ?

VJĜ : Nenion, Sinjoro; lasu min manĝi mian tagmanĝon.

GNR : Volontege, Sinjoro. Manĝu kaj trinku.

La vojaĝanto strabe rigardis lin, sed nenion pli diris. La senindulga kaj mokema mieno kiun prenis la generalo, nebligis lin daŭrigi stultan kverelon. Kiam li finis sian tagmanĝon, la generalo vokis : "Du tasojn da kafo, bonvolu,

por sinjoro kaj por mi, kaj karafeton da brando, sed la bona, la plej bona. Ĉu vi akceptas, Sinjoro, la tason de reamikiĝo ?

VJĜ : Plezure, Sinjoro, mi ne pensas ke vi intencis ofendi min.

GNR : Certe ne, Sinjoro, mi ne sciis pri kio vi parolis, kaj mi hazarde respondis. Jen la vero.

VJĜ : Mi parolis pri la bovoj vivante venditaj. Vi do ne estas vendisto de brutoj, Sinjoro ?

- Ne, Sinjoro, rebatis la generalo, sin tenante la flankojn pro ridego. Mi estas vojaĝanto kiel vi kaj kaptito de sinjoro, montrante Mutie^{on} kiu eniris.

VJĜ timigata : Kaptito ? Vi... vi do estas... ?

GNR pli laŭte ridanta : Ne ŝtelisto aŭ mortigisto, Sinjoro, kvankam mi mortigis kaj faris mortigi multajn homojn. (La vojaĝanto saltas dorsen). Militkaptito, Sinjoro: kaptita en Malakofo de sinjoro kiu savis min saltante meze de la ruinaĵoj de Malakofo dum la eksplodo. Tio eksplodis, tio falis tute ĉirkaŭ ni. Ĝemante pro miaj vundoj, mi admiris tiun kuraĝon kiu maltimis la morton por savi malamikon. Kaj jen, Sinjoro, kiel mi estas vojaĝanto-malliberulo.

VJĜ : Kio estas via rango, Sinjoro ?

GNR : Generalo, Sinjoro.

La vojaĝanto eksaltis de supre sia seĝo, demetis sian ĉapelon kaj diris kun embaraso : "Senkulpigu min, Sinjoro, mi ne sciis..., mi kredis... kiel diveni ?

GNR : Ne gravas, Sinjoro, ne gravas, ne estas la unua fojo ke oni rigardas min kiel vendiston de... ĉiaj brutoj... Kaj ne estos la lasta.

La vojaĝanto, konfuzita, volis elpagi sian elspezon. La generalo insistis por li mem pagi ĉion kun la kafo. La vojaĝanto salutis hezitis, dankis kaj foriris.

JAK : Kiel estas amuze vojaĝi !

GNR : Ĉu vi volas ke mi kunprenu vin ?

JAK : Mi ŝategus se vi ankaŭ kapablus kunpreni S^{ron} Mutie^{on}, Paŭloⁿ, panjon kaj mian onklinon.

GNR : Estas tro da feliĉo kaj da pakaĵo, mia amiko. Mi ne havas lokon por ĉiu. Rilate al loko, kie do troviĝas mia aŭto ? Kaj mia monskatolo, miaj juveloj, mia oraĵo, mia vojaĝilaro ?

JAK : Nu, estas vere ! Burniero forprenis la aŭton, kaj ni ne plu revidis ĝin. Ĉiuj kredis ke vi estis foririnta kun ĝin.

GNR : La fripono ! Mutie, mia amiko, ni iros vidi tion morgaŭ. Ĉu oni forkondukis la tri rabistojn ?

MUT : Mi iris vidi antaŭ momento, mia generalo; la ĝendarmoj forigis ilin per aŭto; kaj la enketa juĝisto nepre venos morgaŭ matene.

ELF : Jam !

MUT : Ni baldaŭ revenos, Elfia, tio ne estos longa. Tri semajnojn de banado, du tagojn de veturado por iri kaj reveni. Ne tute unu monaton entute.

GNR : Jes, jes, mi baldaŭ revenos al vi, mia kara infano ! Estas bele de vi tiom sopiri pri mi !

Elfia ridetis kaj ankaŭ Mutie. La generalo afektis ruzecon : "Estas ja pri mi ke vi sopiris, Elfia ?... Neniu respondo ? Kiu silentas, tiu konsentas... Tiu sopiro valoros por vi oran horloĝon kaj ĝian ĉenon".

ELF : Sed ne, mia generalo; tio ne estas justa; mi ne volas ... Vi bone scias...

GNR : Mi scias nenion ajn; ĉu ne estis pri mi ke vi sopiris tiom malgaje antaŭ momento ?

ELF : Tute ne, vi bone scias tion. Estas pri Jozefo.

GNR : Tiu sincereco meritas rekompencan, kaj vi ricevos ne nur horloĝon kaj ĝian ĉenon, sed broĉon kaj orelringojn.

ELF : Generalo, vi estas tro bona. Estas tro, multe tro. Mi ne valoras tiom.

GNR : Mia knabino, vi parolas kiel senpripensulino. Je via aĝo, oni ne taksas la valoron de homoj. Vi ne scias tion kion vi valoras, estas mi kiu diras tion al vi. Demandu al Mutie ĉu li donus vin kontraŭ oran horloĝon.

- Ne kontraŭ la tutaj trezoroj de Francio, ekkriis Mutie ridante.

GNR : Vi aŭdas ? Ne estas mi kiu sufloris tion al li ! Nu ! la tago progresas. Mutie, se ni irus promeneti flanke de la gastejo, ke mi prenu mian monskatolon kaj miajn aĝojn.

MUT : Mi estas je via ordono, mia generalo. La ekskurso ne estos longa.

12 La doto kaj la horloĝoj.

La generalo kaj Mutie ambaŭ iris al la gastejo Burniero; tie ili trovis neniun, nur la oficiston de la urbodomo kiu skribis en la enirejo. Mutie klarigis al li kial la generalo venis. La oficisto kaŭzis kelkajn malfacilaĵojn, dirante ke li ne konis la generalon, ktp

GNR : Ĉu vi hazarde rigardas min kiel ŝteliston ? Ĉar estas mi kiun tiuj kanajloj de Burniero volis murdi, por ŝteli min pli trankvilaj kaj sen ke mi kapablu reklamacii ! Mi tute rajtas repreni tion kio apartenas al mi, mi pensas.

La oficisto : Sed sinjoro, mi estas komisiita por gardadi ĉi tiun domon ĝis tio ke la afero estu decidita, kaj mi ne konas la objektojn kiuj estas por vi. Mi ne volas riski vidi forpreni aferojn kiujn mi estas responsa kaj kiuj apartenas al tiuj homoj.

La generalo starigis al li liston de siaj aĵoj kaj indikis la lokon kie oni trovos ilin. La oficisto iris en la indikitan ĉambron, trovis tie la petitajn objektojn kaj alportis ilin. La generalo rekompence donis al li dudekfrankan moneron. La oficisto unue rifuzis vigle poste senvigle, fine akceptis, montrante grandan malinklinon doni al siaj servoj interesitan aspekton. Mutie ĉarĝis sin per la vestaĵoj, per la vojaĝilaro kaj per la peza monskatolo; kaj ili reiris al la Gardanĝelo. La generalo vokis Jakoboⁿ kaj Paŭloⁿ, kiuj sekvis lin en lian ĉambron. Li vidigis al ili tion kiun enhavas lia monskatolo kaj lia vojaĝilaro. En la monskatolo, estis duon-dekduo da oraj poŝhorloĝoj kun iliaj ĉenoj laŭ malsamaj beleco kaj valoro; ĉiuj liaj ordenoj el diamantoj kaj el juvelŝtonoj; monpaperujo plenplena da bankbiletoj kaj ledsako plena da oraj moneroj. Estis tio tute kiun la generalo senprudente ne kaŝis al

Burniero kaj kiu ekscitis la monavidecon de tiu lasta. La vojaĝilaro estis el orarĝento kaj enhavis la tuton kiu povus utili por la sinlavado kaj la manĝadoj.

Jakobo kaj Paŭlo estis en la raviteco kaj ĝojkriis ĉe ĉiu nova objekto kiun la generalo vidigis al ili. La horloĝoj ĉefe ekscitis ilian admiron. La generalo prenis unu el ili je meza grandeco, alligis al ĝi la belan ĉenon el oro kiu estis kreita por ĝi, lokis la tuton en juvelujo aŭ skatoleto el ruĝa marokeno kaj diris al Jakobo : "Tiu, estas tiu kiun via bona amiko donacos al onklino Elfia. Kaj tiuj du, li diris deprenante el la monskatolo du poŝhorloĝojn kun malpli belaj kaj malpli ŝikaj ĉenoj, estas viaj kiujn donacos al vi vian bonan amikon. Sed ne diru ke mi vidigis ilin al vi, li riproĉus min".

JAK : Estas vi, mia bona generalo, kiu donacos ilin al ni.

GNR : Ne, vere, estas Mutie. Estas lia donaco de geedziĝo.

JAK : Sed kiam do li aĉetis ilin ? Kaj per kio ? Li antaŭ nelonge diris ke li estis malriĉa, ke li ne havis monon.

GNR : Ĝuste ! Li ne havas monon ĉar li elspezis ĉion.

JAK : Sed kial li elspezis sian tutan monon en donacoj de geedziĝo, ĉar li volis edziĝi, kaj ke sen vi, li ne estus edziĝonta ?

GNR : Ĝuste ! Estas pro tio. Kaj kiam mi diras ion al vi, estas tre malĝentila ne kredi min.

JAK : Jes, mia bona generalo, sed kiam vi donas ion al ni, kaj tiajn belajn aferojn, ni estus tre sendankaj ne danki vin.

GNR : Eta arogantulo ! Ĉar mi diras al vi...

Li ne povis daŭrigi ĉar Jakobo kaj Paŭlo ĉiu kaptis unu el liaj manoj kiujn ili kisis kaj kiujn ili ne volis liberlasis malgraŭ la manovroj de la generalo kiu tiris dekstren, maldekstren, antaŭen, malantaŭen. Li komencis koleriĝi, sakri, minaci voki

helpon kaj translokigi ilin en la policoĉambron. Li fine sukcesis liberiĝi kaj eniris tute ruĝa kaj tute ŝvita en la ĉambron kie troviĝis Mutie, Elfia kaj ŝia fratino.

- Mutie, li diris per timiga voĉo, eniru ĉe mi, mi devas paroli kun vi.

Mutie surprizite rigardis lin, lia voĉo indikis koleron, kaj anstataŭ eniri ĉe li, li paŝadis tien kaj reen, la manoj malantaŭ la dorso, spiregante kaj viŝante la frunton.

MUT : Kio okazis al vi, mia generalo ? Vi ŝajnas...

GNR : Mi aspektas kiel stultulon, idioton, kiu havas malpli da mensa kaj korpa potenco ol knabo de naŭ jaroj kaj alia de ses jaroj. Kiam mi parolas, oni ne kredas min, kaj kiam mi volas foriri, oni kontraŭvole retenas min. Ĉu vi trovas tion agrabla ?

MUT : Sed, mia generalo, mi ne komprenas ... Kio okazis al vi ?

GNR : Demandu al tiujn knabojn kiuj deziregas paroli. Ili tuj rakontos fabelaron al vi.

JAK ridanta : Mia bona amiko Mutie, mi dankas vin pro la belaj oraj poŝhorloĝoj kiujn vi donacos al ni, Paŭlo kaj mi kiel geedziĝan donacon.

MUT tre mirigita : Oraj horloĝoj ! Geedziĝa donaco ! Vi frenezas, mia knabo ! Kie kaj per kion vi volas ke mi aĉetu orajn poŝhorloĝojn ? Kaj plie, por du knaboj kiel vi, dum mi mem ĝin ne havas ! Kaj kia geedziĝa donaco, ĉar mi ne pensis edziĝi ?

JAK : Nu, mia bona generalo ? Mi bone diris al vi. Estas vi...

GNR : Silentu, babilema knabo ! Mi malpermesas al vi paroli. Mutie, mi malpermesas al vi aŭskulti ilin. Vi estas nur serĝento, mi estas generalo. Sekvu min, mi devas paroli kun vi.

Mutie, ĉe la plejsupro de la miro, obeis. Li malaperis

kun la generalo kiu fortege fermis la pordon.

GNR krude : Jen, prenu vian doton (Li perforte metas en la manojn de Mutie bone provizitan biletujon). Mi aldonis en ĝi la elspezojn de geedziĝo kaj de komenco de mastrumado. Jen la horloĝo kaj la ĉeno de Elfia, jen la via. (Mutie volas forpuŝi ilin) Oho ! Ĉu ne necesas ke vi havu horloĝon ? Kiam vi volus scii la horon, ĉu necesos ke vi kuru peti ĝin al via edzino ? Tiuj junuloj, ili ne plu havas de kapo, de antaŭvido nur kiel ventkapulo, honorvorte !... Nu ! vi bone vidas ĉi tiujn du poŝhorloĝojn tie ? Estas tiuj de viaj infanoj ! Estas vi kiu donacos ilin al ili. Ne estas mi, ĉu vi bone aŭdas ? Ne, ne estas mi ! Kiam mi tion diras al vi ! Kial mi donacus al ili poŝhorloĝojn ? Ĉu estas mi kiu edziĝas ? Ĉu estas mi kiu trovis ilin, kiu savis ilin, kiu feliĉigis ilin loĝigante ilin ĉe tiujn bonegaj virinoj ? Jes, admirindaj virinoj, ĉiuj ambaŭ. Vi estos feliĉa, mia bona Mutie. Mi ja estas sperta pri tio kaj mi ja diras al vi ke vi kurus tra la tutan mondon dum cent jaroj, ke vi ne trovintus same kiel ĉi tiujn virinojn. Kaj mi bedaŭras esti generalo, esti grafo Durakino, esti sesdekkvarjara, esti ruso, ĉar se mi estus tridekjara, se mi estus franco, se mi estus serĝento, mi estus via bofrato, mi edziĝintus kun sinjorino Blidot.

La ideo havi kiel bofraton ĉi tiun maljunan blankharan generalon, ruĝvizaĝan, dikventran, kun Herkula staturo, ŝajnis tiom plaĉi al Mutie, ke li ne povis reteni sin ridi. La generalo, gajigita de la gajeco de Mutie, partoprenis en ĝi tiel bone ke ambaŭ ridegis kiam sinjorino Blidot, Elfia kaj la infanoj, altiritaj de la bruo, eniris en la ĉambron. Ili restis konsternitaj antaŭ la stranga aspekto de la generalo duonfalinta sur kanapo kie li ruliĝis pro multe da ridado, kaj de Mutie partoprenante lian gajecon kaj apogante sin kontraŭ la tablo, sur kiu estis dismetitaj la oro kaj la juveloj de la monskatolo kaj de la vojaĝilaro.

La generalo duone ekstaris : "Ni ridas ĉar... Ha ! ha ! ha !... mia bona sinjorino Blidot... Ha ! ha ! ha ! mi volus esti la bofrato de Mutie... kaj edziĝante vin ... Ha ! ha ! ha !

BLD : Edziĝi je mi, mi ! Ha ! ha ! ha ! Jen kiu fakte estus amuza ! Ha ! ha ! ha ! Bona sensencaĵo ! Ha ! Ha ! Ha !

Elfia ne atendis la paroladofinon de la generalo por ankaŭ komenci ekridon. La infanoj, vidante ĉiujn ridi, partoprenis en la ridego. Ili saltadis pro ĝojo kaj ridis plenkore. Dum kelkaj momentoj, oni aŭdis nur Ha ! ha ! ha ! en ĉiuj tonoj. La generalo estis la unua por rekvietiĝi. Mutie kaj Elfia ridis ankoraŭ pli forte tuj kiam ili direktis siajn okulojn al la generalo. Tiu lasta komencis juĝi malagrablega ke oni tiom amuziĝis pri lia penso de edziĝo.

"Verdire, li diris, mi ne scias kial ni ridas. Estas multaj Rusoj kiuj edziĝas Francinojn, multaj sesdekkvarjaraj homoj kiuj geedziĝas, multaj grafoj kiuj edziĝas burĝinojn. Tial mi vidas nenion tiel amuza pri tio kiun mi diris. Ĉu mi estas tiom maljuna, tiom ridinda, tiom malbela, tiom stulta, tiom malafabla, ke neniu povu edziniĝi kun mi ? Nu Mutie, vi kiu konas min, ĉu mi ne povas edziĝi same kiel vi ?

- Perfekte, mia generalo, perfekte, diris Mutie mordante siajn lipojn por ne ridi, sed vi estas tiel super ni, ke tio ŝajnis amuza al ni havi kiel bofraton iun generalon, iun grafon, iun tiel riĉan viron ! Jen ĉio.

- Estas vere, respondis la generalo; tial estis nur ŝerco. Cetere, sinjorino Blidot neniam donus sian konsenton.

GST ridanta : Certe ne, generalo; neniam. Sed kial tiun ĉi elpakadon de oraĵo kaj juveloj ? Kaj ĉiujn tiujn horloĝojn ? Kion vi faras kun ĉio ĉi ?

GNR : Tio kion mi faras kun tio ? Vi tuj vidus. Elfia, jen la via ! Mutie, prenu ĉi tiun, Jakobo kaj Paŭlo, miaj infanoj, jen tiuj kiujn donacas al vi via bona amiko. Kara

sinjorino Blidot mia, vi prenos tiun kiu estas destinita por vi, kaj kiu povas taŭgi por neniu ajn, li aldonis vidante ke ŝi montris la deziron rifuzi, ĉar la monogramo de ĉiu estas gravurita sur ĉiuj poŝhorloĝoj.

ELF : Ho ! Generalo ! Kiel vi estas bona kaj afabla ! Vi faras aferojn kun tiom da gracieco ke ne eblas rifuzi al vi.

MUT : Dankon, mia generalo ! Mi diras kiel Elfia, ke vi estas bona, vere bona. Sed kiel vi ekpensis pri ĉiuj ĉi aĉetadoj ?

GNR : Mia amiko, vi scias ke mi ne venis hieraŭ en la mondon, kiel mi diris tion al vi. Kiam vi foriris por veni tien ĉi, mi pripensis : "La afero glatiĝos. La manko da monobridos lin. Mi havigos la doton. Mi rapidigos la aferon kaj la geedziĝaj donacoj estos pretaj". Mi antaŭzorge jam aĉetis ilin. Mi foriris la saman tagon kiel vi, por esti antaŭe kaj konatiĝi kun la edziĝontino, kun la fratino kaj kun la infanoj. Mi estis malliberigita de tiu kanajlo de gastejestro. Mi alportis la doton monbilete, plus tri mil frankojn por la geedziĝaj elspezoj. Tiu fripono vidis tiun tuton kaj mian ledsakon kun dek mil oraj frankoj kaj la tutan reston. Kaj jen kiel mi havas antaŭtempe horloĝojn kun la monogramoj tute pretajn. Ĉu vi nun komprenas ?

MUT : Perfekte, mi komprenas ĉar mi konas vin. Koncerne aliulo estus por ne kredi tion. Elfia kaj mi neniam forgesos...

GNR : Prrr ! Sufiĉe, sufiĉe, miaj geamikoj. Ni vespermanĝu, babilu kaj poste dormu. Bonan tagon kiun ni travivis ! Miaflanke mi ja bele laboris, kaj vere, mi bezonas nutraĵon kaj ripozon.

Sinjorino Blidot kuris al la kaseroloj kiujn ĉi forlasis, Elfia kaj Mutie al la manĝilaro, Jakobo kaj Paŭlo al la kelo por elpreni cidron kaj vinon. La generalo stare restis meze de la ĉambro, la manojn malantaŭ la dorso; li rigardis ilin

ridante : "Bone tion ! Mutie. Vi ne bezonos longan tempon por al kutimiĝi al tio. Nu, jen la manĝilaro metita ! Mi prenas mian lokon. Glason da vino, Jakobo por trinki je la prospero de la Gardanĝelo".

Jakobo malŝtopis la botelon kaj verŝis.

"Hura por la Gardanĝelo ! Kaj por ĝiaj loĝantoj ! kriis la generalo, levante sian glason kaj unuglute malplenigante ĝin... Ho sed vere, ĝi estas tre bone provizita la kelo de la Gardanĝelo ! Jen bona vino, Mutie. Tio plezurigas tosti kun vino kiel ĉi tiu !

Oni altablĝis, oni vespermanĝis kun granda apetito; oni babilis iom kaj oni enlitiĝis, kiel tion diris la generalo. Ĉiu dormis sen movi ĝis la morgaŭo. Jakobo kaj Paŭlo metis siajn poŝhorloĝojn sub siaj kapkusenoj; eĉ necesas konfesi ke ne nur Elfia longe rigardadis la sian, aŭskultadis ĝin funkcii, sed ke ŝi ankaŭ ne volis forlasi ĝin kaj ke ŝi endormiĝis tenante ĝin en siaj manoj. Multe pli, sinjorino Blidot kaj Mutie faris kiel Jakobo kaj Paŭlo, kaj je sia vekiĝo, ilia unua impulso estis repreni la horloĝon kaj vidi ĉu ĝi bone funkcias.

13 La Enketjuĝisto.

Kiam morgaŭe ĉiuj kuniĝis por la kafo, la generalo kontentiĝe ekzamenis la feliĉegajn vizaĝojn kiuj ĉirkaŭis lin. La manĝo estis gaja, sed mallonga; ĉiu devis ordigi kaj labori. Mutie taskis al si zorgi pri la ĉambro de la generalo kaj la akceptejo, dum la du fratinoj, helpitaj de Jakobo, purigis la teleraron de la hieraŭo kaj preparis ĉion por la tago. La generalo eliris, estis bele kaj varme. Irante kaj reirante en la vilaĝo, li vidis alveni la ĝendarmojn eskortantaj ĉaron kie troviĝis Burniero, etendita surdorse pro sia vundo, lia frato kaj lia edzino, sidintaj sur sidbenko. Alia veturilo enhavanta la enketjuĝiston kaj la oficiron de ĝendarmejo, sekvis la ĉaron. Oni haltis antaŭ la gastejo, oni elveturigis la fraton kaj la edzinon Burnieroⁿ, du ĝendarmoj kunkonduki ilin kaj enirigis ilin en la akceptejon kie jam troviĝis justicoficistoj kaj la oficiro. Du aliaj ĝendarmoj venigis la gastejestrion kiu kriis sekve de ĉiu skuo kiun li ricevis malgraŭ la antaŭzorgoj kaj la flegado kies oni kovis lin. Ili kuŝis lin grunde sur matraco, la enketjuĝisto vokis unu el la ĝendarmoj.

- Iru venigi la atestantojn kaj la viktimon.

La ĝendarmoj foriris por plenumi siajn ordonojn.

La generalo estis akompaninta la homamason, li eniris en la akceptejon preskaŭ samtempe kun la krimuloj. Li lokiĝis vidalvide al Burniero kiu rigardis lin per fajra okulo pro kolero.

- Kanajlo ! Fripono, perfidulo ! kriis la generalo.

- Kiu estas ĉi tiu viro kiu insultas la akuzito ? diris la enketjuĝisto turnante sin al li. Kial li eniris ? Elirigu lin.

GNR : Pardonu, Sinjoro, mi eniris ĉar mi devas resti. Kaj se vi elirigas min, vi estos tre malhelpita.

La juĝisto : Parolu pli ĝentile al la justico, Sinjoro.
Fremduloj ne devas ĉeesti la pridemandadon kiun mi devas
fari, kaj mi ripetas al vi la ordonon eliri.

GNR : La ordonon ! Sciu, Sinjoro, ke mi ricevas ordonon
de neniu alia ol de mia suvereno (kiu estas tre fore). Sciu,
Sinjoro, ke, altrudante min foriri, vi agas maljustege kaj
sensible. Kaj fine sciu ke se vi devigas min forlasi ĉi tiun
akceptejon, neniu homa forto revenigos min libervole kaj
ricevos de mi parolon pri ĉi tiuj friponoj.

JUĜ : He ! Sinjoro, estas tio kion ni petas al vi, silentu
kaj foriru.

GNR : Mi eliras, Sinjoro ! Kaj mi mokas pri vi kaj pri la
embaraso en kiu vi baldaŭ troviĝos.

La generalo surŝovis sian ĉapelon sur sian kapon kaj
direktis sin al pordo. Mutie sammomente eniris, li stariĝis
flanken, levis la manon al sian kepon : Pardonu, generalo, li
diris.

La generalo eliris.

La enketjuĝisto rigardis kun mira mieno. Kiu vi estas,
Sinjoro ? li diris al Mutie.

MUT : Mutie, la ĉefa atestanto de la afero, sinjoro
juĝisto, tiu kiu rompita la femuron de tiu fripono, kiu frakasis
la kranion al ĉi tiu kaj svenigis tiun kanajlan virinon.

JUĜ ridetanta : Provu domaĝi viajn epitetojn, Sinjoro;
kaj kiu estas la dikulo kiu ĵus eliris ?

MUT : Generalo Durakino, mia kaptito, kiun tiuj... mi ne
scias kiel nomi ilin, ĉar fine ili estas arkifriponoj ! Kiun tiuj
friponoj, ĉar friponoj estas vorto, kiun tiuj friponoj estis
tranĉintaj la gorĝon se mi ne havis la ŝancon troviĝi tie.

JUĜ : Kiel ! Ĉi tiu sinjoro estas... Postkuru lin, sinjoro
Mutie, bone prezentu al li miajn pardonpetojn. Venigu lin,
nepre necesas ke li depoziciu.

Mutie foriris kaj ne malfruis kuratingi la generalon kiu

reeniris ĉe li, kun la vizaĝo ruĝiĝinta, la vejnoj ŝvelantaj, la spirado bruema, kun ĉiuj simptomoj de fortega kaj densigita kolero.

Kiam li aŭdis la komision de la juĝisto, li ekhaltis, turnis al Mutie siajn flamajn okulojn kaj diris per obtuza voĉo : "Neniam. Diru al tiu malĝentilulo ke li rememoru miajn vortojn".

MUT : Sed, mia generalo, oni ne povas malhavi vian depozicion.

GNR : Oni agu kvazaŭ mi estus morta.

MUT : Sed vi ne estas tia, mia generalo, kaj tiam...

GNR : Tiam, oni supozu ke mi estus tia.

MUT : Mia generalo, neblas. Oni ne povas flankenmeti vin.

GNR : Tial kial ili forpelis min ? Kial ili ne aŭskultis min ? Mi antaŭsciigis ilin, ili ne volis kredi min. Ili nun akordiĝu sen mi.

MUT : Mia generalo, mi petegas vin.

GNR : Ne, neniam, neniam kaj neniam ! Mi ne moviĝas el mia ĉambro ĝis ili estu ĉiuj foririntaj.

La generalo eniris hejmen, fermis sian pordon per ŝlosilo, kaj kvietigita de la ideo de la embaraso kiun lia rifuzo kaŭzus, li ekridis kaj frotis al si la manojn.

Mutie reiris al la gastejo kaj raportis pri sia komisio. La enketjuĝisto, tre ĉagrenita, projektis devigi la depoziciadon per la minacoj.

MUT : Pardonu, sinjoro juĝisto, ni nenion perforte ricevos de li; vi ofendis lin; li agos kiel li diris. Li lasos sin dispecigi plivole ol nuligi sian decidon; sed ni povas trafi lin surprize; lasu min agi. Sekvu min, ne bruu, faru tion kion mi diros al vi, kaj vi havos la plej kompletan depozicion kiun vi povus deziri.

JUĜ : Nu, unue ni finu tion kion ni devas fari ĉi tie.

Faru vian depozicion, sinjoro Mutie. Aktisto, skribu.

La enketjuĝisto komencis la pridemandadon. Kiam ili finis, la juĝisto akompanis Mutie^{on} al la Gardanĝelo. Mutie petis lin atendi en la akceptejo, li alvokis Elfiaⁿ, rakontis al ŝi la aferon kaj donis al ŝi siajn instrukciojn. Elfia ridetis kaj iris milde frapi sur la pordon de la generalo.

- Kiu frapas ? li diris per furioza voĉo.

ELF : Estas mi, mia bona generalo, malfermu al mi.

- Kion vi volas ? li daŭrigis per pli dolĉa voĉo.

ELF : Vidi vin dummomente, konsulti vin pri iu punkto rilata al mia edziniĝo, ĉar estas vi kiu decidis ĝin.

GNR : Ha ! Ha ! Jen ĝuste tio kion mi deziras, mia Elfino.

La pordo malfermiĝis, kaj malfermiĝante, maskis Mutie^{on} kaj la enketjuĝiston.

La generalo ekrigardis en la akceptejon, vidis nenium, montris gajan vizaĝon kaj lasis la pordon malfermitan laŭ la peto de Elfia kiu opiniis ke estis varma en lia ĉambro.

- Permesu al mi tedi vin dum kelkaj momentoj, generalo diris Elfia akceptante la seĝon kiun la generalo proponis al ŝi apud li. Estas vi kiu instigis nian geedziĝon, kaj kiam mi pensas ke, sen Jozefo, tiuj abomenaj homoj mortigus vin ! ĉar ili volis mortigi vin, ĉu ne ?

GNR : Mi vere kredas tion ! Tranĉi al mi la gorĝon kiel ŝafo.

ELF : Vi ne ankoraŭ rakontis al ni la detalojn de tiu terura evento. Mi ne bone komprenas kial tiuj kanajloj volis mortigi vin, kaj kiel ili kapablis ekkapti vin kiu estas tiel forta, tiel kuraĝa !

La generalo, flatita de la intereso kiun montris al li Elfia kaj sufiĉe kontenta zorgi pri si mem, faris al ŝi tre detalan rakonton pri ĉio kio okazis en la gastejo Burniero, ekde la momento de sia alveno. Kiam la rakonto konfuziĝis,

Elfia pridemandis kaj akiris klarajn kaj detalajn respondojn. Kiam ne pli estis io por ekscii, Elfia frapis al si la frunton kvazaŭ rememoro transiris la penson kaj ekkriis : "Kion diros mia fratino ? Mi forgesis senplumigi kaj pretigi la kokidaĵon por nia vespermanĝo. Pardonu, generalo, necesas ke mi haste foriras.

GNR : Kaj via edziniĝo kies ni ne diris vorton ?

ELF : Tio estas por alia fojo, generalo.

GNR : Bonege ! Ni ĝisfunde babilos pri ĝi.

Elfia facilmove eskapis kiel birdo. La generalo sekvis ŝin per la okuloj kaj eniris en la akceptejon por vidi ŝin senplumigi ĉian kokidaĵon en la kuirejo. Mallaŭta bruo turnigis al li la kapon, kaj li ekvidis la enketjuĝiston finanta redakti tion kion li ĵus aŭdis. La generalo prenis dignan mienon.

GNR : Ĉu vi venas insulti min ĝis hejme, Sinjoro ?

JUĜ : Mi kontraŭe venas, generalo, esprimi al vi mian pardonpeton pri la malfeliĉa kverelo kiun mi permesis al mi kontraŭ vi, nescianta vian nomon kaj pensanta ke vi estis scivolemulo, enirinta por vidi kaj aŭdi tion kion devas resti sekreta ĝis la tago de la juĝado. Mi ripetas al vi mian pardonpeton kaj esperas ke vi bonvolos forgesi tion kio okazis inter ni.

GNR : Bonege, Sinjoro. Mi ne gardas rankoron kontraŭ vi ĉar mi estas bona knabo, malgraŭ mia mieno de urso. Sed neblas al mi ŝanĝi mian vorton, reiri en tiun gastejon por la pridemandado aŭ respondi al vi unu solan vorton pri la afero.

JUĜ : Rilate al tio, Sinjoro, mi ne plu bezonas pridemandi vin, via depozicio estas kompleta, kaj mi havas nenion pli por ekaŭdi de vi.

La generalo aŭskultis konsternita, lia mira mieno ridetigis la enketjuĝiston.

- Nu ja, mi ekkomprenas, ekkriis la generalo.

Friponetino ! Tio kio estas la junulinoj ! Estas por paroligi min ke ŝi venis kaĵoli min ! Sed kiel ŝi sciis ? Ha ! La perfidulineto ! Kaj mi kiu teneriĝis pro ĉia deziro scii ĉion, forgesi neniun detalon pri tio kio tuŝis min ! Kaj Mutie ? Kie li estas ? Estas li kiu faris ĉion. Mutie ! Mutie ! Ha ! Li kredas ke, ĉar li kaptis min, li povas konduki min kiel infanon ! Li imagas ke, pro tio ke li dufoje savis min, ĉar li savis min dufoje, Sinjoro, riske de sia vivo, kaj mi amas lin kiel mian filon ! Kaj mi adoptus lin se li volus. Jes, mi adoptos lin ! Kio malhelpus min ? Mi havas nek edzinon nek infanon, nek gefratojn. Kaj mi filigos lin se mi volas. Kaj mi igos lin grafon Durakinoⁿ kaj Elfia estos grafino Durakino. Kaj estas nenio por ridi, Sinjoro, mi estas mastro de mia riĉaĵo. Mi ricevas sescent mil rublojn de enspezo, kaj mi volas doni ilin al mia savanto. Mutie, rapide venu, mia amiko !

Mutie eniris, la mienon iom konfuza, li timis esti riproĉita.

GNR : Venu, mia amiko, venu, mia infano, jes, vi estas mia filo, Elfia estas mia filino. Mi adoptas vi, mi igas vin grafon kaj grafino Durakinoⁿ, kaj mi donas al vi sescent mil rublojn de rento.

Elfia estis enirinta aŭdinte alvoki Mutie^{on}. Ŝi preparis sin por defendi lin kontraŭ la kolero de la generalo. Je tiu propono tiel ridinda kaj tiel neatendita, ŝi eksplodis per rido kaj intense kapsalutante Mutie^{on} : Sinjoro grafo Durakino, mi ja havas la honoron saluti vin.

Poste, kurante al la generalo, ŝi prenis al li la manojn, ameme kisis ilin. "Mia bona generalo, tio estas ŝerco; neblas ! Tio estas ridinda ! Vidu la belan vizaĝon kiun ni farus en bela salono, Mutie kaj mi".

La generalo rigardis Mutie^{on} kiu ridis, la enketjuĝiston kiu retenis bezonon ridi, Elfiaⁿ kiu eksplodis per ĝojaj ridadoj, kaj li komprenis ke lia propono estis nebla. "Estas

vere ! Estas vere ! Senĉese okazas al mi diri sensencaĵojn.
Supozu ke mi nenion diris".

MUT : Tio kion vi diris, mia generalo, pruvas vian
bonkorecon kaj vian bonvolon koncerne mi, kaj pro tio, mi
estas tre sincere danka al vi.

La enketjuĝisto salutis la generalon kaj foriris ridante
kaj murmurante : "Stranga originalulo !"

14 Aliaj strangaj pensoj de la Generalo.

Kiam ni kuniĝis por tagmanĝi, la petola okulo de la generalo altiris la atenton de Elfia. Ŝi atendis ian petolon, sed ne tiun kiun li meditis. Ĉe la fino de la manĝo kiu estis vigligita de la fantazioj de la infanoj pri la okazaĵoj pasintaj kaj estontaj, la generalo diris kun granda sopirĝemo :

"morgaŭ estos malĝoja tago por vi, mia kompatinda infano".

- Kial tio ? rebatis Elfia kun kelka timo.

GNR : ĉar ni estos forirantaj, Mutie kaj mi.

ELF : Forirantaj ! Morgaŭ ? Kial tiel rapide ?

GNR : Ĉar mia depozicio estanta farita, dank'al vi, mia kompatinda Elfia, ni havas nenion pli por fari ĉi tie, kaj ni iros kurace bani nin.

ELF : Via depozicio !... Tamen estas vere, Jozefo, estas mi kiu foririgas vin.

MUT : Nu ! Ĉu ne necesas ke ni elfinus nian resaniĝon ? Forirante pli frue, ni revenos pli frue, kaj ni geedziĝos pli frue, ĉio estas avantaŭo.

ELF : Estas vere, sed...

GNR : Sed vi eble volus akompani nin por flegi min tien. Mi ja ne petas pli bone, mi kunkondukas vin.

ELF : Kia malsaĝaĵo, generalo ! Vi ĉiam havas ideojn... ideojn...

GNR : Strangaj, sensencaj. Diru, diru, ne ĝenu vin.

ELF : Tute ne, generalo, mi havas en kapo neniu malhonestan penson pri vi; mi volis diri... amuzajn ideojn.

GNR : Vere, kiel mi diris ! Sensencajn kaj strangajn, estas la sama afero. Do mi havas absurdajn ideojn...

Dankon, fraŭlino Elfia.

ELF : Estas tre malbona tio kion vi diras, generalo... (la

generalo ridas), jes, tre malbona. Vi dirigas al mi sensencaĵon kiujn mi ne diris. Vi mokas min. Mi kredis vin pli bona ol tio.

Elfia eltabliĝis kaj eliris iom kolere; la generalo kiu ridis, diris al Mutie : "Rapide iru serĉi ŝin, mia amiko, diru al ŝi ke ŝi estas eta frenezulino, kaj ke ne urĝas al mi foriri, ke ŝi decidis mem la tagon de nia foriro, ke tio kion mi diris estas mia venĝo pro la depozicio kiun ŝi ŝteletis al mi profite al la enketjuĝisto. Jen ĉio".

Mutie foriris ridante, kaj ne bezonis longan tempon por reveni kun Elfia kiu alportis la kafon kaj la brandon kiujn ŝi metis sur la tablon.

- Ha ! Vi ŝatas venĝon, generalo, diris Elfia enirante kun ĝoja vizaĝo. Mi provos pagi al vi la ŝercon kiun vi ludis al mi, sed laŭ mia maniero, redonante bonon anstataŭ malbonon".

Kaj kliniĝante al la generalo, ŝi prenis al li manon kiun ŝi kisis respektoplene.

ELF : Mia bona, mia kara generalo, pardonu al mi mian familiaĵon, sed mia koro superfluas per dankemo. Mi ŝuldas al vi la feliĉon de mia vivo; kiel mi povus havi aliajn sentojn por vi ol tiujn de respektema tenereco ?

- Mia kompatinda, mia kara infanjo, balbutis la generalo kortuŝita brakumante ŝin kaj tutkore kisante ŝin. Kompatinda infano ! Bonega koro !

La generalo, kormoliĝante pli kaj pli, eltabliĝis siavice kaj foriris en sian ĉambron. Elfia ridetis, ankaŭ Mutie, sinjorino Blidot ridis, Jakobo kaj Paŭlo estis mirigitaj.

- Kial li ploras, diris Paŭlo, li deziras sian kafon, kompatinda generalo; onklino Elfia donu al li sian kafon, vi ja vidas ke li ploras.

JAK : Ne estas pro tio ke li ploras, Paŭlo. Mi kredas ke estas ĉar li volus ĉiam restadi kun ni, neniam foriri.

PAŬ : Nu ! Panjo, restigu tiun kompatindulon, li estos tiel kontenta !

BLD : Li ne konsentos, mia infano; li enuegus.

La generalo revenis kun la vizaĝo ruĝa, la haroj taŭzitaĵ. Paŭlo ekĵetis sin renkonte al li. "Generalo, restu kun ni ĉiam, vi estos kontenta, vi ne plu ploros !"

La generalo ridetis kaj, karesante la kapon de Paŭlo : "Mi ne volas resti, mia knabo, sed mi kunprenus vin ambaŭ kun mi se vi konsentus".

PAŬ : Mi ne volas foriri, mi volas resti kun panjo kaj onklino Elfia.

GNR : Kaj vi, Jakobo, ĉu vi volas ?

JAK : Mi ne volas forlasi Paŭloⁿ, panjon kaj onklinon Elfiaⁿ.

Jakobo prenis la manon de Paŭlo kaj forkondukis lin en la plej malproksiman angulon de la ĉambro kie ili kaŭriĝis kontraŭ la muro.

La generalo rigardis tiujn du beletajn infanojn kies la brunaj buklaĵ haroj plibeligis iliajn ĉarmajn vizaĝojn, iliajn freŝajn vizaĝkolorojn kaj iliajn kune dolĉajn kaj decidajn vizaĝesprimojn.

- Ĉarmaj infanoj ! diris la generalo duonvoĉe. Vere, mi ŝatus havi tiujn infanojn. Mi adoptus ilin : ili havas nek patron nek patrino. Nu, infanoj, li daŭrigis laŭte, venu kun mi, mi estos via eta paĉjo, Mi bone amos vin, mi donos al vi mian tutan monon, vi manĝados dum la tuta tago ĉion kion vi volos, vi estos feliĉaj kiel reĝoj. Ĉu vi volas ?

JAK firme : Ne, mi ne volas ! Mi amas panjon, mi amas mian onklinon, mi amas mian bonan amikon Mutie^{on}, mi amas ĉion ĉi tie. Mi ne bezonas monon, mi ne bezonas manĝi, mi ne volas pli ol tion kion mi havas.

PAŬ : Kaj mi ne volas paĉjon tiel maljunan, tiel dikan, tiel ruĝan. Mi pli bone amas mian bonan amikon Mutie^{on} kiu

neniam koleras, kiu neniam krias.

GNR promenante kun la manoĝ dorse : Bone, bone, miaj infanoj, sufiĉas tiel... Domaĝe ! Tiuj infanoj plaĉas al mi... Mi estus amanta ilin... Mi ja havas nenion por ami. Ĉiuj el miaj samfamilianoj mortis !... Tamen estas malagrabla ! Kaj kion mi faros per mia mono ? Tial ke mi neniun amas hejme ! Kaj tiuj kiujn mi amas ĉi tie ne deziras min. Kompatinda Durakino ! Mi ŝajnas esti feliĉa, kaj mi estas tre malfeliĉa ! Ho jes, mia povra Mutie, mia bona sinjorino Blidot, mia kara Elfia, mi ja estas mizera kompatinda homo ! Neniu amas min, neniu amos min. Kompatinda, kompatinda kiun mi estas !

Kaj la generalo ĵetis sin sur seĝon, apogis sian kapon kaj sian brakon sur la tablon, kaj komencis laŭte ĝemi. Liaj tri amikoj, malkvietaj pro tiu atako de malespero, alproksimiĝis al li por provi iajn konsolojn. Subite li abrupte ekstaris el sia seĝo kaj frapegis la tablon per sia pugno. Sinjorino Blidot, Elfia eksaltis dorsen, Jakobo kaj Paŭlo eligis timan krion, Mutie mem faris movon pro surprizo. La generalo rigardis ilin ĉiujn kun trankvila mieno.

- Kiel mi estas stulta, li diras, oni ne estas pli stulta ol mi estas. Mi, malfeliĉa ! kaj kial malfeliĉa ? Ĉar mi ne havas familion ? He ! Jovo, mi faros al mi familion, ne estas malfacile. Mi prenos Netaviŝtukoⁿ. Mutie iru serĉi por mi Netaviŝtukoⁿ, diru al la preposto ke mi volas kunpreni lin, adopti lin, doni al li sescent mil rublojn de rento. Iru do, mia amiko.

- Sed general, diris Mutie ridetante, mi ne scias ĉu la preposto bonvolos...

GNR : Kiel, ĉu li bonvolos ? Sescent mil rubloj de rento por iu malsatulo, por Netaviŝtuko ? Ni baldaŭ scios tion ! Mi mem ekiros.

Kaj la generalo kuris al la pordo, eliris sen eĉ kapti sian ĉapelon, rapidege transiris la straton kaj eniris ĉe la

preposto.

Mutie restis miregita. Sinjorino Blidot kaj Elfia surprize rigardis unu la alian, ili fine ridis. "Li estas iom freneza" diris sinjorino Blidot.

ELF : Domage ! Li estas bona.

MUT : Ho jes ! Tre bona, Elfia ! Se vi scius per kia pacienco li aŭskultis ĉiujn miajn rakontojn, per kia bonkoreco kaj kia delikateco li akceptigis al mi tion kio mankis al mi, kaj tion kiun miaj monrimedoj ne permesis doni al mi ! Kaj kiel li estis bona kaj antaŭzorgema pri nia geedziĝo ! Li ne estas stulta, ne. Li havas sian tutan racion, sed li estas stranga kaj li sin allasas al ĉiuj siaj unuaj impulsoj. Jen li kiu jam revenas. La dialogo ne estis longa.

La generalo eniris tiel hastege kiel li eliris. "Ĉu oni povas imagi similan urson ! li diris enirante. Li ne volas... Kaj ĉu vi scias kial ? Ĉar mi estas skismulo ! Jes, miaj amikoj, estas pro tio. Mi estas skis... mu... lo, li ne taksas min sufiĉe bona por eduki Netaviŝtukoⁿ. Estas nekredeble ! Li estas freneza tiu preposto ! Kaj plie, kian rajton li havas pri tiu infano ? Li ŝtelis lin al tiuj friponoj Burnieroj. Per kiu rajto li rifuzas la ŝancon de tiu infano ? Ha ! Li opinias ke li povas mastri ? Sed mi ja pledos ! Mi iros plendi al mia amiko la enketjuĝisto ! Mi enfermigis ĉi tiun preposton en malliberejon, kaj lia Netaviŝtuko kun li, se tiu ankaŭ rifuzas veni ĉe mi. Mutie, ni morgaŭ iros meti nian plendon al enketjuĝisto.

MUT : Sed, mia generalo...

GNR : Ne estas sed... Mi volas mian Netaviŝtukoⁿ.

MUT : Mia generalo, permesu al mi rimarkigi al vi ke Netaviŝtuko estas malbonedukita knabo, kiu eble hontigus vin en via lando. Eble li vivinte kun banditoj estas eĉ malvirta.

GNR : Tial vi pravas. Ĉi-rilate, li certe sakras, ŝtelas,

kiel la friponoj kiujn li servis. Estus belete ! Iu grafo Durakino sakranta kiel ĉaristo; ŝtelanta en la poŝoj de apuduloj ! Kaj mi ne pripensis pri tio ! Dankon, mia bonkora Mutie, vi malhelpis min fari egan azenaĵon.

MUT : Vi ne estus faranta ĝin, mia general ! Vi estus havanta tempon por pripensi. En Francio, la adoptoj ne estas facilaj, kaj la etulo estas franca.

GNR : Des pli bone, mia amiko, des pli bone. Mi tuj reiros al la preposto por diri al li ke mi rezignas pri Netaviŝtuko.

MUT : Mi iros diri tion al li, se vi volas, mia general, ĉar ĉiam estas malagrabra repreni sian vorton.

GNR : Mi bonvolas, mia amiko, sed ne domaĝu min, diru al li ke mi estas triobla stultulo, ke mi pardonpetas lin pro la sensencaĵoj kiujn mi ĵetis al li, ke mi iros morgaŭ mem peti pardonon pro tio.

MUT : Mi ne diros tion ĉion, generalo, sed mi diros por senkulpigi vin, ke vi estas la plej bona el la viroj.

Mutie ekprenis sian kepon kaj iris ĉe la preposton. Li ne bezonis penon por akceptigi la bedaŭrojn de la generalo. La preposto volonte ridis kun Mutie pri la stranga ideo de la adoptado de Netaviŝtuko, kiun cetere ili taksis ne serioza kaj pri kiu la generalo rezignis sen eĉ diskuti ĝin.

15 La Foriro.

Kiam Mutie revenis, Elfia denove parolis al li pri la foriro por la kuracbanejoj. "Mi pripensis, ŝi diris, kaj mi kredas ke la plej frue estos la plej bone, ĉar necesas ke tio estu".

MUT : Vi scias, Elfia ke la generalo metis sin sub via dispono, kaj ke estas al vi por decidi la tagon.

ELF : Kaj kion vi dirus, se mi dirus kiel la generalon, morgaŭ ?

MUT : Mi dirus: "Mia komandanto, vi pravas", kaj mi forirus.

ELF : Dankon, Jozefo, dankon pro via fido en mia komando. Mi instigas vin, laŭ tio, fari viajn preparojn por morgaŭ.

MUT : Necesas ke mi informu la generalon.

ELF : Jes, jes, kaj provu ke li ne ekkoleros kaj li ne havos ian ideon... laŭ sia maniero.

Mutie eniris ĉe la generalon kiu skribis. Mia generalo, ni foriros morgaŭ se vi ne metas baron.

GNR : Kiam vi volos, mia amiko, mi restis ĉi tie pli por vi kaj Elfia ol por mi. Mi bone fartas kaj estas preta por daŭrigi mian vojon. Mi ĵus estis skribanta al iu aŭtovendisto kiun mi konas en Parizo, tuj sendi al mi bonan vojaĝaŭton; tiuj friponoj Burnieroj ŝtelis al mi la mian kaj mi estas piediranto.

MUT : Sed, mia generalo, vi ne havos vian aŭton antaŭ dek aŭ dek kvin tagoj kaj kion vi farus ĉi tie dum tiu tuta tempo ?

GNR : Vi pravas, mia kara, sed tamen mi bezonas aŭton por foriri. Mi ja ne ŝatas la vojojn laŭ etapoj, kaj kiel trovi

bonan aŭton en tiu lando ?

Mutie tordetis siajn lipharojn, li serĉis rimedon. "Se mi irus en la apudan vilaĝon por serĉi iun, general ?"

GNR : Iru, mia amiko. Kie estas sinjorino Blidot ?

MUT : En la akceptejo, mia generalo, por servi kelkajn vojaĝantojn kun Elfia.

GNR : Demandu do al ili, ĉu ne ekzistas diliĝenco kiu pasas tra ĉi tie.

Mutie eliris kaj revenis kelkajn momentojn poste. Mia generalo, estas inter unu kaj du leŭgoj de ĉi tie, korespondo de la fervojo; ĝi okazas ĉiutage tagmeze.

GNR : Se ni irus trafi ĝin morgaŭ ?

MUT : Mi ne diras ne, mia general, sed kiel vi iros ?

GNR : Piede, kiel vi.

MUT : Mia generalo, pardonu min se mi rimarkigas al vi ke du leŭgoj kiuj estus nenio por mi, estos tro por vi.

GNR : Kial tio ? Ĉu mi estas tiel maljuna ke mi ne plu povu paŝi ?

MUT : Tute ne, mia generalo, sed... via vundo...

GNR : Nu ! Mia vundo... ĉu vi ne havas iun kiel mi ? Iun kuglon tra la korpo.

MUT : Estas vere, mia generalo, sed... ĉar mi estas pli maldika ol vi... do...

GNR : Do kio ? Nu parolu, sinjoro **silfo**.

MUT : Mia general... do... do la kuglo havis malpli da vojiro por fari, ŝiris malpli da karno... kaj mia vundo estas malpli terura.

La generalo rigide rigardis lin : "Mutie, rigardu min ! (li montris sian nazon), kaj provu rigardi min sen ridi. (Mutie rigardas, ridetas kaj mordas siajn lipharojn por ne plene ridi). Vi ekkonscias ! vi ridas ! Kial ne sincere diri : Generalo, vi estas tro dika, tro peza, vi restos survoje ! (Mutie volas paroli). Silentu ! Mi scias tion kion vi volas diri.

Kaj mi ja diras al vi ke mi paŝadas tute kiel alia, ke mi piediros, eĉ se vi trovus por mi dek aŭtojn por transporti min.

MUT : Mia generalo, mi estas tute je via dispono, sed mi timas... ke vi multe laciĝus; kun tio ke varmas.

GNR : Mi sukcesos, mia amiko, mi sukcesos. Nun, mian pakadon. Unue, mi lasas ĉi tie ĉiujn miajn vestaĵojn, mi kunportos nur oraĵojn kiujn vi metos en vian poŝon, la monpaperujon kiun mi kunportos en la mian, subvestojn por ŝanĝi survoje kaj miajn tualetaĵoj en mian poŝon. Mi tie aĉetos tion kion mankos al mi.

La generalo, kontentega foriri piede, turiste, radiante eniris en la akceptejon kie troviĝis nur unu sola vojaĝanto, iu soldato. Tiu soldato staris aparte, zorgis pri neniu, ne diris eĉ unu vorton. Lia senpretenda manĝo venis al fino. La generalo atente rigardis lin. Li vidis lin eltiri sian monujon, kalkuli la malgrandan sumon kiun ĝi enhavis kaj elpreni heziteme el ĝi moneron de unu franko. "Kiom, Sinjorino ?" li diris al sinjorino Blidot.

BLD : Pano, du soldojn; fromaĝo, du soldojn; cidro, du soldojn. Totalo, ses soldojn aŭ tridek centimojn.

La vizaĝo de la soldato vigliĝis per duonrideto pro kontentiĝo.

La Soldato : Mi timis esti farinta tro altan elspezon. Vi forgesis la rafanetojn.

BLD : Ho ! La rafanetoj tute ne gravas, sinjoro.

Ĝuste kiam li estis pagonta, Elfia, al kiu la generalo flustris vorton al orelo, metis antaŭ la soldato tason da kafo kaj glason da brando.

- Mi ne petis tion, diris la soldato kun duone timigita mieno.

ELF : Mi ja scias tion, sinjoro, tial tio ne estos kunkalkulata. Ni krome donas al militistoj tason kaj

glaseton.

La soldato residiĝis kaj glutis malrapide kaj kun plezurego la kafon kaj la brandon.

SLD : Multajn dankojn, fraŭlino, mi ne forgesos la Gardanĝelon nek ŝiajn afablajn gastigantinojn.

GNR alproksimiĝanta lin : Al kiu direkto vi iras, mia bravulo ?

- Al kuracbanejoj de Bagnolo, respondis la soldato mirigita.

GNR : Mi iras ankaŭ tien. Ni povos troviĝi ĉe la fervojo por kune vojiri.

SLD : Tre flatita, Sinjoro, sed mi iros al **Domfronto** por trafi la korespondon de la fervojo...

GNR : Kaj ankaŭ ni. Vere ! Tio bone okazas, ni foriros morgaŭ ! Ĉiuj tri soldatoj ? Tio estos bonege !

SLD : Necesas ke mi tuj foriros, Sinjoro, oni atendas min ĉi tiun vesperon mem pro grava afero. Tre bedaŭrinde, Sinjoro ! Ni troviĝos en Bagnoloⁿ.

La soldato metis la manon al sian kepon kaj eliris kun la sama mieno grava kaj malĝoja, kiun li havis enirante. Sur la sojlo de la pordo, li ekvidis Jakoboⁿ kaj Paŭloⁿ kiu revenis kurante. Li ektemis rigardante Jakoboⁿ, sekvis lin per la okuloj interese kaj ekvojiris nur kiam li aŭdis Jakoboⁿ diri al sinjorino Blidot :

- Panjo, sinjoro preposto estas tre kontenta pri mi.

Jakobo vidigis sian poentaron kaj tiun de Paŭlo. Ili estis tiel bonaj ke la generalo volis nepre donaci al ĉiu po unu ora monero.

- Prenu, miaj infanoj, prenu, li diris, tio estas la adiaŭo de la kaptito. Ne estus bone rifuzi al mi ĉar mi estas nur kompatinda kaptito.

JAK : Ho ! Mia bona generalo, kiel vi povas kredi ?... Vi estas tiel bona.

GNR : Do, prenu.

Kaj li enŝovis al ĉiu la oran moneron en ilian poŝon.

La tago finiĝis serioze. La generalo estis hastema por foriri kaj iris senĉese malordigi siajn aferojn sub preteksto de ordigi ilin. Mutie kaj Elfia estis malĝojaj forlasi unu la alian. Sinjorino Blidot estis malĝoja pro ilia malĝojo. Jakobo bedaŭris sian amikon Mutie^{on} kaj eĉ la generalon kiu estis tiel bona kun li kaj kun Paŭlo. Oni disiĝis suspirante, ĉiu iris enlitiĝi. La morgaŭon, oni kuniĝis por matenmanĝi, necesis foriri antaŭ la naŭa por alveni akurate.

- Nu, diris la generalo unue leviĝante, adiaŭ, miaj bonaj gastigantinoj, kaj ĝis revido.

Li kisis sinjorinon Blidot^{on}, Elfiaⁿ, la infanojn kaj direktis sin al la pordo. Mutie faris kiel li siajn adiaŭojn, sed kun pli da tenereco kaj da emocio. Kaj li sekvis la generalon ĵetante lastan rigardon al Elfia.

16 Netaviŝtuko senvualigās.

Jakobo ankoraŭ ploris la foriron de sia amiko; Paŭlo viŝis al li la okulojn per sia beleta poŝtuko kaj angore rigardis lin; Elfia iris ordigi la ĉambron de Mutie; sinjorino Blidot aranĝis tiun de la generalo kiu estis ĵetinta ĉion ĉien.

- Ĉu oni povas imagi tian senzorgulon? diris sinjorino Blidot. Li nenion ordigis; ĝis lia monskatolo kiun li lasis malferma. Ĉiuj liaj juveloj, liaj ordenoj el juvelŝtonoj, lia vojaĝilaro el orarĝento! Jen ili dekstre, maldekstre; ne estas kredebla! Kaj estas mi kiu devos respondeci pri tio ĉio! Kia stranga viro! Mi vetas ke li ne eĉ scias tion kion li havas.

Dum ŝi provas kolekti la disajn objektojn, Jakobo eniris.

JAK : Panjo, jen Petro Netaviŝtuko kiu koleras kontraŭ mi, ĉar mi ne informis lin ke la generalo foriris. Ĉu vi opinias ke mi malpravis?

BLD : Sed ne, mia infano, vi ne bezonis informi Netaviŝtukoⁿ; por kion fari?

JAK : Li diris ke la generalo estus kunpreninta lin.

BLD : Kunpreninta? Nu, kia ideo!

Netaviŝtuko eniris en la ĉambron.

NTV : Jes, certe, li estus kunpreninta min, ĉar li volis filigi min, estas la preposto kiu malpermesis lin. Kaj se mi ĉimatene alvenus ĝustatempe, mi estus foririnta kun li. La preposto havas neniun rajton super mi; li ne povas malpermesi la generalon kunpreni min.

BLD : Netaviŝtuko, tio kion vi diras nun estas tre malbona. S^{ro} preposto bonvolis varti vin kiam vi estis malfeliĉa kaj forlasita, kaj li zorgas vin pro bonkoreco kaj por via feliĉo.

NTV : Kaj mi ne volas resti kun li. Mi bone aŭdis tion kion la generalo diris kaj tion kion la preposto respondis. Li malebligis min esti riĉa kaj esti sinjoro, kaj mi ne volas resti ĉe li por labori kaj enui. Mi volas ke oni konduku min al la generalo.

BLD : Ŝajnas al mi, mia knabo, ke vi havas bonan bekon ekde hieraŭ. Vi estis nek tiel parolema nek tiel memvola kiam vi estis ĉe via mastro.

NTV : Mi ne plu havas mastron kaj mi ne plu volas lin. Mi volas iri kun la generalo.

BLD : Bone ! Iru kun li, se vi kapablas, kaj lasu nin trankvilajn. Jakĉjo mia, venu helpi min premi ĉion tion.

NTV : Kion vi havas tie ? Estas la aferoj de la generalo. Se li filigus min, ĉio estus al mi. Kial vi prenis ilin ? Mi diros tion al la ĝendarmoj kiam mi vidos ilin.

BLD : Diru tion kion vi volos, malbona knabo, sed foriru, lasu nin fari nian laboron.

Netaviŝtuko, anstataŭ foriri, eniris pli antaŭen en la ĉambro, kaj sen ke sinjorino Blidot kaj Jakobo ekrimarkis tion, li ekkaptis pokaletan kaj manĝilon el orarĝento kaj metis ilin sub sia bluzo en la poŝon de sia pantalone. Jakobo estis helpanta sinjorinon Blidot^{on} reloki la pecojn de la vojaĝilaro. Ili penege sukcesis sed du fakoj restis malplenaj.

JAK : Io mankas, panjo; ŝajnas ke estas glaso kaj manĝilo kiuj mankas; vidu la formon de malplenaj lokoj.

BLD : Estas vere ! Ni eble mismetis la aliajn pecojn.

Netaviŝtuko elŝteliĝis dum sinjorino Blidot kaj Jakobo provis plenigi la du malplenaĵojn de la ilaro.

BLD : Neeblas, mia amiko, la du pecoj mankas, tio estas certa.

JAK : Mi tamen estas certa ke ĉio estis plena kiam la generalo malfermis al ni ĉi tiun belan ilaron.

BLD : Li eble kunportis ilin. Tio kio estas certa, estas

ke ni serĉis ĉien sen trovi ion. Ĉu Netaviŝtuko ?

JAK : Ho ! Ne, panjo ! Netaviŝtuko foriris. Kaj plie, li ne farus malbonan aferon kiel tian. Juĝu do ! Li estus ŝtelisto !...

BLD : Mia bona Jakĉjo, vi estas bona kaj honesta infano, vi, sed tiu kompatinda knabo kiu vivis ĉirkaŭita de malbonaj homoj, certe ne estas bonuleto. Konstatu kiel li estas sendanka. Vi aŭdis lin minaci nin per ĝendarmoj ? Kaj tamen jen tri jaroj kaj pli ke ĉiutage vi iris alporti al li lian tagmanĝon ĉe la puto.

JAK : Estas vere, panjo, sed li ne pensis pri tio kion li diris. Mi kredas ke li amas nin kaj ke li estas dankema al vi pro nutri lin ekde tri jaroj.

Sinjorino Blidot respondis nur kisante Jakoboⁿ. Ŝi enŝlosis la juvelojn kaj la aliajn aĵojn de la generalo en ŝrankon kies ŝi kunprenis la ŝlosilon, kaj sendis Jakoboⁿ kaj Paŭloⁿ al la lernejo kie ili iris ĉiutage. Elfia eklaboris, ŝi estis malĝoja, kaj ŝia fratino bezonis sufiĉe da tempo antaŭ sukcesi ridetigi ŝin. Ĉirkaŭ la mezo de la tago, la vojaĝantoj komencis alveni, tio kio donis al la du fratinoj sufiĉe da okupado por malhelpi ilin pensadi pri la forestantoj.

Kiam Netaviŝtuko eniris en la pastrejon, la preposto demandis al li ĉu li iris al la lernejo.

NTV : Ne, mi scias nenion, kaj la lernejo tedas min.

PRP : Estas ĉar vi scias nenion ke la lernejo tedas vin ! Kiam vi scios ion, vi amuzos vin tie.

NTV : Estas tro malfacila.

PRP : Mia kompatinda infano, tio kion vi faris ĉe via malafabla mastro estis multe pli malfacila, kaj tamen vi faris tion.

NTV : Ĉar mi estis devigata.

PRP : Necesos ja ke vi lernu legi, skribi kaj kalkuli, alie vi ne sukcesos dungigi ien.

NTV : Mi ne bezonas dungiĝi.

PRP : Vi, pli ol alia, mia infano, ĉar vi ne havas gepatrojn por veni helpe al vi.

NTV : Ba ! Ba ! Mi scias tion kion mi scias.

PRP : Kaj kion vi scias, mia infano, kiun mi ne scias ?

NTV : Ho ! Vi ankaŭ bone scias tion, nur vi ŝajnigas ne scii.

PRP : Mi certigas vin ke mi ne komprenas kien vi celas.

NTV : Mi celas diri al vi ke vi ne estas mia mastro, ke la generalo volis doni al mi sian tutan monon kaj fari min sian filon, ke estas vi kiu malpermesis lin, kaj ke mi ja volas esti riĉa kaj fariĝi bela sinjoro.

La bona preposto, mirigata de la aŭdaco kaj de la riproĉoj de ĉi tiu knabo kiu antaŭ tri tagoj tremis antaŭ ĉiuj, restis muta, rigardante lin kun surprizo.

NTV : Vi ŝajnigas ne kompreni ! Vi kredas ke mi ne aŭdis tion kion diris al vi la generalo kaj kiel vi rifuzis doni min, kvazaŭ mi apartenis al vi. La generalo amas min kaj li kunprenos min okaze de sia reveno, kaj tiam vi vidos tion kion mi faros.

- Kompatinda, kompatinda infano, diris la preposto kun larmoj en la okuloj kaj la voĉo tremanta pro emocio. Kompatinda etulo ! Vi malbonfaras sen scii tion; neniu sciigis al vi tion kio estas malbona kaj tio kio estas bona !... Vi kredas, mia infano, ke la generalo estus kunpreninta vin ? Ke estas mi kiu malpermesis lin ? Mi scias ke mi ne rajtas reteni vin kontraŭvole; ke vi povas tuj foriri se vi volas. Sed kien vi iros ? Kion vi faros ? Kiu nutros kaj gastigos vin ? Tio kion mi faras por vi, mi tion faras pro helpemo, pro la Diamo por helpi al vi, al vi, kompatinda estulo de la bona Dio. La generalo ekpensis kunpreni vin; la ideo tuj malaperis, li mem ridis de tio.

NTV : Kiel vi scias tion, ĉar li ne revenis vidi vin ?

PRP : Li sendis al mi Mutie^{on}, por sciigi tion al mi. Mi pardonas al vi tion kion vi ĵus diris, mia amiko, kaj tamen mi daŭrige proponas al vi azilon ĉe mi dum vi ne trovos pli bonan. Ni altablighu kaj tagmanĝu sen pensi pri tio kio okazis inter ni.

La bona preposto pasis en la ĉambbron kie atendis lin lia tagmanĝo kaj lia servistino. Netaviŝtuko, iom honta, duone pentanta kaj hezitema, altablighis kaj manĝis kvazaŭ estis nenio kiu maltrankviligis lin. Ne estis same pri la preposto, kiu estis malĝoja kaj kiu pripensis pri la eblojn revenigi Netaviŝtukoⁿ al pli bonaj sentoj. Li decidis intensigi la bonkorecon koncerne lin kaj nur postuli de li sin deteni malbone fari.

17 Unua etapo de la generalo.

Dum Netaviŝtuko ŝteladis, insultis siajn bonfarantojn, dum Jakobo defendis lin kaj rikoltis ĉe la lernejo bonajn poentojn kaj laŭdojn, dum Elfia kalkulis la horojn kaj la tagojn kiuj disigis ŝin de ŝia estonta edzo, dum sinjorino Blidot zorgis ĉion, pririgardis ĉion kaj pensis pri la komforto de ĉiuj, la generalo piediris per decida paŝo al Domfronto, eskortata de Mutie kiu diskrete rigardis lin kun kelka timeto. Dum la unua duonleŭgo, la generalo estis lerta kaj eĉ tro vigla. Laŭmezure kiel li antaŭeniris, lia irado malrapidiĝis, plipeziĝis. Li ŝvitis, ventumis sin per sia poŝtuko, spiregis kiel lacajn ĉevalojn. Mutie proponis al li ripozi dum momento sur malgranda teralto piede de arbo, la generalo rifuzis kaj komencis skuiĝi. Li demetis sian ĉapelon, viŝis la frunton.

GNR : Estas tre varmege, Mutie. Ekde Sebastopolo, mi ne ŝatas altan varmon. Ni ja havis ĝin tie ! Kia kuirado ! Kaj ne unu ŝirmejo... Mi bezonas demeti mian surtuton, estas tiel varmaj tiuj dikaj drapoj !

MUT : Donu ĝin al mi, ke mi portu ĝin, mia general. Ĝi tro ŝarĝus vin.

GNR : Tute ne, mia kara; lasu do. En milito, nek lito, nek ĉambro.

La generalo iris kelkajn paŝojn.

GNR : Skorzonero ! Kiel estas varme !

MUT : Donu, mia generalo; tio sufokas vin.

GNR : Kaj vi do, per Jovo ! Se ĝi estas peza por mi, ĝi ankaŭ estas peza por vi.

MUT : Mi, mia generalo, mi ne trapasis tra ĉiuj gradoj por atingi la vian, kaj mi povas porti vian surtuton sen ia ajn

laciĝo.

GNR : Tio kio signifas ke mi estas tre maljuna skeleto kiu taŭgas por nenio, dum vi, juna, bela, fortika, ĉio eblas al vi.

MUT : Tio ne estas tio kion mi volas diri, mia generalo, sed mi pensas pri tio kio necesis al mi sperti de laciĝoj, suferoj, senecoj el ĉiuj specoj por atingi la rangon de serĝento. Kaj mi klinas min kun respekto antaŭ via generala rango kiun vi konkeris per la pinton de via sabro.

La generalo ŝajnis kontenta, ridetis, donis sian surtuton al Mutie kaj premis al li la manon. "Dankon, mia amiko, vi kapablas flati milde, agrable kaj sen humiligi vin, ĉar vi estas bona. Elfia estos feliĉa ! Ŝi estas bonŝanca trafi edzon kiel vi !... Oho ! Kiel la vojo estas longa !

La kompatinda dika generalo trenis la kruron, li estis lacega. Li strabe rigardis dekstren kaj maldekstren de la vojo por malkovri oportunan lokon por ripozi. Li ekrimarkis unu kiu plenumis ĉiujn postulatajn kondiĉojn, nealtan teramason piede de folioriĉa arbo, neniun ŝtonon, muskon kaj herbon. Mutie bone vidis la strategion de la generalo kiu turnis, haltis, suspiris, lamis, sed kiu ne kuraĝis konfesi sian ekstreman laciĝon. Fine, vidante ke Mutie nenion diris kaj ŝajnis nenion rimarki, li haltis :

- Mia bona Mutie, li diris, vi estas ŝvitoplena, mia surtuto maldolĉigas vin, ni sidiĝu ĉi tie, ĝi estas bona loketo, intence metita por refortigi vin.

MUT : Mi asertas al vi, mia generalo, ke mi ne estas laca kaj ke mi iros per la saman paŝadon ĝis la fino de la tago.

GNR : Ne, Mutie, ne, mi vidas ke vi suferas pro varmo, kaj ke vi estas laca.

MUT : Por provi al vi ke mi ne estas tia, mia generalo, mi tuj akcelos la paŝadon.

Kaj Mutie, kaŝridante, komencis la gimnastikan

trotadon de la ĉasistoj de Afriko. La kompatinda generalo, kiu sentis sin senfortiĝinta, ekkriis, alvokis. "Mutie ! Haltu ! Kiel diable, vi volas ke mi sekvu vin ? Pro tio ke mi diras al vi ke mi estas lacega, ke mi ne plu povas meti iun piedon antaŭ la alian. Ĉu vi bonvolu reveni... Diabla viro ! Li intence ne aŭdas min".

Mutie fine sin turnis, kurpaŝe revenis al la generalo kaj trovis lin sidanta ĉe la piedo de tiu arbo sur tiu teralto kiun Mutie rifuzis. "Kiel, mia generalo, jen vi restinta ? Mi kredis ke vi sekvis min".

GNR acidhumore : Kiel vi volas ke mi sekvu diablan viron kiu paŝas kiel cervon ? Ĉu mi havas la irmanierojn de cervo, mi ? Ĉu mi estas skulptita kiel cervo ? Ĉu viro el mia aĝo, el mia dikeco, vundita, malsana, kapabas kuri dum leŭgoj sen aŭ respiri aŭ ripozi ?

MUT : Sed tutĝuste estas tio kion mi diris al vi, mia generalo; vi ne volis kredi al mi.

GNR : Vi diris tion al mi kiel por moki min, rektigante vin laŭ via tuta alteco kaj preta fari kapriolojn, por vidigi al Elfia vian belan sveltan talion, vian lertan aspekton, kaj por komparigi kun mia grasa ventro, mia dika talio , miaj pezaj kruroj. Oni havas sian memestimon, kiel mi jam diris tion al vi, kaj ni ne volas antaŭ fraŭlino kaj juna virino, ŝajni kiel kriplulo, podagrulo, kaduka maljunulo.

MUT : Mi certigas vin, mia generalo...

GNR : Mi diras al vi ke tio ne estas vera, ke estas tiel.

MUT : Sed, mia generalo...

GNR : Ne estas de sed, vi kredas ke mi ne vidis vian petolecon freneze ekkuregi por spiti min. Vi diris al vi : "Vi sidigos vin, mia bonulo, vi ripozos, mia oldulo ! Mi kuras, vi ja haltigas vin, mi kapriolas, vi ja falas. Vivu la junuloj ! Mortu la maljunuloj ! Jen tio kion vi pensis, Sinjoro; kaj via ridetanta buŝo pli diras pri tio ol via lango".

MUT : Mi tre bedaŭras, mia generalo, ke mia buŝo...

GNR : Bedaŭranta ? Nekredeme ! Vi estas kontentega; vi kaŝridas; vi volus vidi min pendigi la langon kaj treni la kruron, kaj ke mi restu survoje, por diri : "Jen por puni la orgojlon de tiu malnova kribrilo destruita per kugloj kaj per bajonetaj pikoj !" ĉar mi ricevis vundojn, neniu ricevis tiom kiom mi. Jes, Sinjoro, kion ajn vi diris pri mi, kiam vi levprenis min en Malakofo, ĝuste kiam mi estis duafoje dissaltonta, mi havis pli ol kvindek vundojn sur la korpo. Kaj sen vi, Sinjoro, mi neniam eskapus viva. Estas vi kiu savis mian vivon, mi tion ripetas kaj ĝin rediros ĝis la fino de miaj tagoj. Kaj vi vane direktas al mi koleregajn rigardojn (tiu kiu estas tre malkonvena de la flanko de serĝento al generalo), vi ne silentigos min, kaj mi diskrios sur la tegmentoj : "Estas Mutie, la brava serĝento el la Zuavoj kiu savis min riskante pereji kun mi kaj por mi. Kaj mi neniam forgesos lin, kaj mi amas lin, kaj mi faros ĉion kion li volos, kaj li faros per mi tion kion li deziras".

La generalo, konfuzita de sia pasinta kolero kaj de sia nuna teneriĝo, etendis la manon al Mutie kaj provis stariĝi sed refalis. Mutie sidiĝis apud li.

"Ni ankoraŭ ripozu, mia generalo, mi nur alvenas. Ankaŭ mi ja havas vundon kiu ĝenas min por paŝi, kaj mi estus plenkontenta...

- Vere ? diris la generalo kun evidenta kontentiĝo, ĉu vi vere bezonas ripozi ?

MUT : Tre vere, mia generalo. Tio kion vi rigardis kiel petolecon, estis blufado, la entuziasmo de Zuavo. "Ha ! Kiel estas bone ripozi en la freŝa loko", li daŭrigis, kuŝiĝante sur la herbaro kvazaŭ li sentis sin vere laca.

La generalo, kontentega, malstreĉiĝis kaj senhezite apogis sin kontraŭ la arbo. Li fermis la okulojn kaj ne malfruis endormiĝi. Kiam Mutie aŭdis lin ronketi, li stariĝis

kaj lerte rapide foriris, lasante apud la general, paperon sur kiu li skribis :

"Atendu min, mia generalo, mi baldaŭ revenos".

La generalo dormis Mutie kuris; ŝajnis ke lia vundo ne multe ĝenis lin ĉar li senhalte kuris ĝis Domfronto. Li demandis al la unua ulo kiun li renkontis kien li povus trovi veturilon por lui. Oni indikis al li gastejstron kiu ludonis ĉion. Li iris tien kaj pritraktis kariolon, ĉevalon kaj kondukiston, tuj jungigis, enveturiĝis kaj vojirigis trotege al Lumigni. Li ne malfruis alveni al la teralto kaj al la arbo kie li lasis la generalon. Neniu ! La generalo malaperis, lasante sian surtuton kiun Mutie delasis surgrunden apud li.

La kompatinda Mutie eksentis dum momento teruron. La koĉero, vidante la difektŝanĝon de tiu bela vizaĝo tiel sincera, tiel memfida, tiel gaja, fariĝinta afliktita, maltrankvila, preskaŭ timigita, demandis al li tion kio kaŭzis lian timeton.

MUT : Mi lasis ĉi tie tiun bonan generalon, trolacigita kaj dormanta. Mi retrovis nur lian surtuton. Kio li fariĝis ?

La koĉero : Li eble reiris, ne vidante vin reveni.

MUT : Ej, estas ideo ! Dankon, mia amiko, tiam ni daŭrigu ĝis Lumigni.

La koĉero vipis sian ĉevalon kiu ekiris trotege. Ili ne malfruis alveni al la Gardanĝelo. Mutie desaltis malsupren de la kariolo, hastege eniris kaj trovis sin antaŭ la generalo en liaj ĉemizmanikoj, kun lia dika ventro disvolviĝante laŭ ĝia tuta amplekso, kun la vizaĝo ruĝa kvazaŭ ĝi baldaŭ eksplodis, kun lia buŝo gapanta, kun la okuloj konfuzitaj pro surprizo.

La generalo estis la unua por rekoni lin. "Kio signifas tiu ĉi ŝerco, Sinjoro ? Ĉu mi estas pulĉinelo, diknazulo, pieroto, por ke permesu al vi tian petolaĵon ? Forlasi min tie ĉe la piedo de arbo ! Perdi min kiel la "**Malgranda Fingreto**" ! Profiti dormon kiun vi perfide kaŭzis, ŝajnigante mem dormi !

Kio estas, Sinjoro ? Diru ! Parolu !

MUT : Mia generalo...

GNR : Neniu el viaj mielaj vortoj, Sinjoro ! Klarigu vin...

Diru...

MUT vige : Kaj kiel vi volas ke mi klarigu min, mia generalo, kiam vi ne lasas al mi dire vorton ?

GNR : Parolu, Sinjoro la malpacienulo, la kolerulo, la sencerbulo, parolu ! Ni aŭskultas vin.

MUT : Mi diros al vi per du vortoj, mia generalo, ke vidante vin elĉerpita, sufereganta, mi utiligis vian dormon...

GNR : Por forkuri, evidente, mi bone scias tion.

MUT : Sed ne, mia generalo; por kuri sturmopaŝe ĝis Domfronto serĉi por vi veturilon kiun mi trovis, kiun mi venigis per tre trotanta ĉevalo, kaj kiu estas ĉi tie, ĉe la pordo, preta por kunpreni vin, ĉar necesas ke ni foriru. Kaj nun, mia generalo, ke mi klarigis min, mi devas diri du vortojn al Elfia kiu ridas en sia anguleto.

Kaj irante al Elfia, li mallaŭte parolis al ŝi kaj rakontis al ŝi ion verŝajne agrabla ĉar Elfia ridis kaj Mutie ridetis. Necesas diri ke la eniro de la generalo ĉemizmanike, pene desaltanta de sur azeno ĉe la pordo de la Gardanĝelo, ekscitis la gajecon de Elfia kaj de ŝia fratino, kaj ke ŝi estis ankoraŭ sub tiu impreso. La generalo ne moviĝis, li restis meze de la ĉambro, kun la brakoj krucitaj, la kruroj disigitaj, liaj vejnoj malŝveliĝis, la violeta ruĝeco de lia vizaĝo anstataŭiĝis per senmiksa ruĝo, liaj brovoj malstreĉiĝis, lia frunto glatiĝis.

GNR : Mia brava Mutie, mia amiko, pardonu min, mi ne havas komunan saĝon. Ni rapide foriru en via kariolo ! Bona ideo, vere ! Bonega ideo !

Kaj la generalo adiaŭis la du fratinojn, premis la manojn de Mutie kiu bonkore pardonis kaj venis helpi la generalon por surmeti lian surtuton kaj suririgi lin en la kariolon kie li

sidiĝis apud li.

Kiam ili estis post kelka distanco de la vilaĝo, Mutie demandis al la generalo kial li ne atendis lin, kaj kiel li kapablis revojiri ĝis Lumigni.

- Mia kara, kiam mi eldormiĝis, mi estis sola. Afliktita unue, kolerinta poste, mi ne sciis tion kion fari, kien iri, kiam mi ekvidis vian paperon.

"Atendi lin! mi diris al mi, mi bondeziras tion al vi! Mi, generalo atendi serĝenton! Ne, miloble ne. Ha! Li forlasas min tie! (Mi estis kolera, sciu). Li trudas min paciencce atendadi lin! Ankaŭ mi ja faros ian petolon al li, ankaŭ mi ja promenos miaflanken dum li promenas siaflanken. (ankoraŭ kolerinta, ne forgesu). Tiam mi stariĝis, mi sentis min bone ripozinta, mi returnis min kaj revojiris al nia bona Gardanĝelo. Mi renkontis viron kun azeno, mi petis al li rajdi sur ĝi (ĉar mi estis spirmanka, mi rapide paŝis por eskapi al vi). La viro hezitis, mi donis al li kvinfrankan moneron. Li demetis sian ĉapeton, sin klinis ĝis grundo, helpis min rajdi sur la azeno, sidiĝis sur grupo malantaŭ mi, kaj jen ni trote foririntaj. Tiu fripono de azeno havis la trotadon malagrabra! Ĝi skuis min kiel sakon da nuksoj. Ni havis, mi pensas, tute ridigan ŝajnon. Ĉiuj kiuj renkontis nin, ridis kaj returnis sin por ankoraŭ vidi nin. Mi alvenis ĉe Gardanĝeloⁿ. Elfia eligis krion kaj paliĝis kiel la luno. Mi rapidege trankviligis ŝin pri vi, ĉar estis por vi, malbona homo, ke ŝi paliĝis. Kaj mi, vi kredas ke ŝi timis vidante min ĉemizmanike reveni sur azeno kun ulo postsele? Ha! Nu, jes timo! Ŝi fuĝis por ridi laŭ sia plaĉo. Tio ja meritis tion, vere! Ŝi sendis al mi sinjorinon Blidot^{on}. Ĉi tiu estas bona virino! Ne ia frenezeta kiel via Elfia... Nu do, jen vi ruĝa kiel omaro, viaj okuloj ĵetas al mi fulmojn! Oni ja povas diri pri juna kaj beleta knabino ke ŝi estas frenezulineto!... Bonege! Vi ridas nun. Ne estis duonhoro ke mi estis tie kiam vi alvenis

kiel uragano. Mi ne antaŭvidis tion, mi konfesas tion. Mi ekstaris surprize.

Mutie siavice rakontis sian konsterniĝon kiam li ne retrovis la generalon. La vojo ne estis longa. Ili atingis Domfrontoⁿ, tro malfrue por trafi la korespondtrajnon. La generalo luprenis veturilon kiu feliĉe estis jungita de bonega ĉevalo, kaj ili alvenis akurate por la foriro de la fervojo de la kvara horo.

18 La Kuracbanejoj.

Post esti iom haste vespermanĝintaj, ili iris preni siajn biletojn ĉe la giĉeto. La generalo rekonis la soldaton kiun li vidis la antaŭtagon ĉe la Gardanĝelo.

- Tri biletojn Mutie; tri de unua klaso ! ekkriis la generalo.

Mutie transdonis al li du kaj tenis unu el ili, sen kompreni la kialon de ĉi tiu nova kaprico de la generalo. Tiu ĉi donis unu el la biletoj al la soldato kiu sekvis lin de proksime. La soldato metis la manon al sian kepon kaj dankis la generalon kiam li rekuniĝis kun li. Ili eniris ĉiujn tri en la saman vagonon, Mutie estinta skolte sendita por gardi la tri lokojn.

Dum la vojaĝo, la generalo konatiĝis pli komplete kun la soldato kiu, kiel li, batalis dum la Krimean militon. La ĝentila deteniĝemo de la soldato, liaj klaraj kaj modestaj respondoj, lia honesta kaj inteligenta tuteco multe plaĉis al la generalo, facile entuziasmiĝanta kaj ĉiam ekstrema en liaj voloĵoj. Li decidis alpreni lin ĉiapreze en sian servon. La soldato sciigante al li ke li estis libera, sen okupo kaj sen ia ajn monrimedo. La vojaĝo cetere okazis sen gravaj okazaĵoj. Tie kaj tie ĉi, kelkajn sengravajn diskutojn de la generalo kun la laboristoj, kun siaj najbaroj de la vagono, kun kelneroĵoj de la komuna tablo. Oni ĉiam finis ridante pri li kaj kun li, kaj gajnante aŭ ormoneron, aŭ belan frukton, aŭ glason da ĉampano; aŭ eĉ inviton por viziti sian landon, Gromilino apud Smolensko... kiam li ne plu estos kaptito.

Ili alvenis al la kuracbanejoj de Bagnolo, apud Alensono. Forlasante la stacidomon, la soldato volis adiaŭi la generalon.

GNR : Kiel ! Kial vi volas forlasi min ? Ĉu mi diris aŭ

faris al vi kelkajn azenaĵojn ? Ĉu vi trovas min tro ridinda por resti kun mi ?

SLD : Pri tio, ne, mia generalo, sed mi timas esti jam estanta tre trudiĝema akceptante ĉiujn viajn agrablaĵojn kaj...

GNR : Kaj por danki min, vi forlasas min tie kiel maljuna kriplulo plu bona por nenio. Dankon, mia kara, dankegon.

SLD : Mia generalo, mi estus tre feliĉa resti kun vi.

GNR : Do, restu, diable !

La soldato kun hezitema mieno rigardis Mutie^{on} kiu retenis rideton kaj gestis al li akcepti. La generalo observis ilin ambaŭ, kaj antaŭ ol la soldato parolis : "Bonege ! Estas bonege. Vi restas en mia servado. Mi donos al vi cent frankojn monate, kompensita de ĉiuj elspezoj... Kio, kio estas ? Ĉu vi ne estas kontenta ? Do mi duoblas : ducent frankojn monate".

SLD : Estas tro, mia generalo, multe tro. Nutru min kaj pagu mian elspezon, estos multe por mi.

GNR : Kion tio signifas, Sinjoro ? Ĉu vi rigardas min kiel avarulon ? Ĉu mi kondutis kiel ŝparemulo koncerne vin ? Per kia rajto vi pensas ke mi servigas min kontraŭ nenio per kuraĝa soldato kiu portas la medalon de Krimeo, kiu certe meritis centfoje tion kion mi proponas al li, kaj kiun mi urĝe bezonas, ĉar mi estas sen servisto, mi estas maljuna, eluzita, vundita, malagraba, teda, neeltenebla ? Demandu al Mutie kiu returniĝas por ridi, li diros al vi ke ĉio estas la pura vero. Respondu, Mutie, trankviligu ĉi tiun bravan knabon.

MUT turnante sin al la soldato : Ne kredu unu vorton de tio kion diris al vi la generalo, mia kara, kaj maltime eniru en lian servon ! Vi neniam renkontos pli bonan mastron.

GNR : Mi devus admoni vin pro via malrespektaĵo, mia amiko, sed vi faras per mi tion kion vi volas. Ni iru serĉi tranoktejon por ni tri. Kiel vi nomiĝas (turnante sin al la

soldato) ?

SLD : Jakobo Derigni, mia generalo.

GNR : Mi ne povas nomi vin Jakoboⁿ, por ne konfuzi kun mia eta amiko Jakobo; vi estos Derigni por mi kaj por Mutie.

Ili alvenis al la granda hotelo de la kuracejo. La generalo elektis por unu monato la plej belan apartamenton ĉe la teretaĵo kaj enlokiĝis tie kun siaj akompanantoj. La servisto demandis al li ĉu necesis iri serĉi lian bagaĵon. La generalo rigardis lin per siaj grandaj petolaj okuloj, ridetis kaj respondis : Mi havas ĉiun mian bagaĵon sur mi, mia knabo. Tio mirigas vin ? Tamen, estas tiel.

- Kaj... tiuj sinjoroj ?...

- Tiuj sinjoroj estas parto de mia akompanantaro, mia knabo, ili ne estas pli bone provizitaj ol mi.

La servisto insideme rigardis la generalon kaj eliris sen diri vorton. La generalo, bone suspektante tion kio baldaŭ okazos, frotis al si la manojn kaj ridis. Malmulte da tempo poste, la ĉefservisto eniris kun tre serioza mieno, kliniĝis iomete kaj diris al la generalo : Sinjoro, ni eraris indikante al vi ĉi tiun belan apartamenton, ĝi estas promesita, kaj vi ne povas resti ĉi tie.

GNR kun decidita mieno : Ĉu vere ? Kaj tamen mi restos ĉi tie, jes, Sinjoro, mi restos ĉi tie.

La Ĉefservisto : Sed, Sinjoro, tial ke ĝi estas retenita.

GNR : Mi atendos, Sinjoro, ke la koncerna homo estos alvenanta, kaj mi akordiĝos kun li. Intertempe, mi restas ĉi tie ĉar mi estas ĉi tie.

ĈFS : Sinjoro, kiam oni ne havas pakaĵon, oni antaŭpagas.

La generalo palpebrumis rigardante Mutie^{on}, kaj ŝajnis esti embarasita. Li gratis al si la kapon.

- Sinjoro, li diris, neniam oni faris al mi tiajn kondiĉojn. Mi neniam pagis anticipe.

- Estas, Sinjoro, rebatis la gastiganto kun duonmalrespekta mieno, ke la homoj kiuj ne havas pakaĵojn, sufiĉe ofte kutimas tute ne pagi kiam oni ne pagigas ilin anticipe.

GNR : Sinjoro, tiuj homoj estas ŝtelistoj.

ĈFS : Mi ne diras ne, Sinjoro.

GNR : Tiu kiu signifas ke vi rigardas min kiel ŝteliston.

ĈFS : Mi ne diris tion, Sinjoro.

GNR : Sed estas evidente ke vi pensas tion, Sinjoro.

La gastiganto silentis. La generalo metis sin je ses coloj [$\pm 15\text{cm}$] de li, rigardante lin en la vizaĝo.

- Sinjoro, vi estas insolenta, kaj mi estas honestulo, bravulo, taŭgulo kaj mi estas la grafo Durakino, Sinjoro, generalo kaptito laŭparole, Sinjoro. Kaj mi ricevas ses cent mil rublojn de rento, Sinjoro. Kaj jen mia monpaperujo plenplena da milfrankaj biletoj (li montras sian biletujojn), kaj jen mia ledsako (li eltiras la sakon el la poŝo de Mutie) kaj mi estus pagonta al vi vian apartamenton je la duoblo de tio kion ĝi valoras, Sinjoro. Mi estus pagonta anticipe, Sinjoro, por unu tuta monato, Sinjoro. Kaj nun, vi havos nenion ĉar mi foriras tranokti aliloke, Sinjoro. Venu Mutie, venu Derigni.

La generalo surmetis sian ĉapelon profunde sur sian kapon antaŭ la miregigita kaj afliktita gastiganto. Li faris paŝon, la gastiganto haltigis lin.

- Bonvolu senkulpigi min, sinjoro grafo. Mi bedaŭras, ĉu mi povis diveni ? Mia servisto diris al mi ke vi ne havas eĉ anstataŭan ĉemizon. Pasintjare, Sinjoro, mi estis tiel ŝtelita de kvazaŭa aŭstra grafo kiu estis forfuĝanto el la punlaborejo kaj kiu perdigis al mi pli ol du mil frankojn. Bonvolu pardoni min, sinjoro grafo, ni kompatindaj gastejestroj, ni estas tiel ofte trompitaĵ ! Se sinjoro grafo sciis kiom mi bedaŭras !...

GNR : Bedaŭrinta pro ne enpoŝigi miajn orajn,
monerojn, mia brava ulo, ĉu ne ?

ĈFS : Mi bedaŭras ke sinjoro grafo povu kredi...

GNR ridante : Nu, nu, tio sufiĉas. Kiom vi petas monate
por via apartamento kaj la nutraĵo el unua kvalito, por mi kaj
por miaj amikoj kiuj devas esti traktataj kiel princoj ?

La gastiganto pripensis reprenante ĝojan mienon kaj
klinante pli ol dudek fojojn antaŭ la generalo kaj liaj amikoj
tiajn ke li nomumis ilin.

ĈFS : Sinjoro grafo, la apartamento, mil frankojn; la
nutraĵo, kiel sinjoro grafo postulas ĝin, ankaŭ mil frankojn,
inkluzive de la lumigado kaj la servado.

GNR : Jen du mil frankoj, Sinjoro. Lasu nin trankvilaj,
nun.

La gastiganto riverencis profundege kaj eliris. La
generalo triumfe rigardis Mutie^{on} kaj diris ridante : La
kompatindulo ! Ĉu li timis vidi min foriri ! Fakte, li pravis,
kaj mi farus same sur sia loko. Ni ŝajnas tri friponaĵistoj,
veraj ŝtelistoj. Tri viroj sen ia kofro, sen ia pakaĵo, kiuj
luprenas apartamenton je mil frankoj !

MUT : Tamen, mia generalo, li povintus esti pli ĝentila
kaj ne aŭdigi al ni ke li rigardi nin kiel rabistojn.

GNR : Mia amiko, estas pro tio ke mi faris al li la timon
kiu trafis lin. Nun jen ni estas gastigitaj, ni iru aĉeti tion
kion ni bezonas por esti taŭge provizitaj de tolaĵoj kaj
vestoj.

La generalo foriris, sekvata de sia eskorto. Li ne trovis
en Bagnolo la elegantajn vestojn kaj la delikatajn subvestojn
kiujn li deziregis, sed li trovis sufiĉe por aspekti bone
provizitan viron. Li ankaŭ volis zorgi pri la vestaron de Mutie
kaj de Derigni kaj li estus aĉetanta multajn nenecesajn
objektojn, se ambaŭ ne forte kontraŭstaris lin.

La gastado ĉe la kuracbanejoj tre bone okazis por la

generalo kiu amuzis sin pri ĉiu kiu ĉie faris kaj diris strangaĵojn, kiu edziĝopetis ĉiujn fraŭlinojn super dekkvin jaroj, kiu invitis ĉiujn gajajn kaj agrablajn homojn por veni vidi lin en Rusio", en Gromilino", apud Smolenkso, kiu manĝis kaj trinkis la tutan tagon. Mutie kaj Derigni pasigis sian tempon trankvile, iom malgaje, ĉar Mutie senpacience atendis la revenan horon kiu devis revenigi lin kaj fiksi lin por ĉiam ĉe la Gardanĝelo, apud Elfia; kaj Derigni estis turmentata de sekreta aflikto kiu subfosis lin kaj kiu eĉ difektis sian sanon. Mutie vane provis akiri lian konfidon, li ne sukcesis ricevi la konfeson de tiu doloro. La generalo mem vane demandis, insistis, koleriĝis, minacis, li neniam sukcesis malkovri ion pri la antaŭaĵoj de Derigni. Neniam ia manko de servo venis inciti la kolereman humoron de la generalo. Neniam Derigni malplenumis al li, ĉiam ĉe sia posteno, ĉiam preta, ĉiam helpema, akurata, inteligenta, efika, li estis deklarita de la generalo, la perlo de la servistoj. Cetere, senzorga pri ĉio kio ne koncernis lian servon, li rifuzis la monon kiun proponis al li la generalo, kaj kiam ĉi tiu insistis : "Bonvolu gardi ĝi por mi, mia generalo, mi tute ne bezonas tion nun".

Kiam venis la tago de foriro, la generalo estis ravita, Mutie saltis pro ĝojo, Derigni restis malĝoja kaj serioza.

Oni fine foriris post la triumfaj adiaŭadoj por la generalo kiu abunde disŝutis oron ĉe la hotelo, ĉe la banejoj, ĉie.

Pli ol ducent homoj kondukis lin kun benoj, petegoj por reveni, vivoj, kiujn li rekompencis ŝutante en ĉiu mano lastan tributon de la riĉeco al la malriĉeco.

19 Teatrofrapo.

La vojaĝo daŭris ne longe. Foririntaj matene, niaj tri vojaĝantoj alvenis por vespermanĝi en Lumigni, kaj ne piede, kiel dum la foriro.

Sinjinorino Blidot, Elfia, Jakobo kaj Paŭlo, kiuj estis informitaj de Mutie pri la revena horo, akceptis ilin kun ĝojaj krioj. Mutie prezentis Derigni^{on} al sinjinorino Blidot kaj Elfia. Kiam Mutie venigis al li Jakoboⁿ kaj Paŭloⁿ por brakumi ilin, Derigni kaptis ilin en siaj brakoj, kisis ilin pli ol dek fojojn kaj konsterniĝis tiagrade ke li nepre devis eliri. Mutie kaj la infanoj sekvis lin.

MUT : Kion vi havas, mia amiko ? Kia agitiĝo !

SLD : Dio mia ! Dio mia ! Subtenu min en tiu nova okazaĵo. Ho ! Miaj infanoj ! Miaj kompatindaj infanoj !

Jakobo alproksimiĝis al li, kun larmoj en la okuloj, longe rigardis lin. "Estas strange", li diris, pasante la manon sur sia frunto, paĉjo diris tiel kiam li foriris".

SLD : Kiel vi nomiĝas, infano ?

JAK : Jakobo.

SLD : Kaj via frato ?

JAK : Paŭlo.

Derigni eligis krion, provis paŝon, ŝanceliĝis kaj estus falanta se Mutie ne estus subtenanta lin.

SLD : Diru al mi pro Diamo, tiu sinjinorino de ĉi tie, ĉu ŝi estas via panjo ?

- Jes, respondis Paŭlo.

- Ne, diris Jakobo; Paŭlo ne scias, li estis tro juna, nia vera patrino estas morta; ĉi tiu estas panjo tre bona, sed ne vera.

- Kaj... via patro ? demandis Derigni per sufokiĝanta

voĉo pro emocio.

JAK : Paĉjo ? Kompatinda paĉjo ! La ĝendarmoj forkondukis lin.

Jakobo ne finis sian frazon kiam Derigni ekkaptis lin en siaj brakoj, tiel kiel Paŭlo, eligante krion kiu alkurigis la generalo kaj la du fratinoj.

La kompatinda Derigni provis paroli, sed la vortoj mortis sur liaj lipoj, kaj li peze falis ankoraŭ premante la infanojn kontraŭ sia koro.

Mutie mildigis lian falon duonsubtenante lin. Helpita de la du fratinoj, li pene liberigis Jakoboⁿ kaj Paŭloⁿ el la ĉirkaŭpremo de Derigni. Kiam Jakobo kapablis paroli, li eksplodis en larmoj kaj ekkriis : "Estas paĉjo, li estas mia povra paĉjo ! Mi preskaŭ rekonis lin kiam li diris 'Miaj kompatindaj infanoj !' kaj ĉefe kiam li kisis nin tiom forte, estas tiel ke li diris kaj ke li faris kiam la ĝendarmoj alvenis".

La krio eligita de Derigni altiris ĉe la pordoj preskaŭ ĉiujn najbarojn de la Gardanĝelo, kaj impresa homamasigo ne malfruis formiĝi. La unuaj alvenintoj respondis al la demandadoj de la lastaj alkurintoj.

- Kio estas ? demandis bonulino.
- Estas viro kiu ĵus mortis subite pro bezono.
- Kial la etuloj ploras ?
- Ĉar ili estas bonkoraj, tiuj infanoj ! Ĉu ne estas terure vidi viron morti pro bezono ĉe via pordo ?
- Vidu do tiun dikulon, kiel li baraktas ! Li tuj frakosas ĉiujn, se li falas sur ilin.
- Estas la viro kiun la Burnieroj murdis.
- Kiel do li faris por eskapi el tio ?
- Estas ĉar la granda zuavo kondukis lin al la kuracbanejoj, tio tute resanigis lin.
- Nu ! Kiam mia edzino mortos, neniu danĝero ke mi

kunportos lin tien.

Derigni ne rekonsciiĝis malgraŭ la energiaj rimedoj de la generalo : manfrapadoj en la manojn sufiĉe por rompi al li la fingrojn, tabakofumo sufiĉe por sufoki urson, akvo sur la kapo sufiĉe por dronigi infano, nenio sukcesis. la sentoskuo estis tro forta, tro neatendita. Mutie komencis maltrankviliĝi pro ĉi tiu longa senkonsciiĝo. Li staris sin por iri venigi la preposton, kiam li vidis lin rapidegi tra la homamaso kaj haste alveni al Derigni.

PRP : Kio estas ? Iu morta viro, oni diris al mi ! Kial oni ne avertis min pli frue ?

MUT : Ne morta sed sveninta, sinjoro preposto. Li ĵus falis sekve de ĝojo kiu kaptis lin.

La preposto surgenuiĝis apud Derigni, palpis al li la pulson, aŭskultis lian spiradon, la pulsobaton de lia koro, kaj restariĝis kun rideto. "Estos nenio, li diris. Formetu lin de ĉi tie, kuŝigu lin tute plate en lito, akvumetu la frunton, la tempiojn per vinagro kaj glutigu al li iom da kafo".

Post esti ankoraŭ donanta kelkajn opiniojn, la preposto, konsiderante sin senutila, reiris hejmen.

JAK : Mia bona amiko Mutie, lasu min kisi mian kompatindan paĉjon antaŭ ol li estu tute morta. Mi petas vin, mi petegas vin, onklino Elfia ne volas.

Mutie turnis la kapon kaj vidis la kompatindan Jakoboⁿ duone genuantan, kun la manoj kunigitaj, la rigardo peteganta, la vizaĝo banata de larmoj.

MUT : Venu, mia kompatinda infano, kisu vian paĉjon kaj ne timiĝu; li ne mortis, kaj post kelkaj momentoj, li mem kisos vin, kaj premos vin en liaj brakoj.

Jakobo dankis per la rigardo sian amikon Mutie^{on} kaj ĝetis sin sur sian patron kiun li kisis multfoje. Derigni enkontakte kun sia infano, komencis rekonsciiĝi. Li malfermis la okulojn, ekvidis Jakoboⁿ kaj baraktis por

releviĝi kaj premi lin kontraŭ sia koro. Mutie subtenis lin, kaj la feliĉa patro sukcesis laŭ sia plaĉo kovri per kisoj siajn perditajn kaj tiom sopiritajn infanojn.

Post la unuaj momentoj de ravo, Derigni ŝajnis konfuzita pro esti ekscitinta la ĝeneralan atenton. Li ekstaris, kaj, kvankam ankoraŭ tremante, li direktis lin al la domo, tenante permane siajn infanojn. Alveninta en la akceptejo, sekvita de la generalo, de Mutie kaj de la du fratinoj, li lasis sin sidiĝi sur seĝon, rigardis kun tenero kaj emocio Jakoboⁿ kaj Paŭloⁿ kiujn li tenis en ĉiu el siaj brakoj kaj post esti denove kisinta ilin multfoje :

- Pardonu min, mia generalo, li diris, bonvolu pardoni min, sinjorinoj, mi estis tiom skuita, tiom feliĉa trovi ĉi tiujn karajn kompatindajn infanojn kiujn mi tiom serĉis, tiom priploris, ke mi lasis min sveni kiel malfortulino. Karaj, karaj infanoj, kiel okazas ke mi retrovas vin ĉi tie, kun panjo, onklino, bona amiko ? (Derigni ridetis dirante tiujn vortojn kaj ekrigardis dankeme al la du fratinoj kaj Mutie).

JAK : Du bonaj amikoj, paĉjo, du. La bona generalo ankaŭ estas bona amiko.

Derigni ekremetis aŭdante nomi sin paĉjon de sia infano.

SLD kisante lin : Vi havis la saman voĉon kiam vi estis malgranda, mia Jakĉjo, vi diris paĉjon sammaniere.

- Mia bona amiko, diris emocie la generalo, mi estas kontenta vidi vin tiel feliĉa. Jes, ho, mi estas pli kontenta ol se..., ol se mi estis edziĝinta ĉiujn knabinetojn de la kuracbanejoj, ol se mi adoptis Mutie^{on}, Elfiaⁿ, Netaviŝtukoⁿ. Mi estas kontenta, kontenta !

Derigni ekstaris kaj metis la manon al sia frunto por signi la militan saluton

SLD : Dankegon, mia general ! Sed kiel okazis ke miaj infanoj troviĝas ĉi tie je pli ol dudek leŭgoj de la loko kie mi

lasis ilin ?

BLD : Estas la bona Dio kaj Mutie kiu alkondukis ilin al ni, mia kara sinjoro.

JAK : Kaj ankaŭ la sancta Virgulino, paĉjo, ĉar mi preĝis al ŝi kiel mia kompatinda panjo rekomendis tion al mi.

SLD : Mia bona Jakĉjo ! Ĉu vi ankoraŭ memoras pri via kompatinda panjo ?

JAK : Tre bone, paĉjo, sed ne multe pri sia vizaĝo, mi scias nur ke ŝi estis pala, tiel pala ke mi kelkfoje timis.

Derigni kisis lin anstataŭ ĉia respondo kaj profunde suspiris.

JAK : Vi estas ankoraŭ malgaja, paĉjo ! Kaj tamen vi retrovis nin Paŭloⁿ kaj min !

SLD : Mi pensas pri via kompatinda panjo, kara infano. Estas ŝi kiu protektis vin apud la bona Dio kaj la sancta Virgulino kaj kiu alkondukis vin ĉi tie. Mia bona Mutie, kiel vi renkontis miajn infanojn ?

MUT : Mi rakontos tion al vi kiam ni estos vespermanĝintaj, mia amiko, kaj kiam la infanoj estos enlitiĝintaj. Ili ja scias tion, estas senutila ke ili aŭdas min rakonti tion.

GNR : Kaj vi, mia kara, kiel okazis ke vi perdis viajn infanojn, ke vi faris la Krimean militon, ke vi revene ne retrovis ĉi tiujn infanojn ? Ĉu do vi havas nek patron nek patrino, nek iun ajn ?

SLD : Nek patro, nek patrino, nek frato, nek fratino, mia generalo. Jen mia rakonto pli malgaja ol longa. Mi estis ununura filo kaj orfo. Mi estis edukita de la avino de mia edzino, kiu estis orfa kiel mi. La kompatinda virino mortis. Mi lotis, mi estis la lasta nombro de la rezervo, neniu ŝanco esti rekrutigata. Magdalena kaj mi, ni restis solaj en la mondo, mi amis ŝin, ŝi amis min, ni geedziĝis. Mi aĝis dudek unu jarojn, ŝi aĝis dek ses. Ni vivis feliĉaj, mi perlaboris

bonajn tagsalajrojn kiel mekanikisto-lignaĵisto. Ni havis ĉi tiujn du infanojn kiuj kompletigis nian feliĉon. Jakĉjo estis tiel bona ke ni kelkfoje verŝis ĝojolarmojn pro tio, mia edzino kaj mi. Sed jen okazis, meze de nia feliĉo, la diskonigo de militaj rumoroj. Mi ekaŭdas ke oni alvokas la rezervon. Mia kompatinda Magdalena afliktiĝas, ploras tage kaj nokte. Mi foririnta, mi jam vidis ŝin en mizero kun niaj du keruboj. Ŝia sano difektiĝis. Mi ricevis mian irleteron por kuniĝi kun la regimento post unu monato. La ĉagreno de Magdalena frenezis min. Mi perdis la saĝon. Ni vendis nian meblaron, kaj ni foriris por eskapi la militservon. Restis al mi nur ses monatoj por fini mian tempon kaj esti ne submetenda. Ni ĉiam iris jen piede, jen per kariolo. Ni alvenis en beletan lokon, je dudek leŭgoj de ĉi tie. Mi luprenis izolitan domon kie ni vivis kaŝe en ia duona mizero ĉar ni domaĝis niajn fondojn, ne kuraĝante peti laboron pro timo esti kaptita. Mia edzino pli kaj pli malsaniĝis. Ŝi mortis (la voĉo de Derigni tremis eldirante ĉi tiujn vortojn). Ŝi mortis, lasante al mi ĉi tiujn du kompatindajn etulojn por zorgi kaj nutri. Dum nia restado en tiu domo, evitante esti konataj, ni tamen iris ĉiam por ĉeesti mesojn kaj diservoj ĉiujn dimanĉojn kaj festojn. La paleco de mia edzino, la afableco de la infanoj allogis la atenton. Kiam ŝi estis pli malbona, ŝi petis sinjoron preposton, kiu plurfoje venis vidi ŝin, kaj kiam mi perdis ŝin, necesis fari mian deklaron ĉe la urbodomo kaj doni mian nomon. Tri semajnojn poste, la tagon mem kiam mi ĵus donis al miaj infanoj mian lastan pecon da pano kaj kiam mi estis kunkondukonta ilin por serĉi aliloken laboron, mi estis kaptita de la ĝendarmoj kaj devigita al kunigi sub eskorto, malgraŭ miaj petegoj kaj mia malespero. Unu el la ĝendarmoj promesis al mi reveni serĉi miajn infanojn, mi ekde sciiĝis ke li ne tuj povis tion, kaj ke poste li ne plu retrovis ilin. Alveninta al la korpuso, mi estis

metita en karceron por esti ne akurate kuniĝinta. Kiam mi eliris el ĝi, mi petis ferion por iri serĉi miajn infanojn kaj ricevigi ilin kiel trupinfanojn. Mia kolonelo, kiu estis bravulo, konsentis tion. Kiam mi revenis al **Kerbiniak**, neblis al mi retrovi ajnan spuron de miaj infanoj, neniu vidis ilin. Mi serĉis en la tutaj ĉirkaŭaĵoj tage kaj nokte. Mi turnis min al la ĝendarmaro, al la policaro de la urboj. Mi devis kuniĝi kun mia regimento kaj foriri al la Sudo, sen scii tion kion fariĝis tiuj karaj plejamatoj. Dio scias tion kion mi suferis. Neniam mia penso sukcesis apartiĝi de la memorado de miaj infanoj kaj de mia edzino. Kaj se mi ne gardis la religiajn sentojn de mia infanaĝo, mi ne estus sukcesanta elteni la vivon de doloro kaj angoro al kiu mi troviĝis kondamnita. Ĉio estis egala al mi, ĉio krom ofendi la bonan Dion. Jen mia tuta rakonto, mia generalo, ĝi estas mallonga, sed tre plena de sufero.

20 Unua patra maltrankvilo.

Jakobo kaj Paŭlo estis aŭdintaj paroli sian patron sen ĉesi rigardadi lin. Ili pli kaj pli alpremiĝis al li. Kiam li finis, ambaŭ ĵetis sin en liajn brakojn. Paŭlo plorsingultis, Jakobo tre mallaŭte ploris. Ilia patro alterne kisis ilin, viŝis iliajn larmojn. "Ĉio estas nun finita, miaj karuĉjoj ! Ne plu da malfeliĉo, ne plu da malĝojo ! Mi estos tute al vi, kaj vi estos tute al mi".

- Kaj panjo Blidot, kaj onklino Elfia, diris angore Jakobo, ĉu ni ne plu estos al ili ?

SLD : Ĉiam, mia infano, ĉiam. Vi do tre amas ilin ?

JAK : Ho ! Paĉjo, mi vere kredas ke ni amas ilin ! Ili estas tiel bonaj, tiel bonaj ke estas kiel panjo kaj vi. Vi restos kun ni, ĉu ne ?

La kompatinda Derigni ne eĉ pripensis pri tiu ligo de koro kaj de ŝuldosento de siaj infanoj. Rompante ĝin, li kaŭzis al ili ĉagrenon kiun lia tuta patra koro ribelis. Se li lasis ilin al iliaj bonfarantinoj, mem devis do denove perdi ilin ankoraŭfoje. Malkunigi sin de ili ĝuste kiam ili ĵus retrovis ilin. La angoro de lia koro pentriĝis sur lia esprimplena fizionomio.

GNR : Mi mem aranĝos tiun ĉion ! Neniu turmentiĝu kaj afliktiĝu. Mi elturniĝos tiamaniere ke ĉiuj restos kontentaj. Nun, se ni vespermanĝus, tio ne estus malfeliĉa. Mi havas malsaton de kanibalo. Ni ĉiuj estas feliĉaj, ni ĉiuj devas malsati.

Mutie, Elfia kaj sinjorino Blidot iris serĉi la pladojn kaj la botelojn. La vespermanĝo ne malfruis esti servita, kaj ĉiu lokiĝis ĉe sian lokon, krom Derigni kiu pretiĝis por servi la generalon.

GNR : Nu ! Kial vi ne vespermanĝas, Derigni ? Ĉu la ĝojo rolas kiel nutraĵo ?

SLD : Pardonu, mia general, tiel longe kiam mi restas via servisto, mi ne permesos al mi sidigi min ĉe viaj flankoj.

GNR : Vi perdis la saĵon, mia amiko ! La feliĉo frenezigas vin ! Vi estas servonta viajn infanojn kvazaŭ vi estus ilia servanto ! Stranga ideo, vere ! Nu, neniaj sensencaĵoj. Ĉe la Gardanĝelo, ni estas ĉiuj amikoj kaj ĉiuj egalaj. Sidigu vin tien, inter Jakobo kaj Paŭlo, kaj ni manĝu... Kaj do, vi hezitas ?... Ĉu necesos ke mi koleriĝu por malebligi vin elfari malkonvenaĵojn ? Diable ! Tablen ! Mi diras al vi ! Mi ja malsategas !

Mutie ridetante faris signon al Derigni obei. Derigni lokis sin inter siaj du infanoj. La generalo eligis kontentiĝan suspiron kaj komencis sian supon. Estis antaŭlonge ke li manĝis la burĝan sed bonegan manĝaĵon de sinjorino Blidot kaj de Elfia, tial, li manĝis sufiĉe por mortigi ordinaran homon. La laŭdo de ĉiuj pladoj estis ĉiam sekvita de dua abunda parto. Li montris frenezan ĝojecon kiu baldaŭ komuniĝis al la tuta tablo. Mutie ne cessis miri vidante Derigni^{on} ridi, li kiu neniam vidis lin rideti ekde kiam li konis lin.

MUT : Vi vidas, mia Jakĉjo, la mirindaĵojn kiujn vi okazigas tiel kiel Paŭlo. Jen via paĉjo, kiun mi neniam vidis rideti, kaj kiu nun ridas kiel Elfia kaj mi.

SLD : Mi havus multon por fari, mia amiko, se necesus al mi atingi la gajecon de fraŭlino Elfia, almenaŭ laŭ tio kion vi diris al mi pri ŝi. Sed mi konfesas ke mi sentas min tiel feliĉa, ke mi farus ĉiujn malsaĝaĵojn kiujn oni petus al mi.

GNR : Nu, tio ! Mi petas al vi unu el ili kiu faros al vi plezuregon.

SLD : Kondiĉe ke ĝi ne disigas min de miaj infanoj, mia generalo, mi ĝin promesas al vi.

GNR : Eĉ pli bone ! Mi petas al vi, mia amiko, ne forlasi min... Ne eksaltu ! Diable ! Vi ne scias tion kion mi volas diri... Mi petas al vi neniam forlasi viajn infanojn kaj ne forlasi min. Tio kio signifas ke mi gardos vin ĉiujn tri kun mi, ke dankeme pro viaj zorgadoj (kiujn mi ne plu povas rezigni, mi sentas ke mi ne kutimiĝos al alia servo ol la via, tiel ĝusta, tiel inteligenta, tiel dolĉa, tiel efika. Necesas al mi vin aŭ morton) ke dankeme, mi diris, pro tiaj zorgadoj kiujn nenio povas pagi, mi aĉetos por vi kaj donos al vi ian nemoveblaĵon kie vi enlokiĝus, post mia morto, kun viaj infanoj kaj eble iu edzino. Tio estus via estonteco kaj via riĉaĵo al ĉiuj. Tiel longe kiel mi estas kaptito, vi restos en Francio kun viaj infanoj kaj nia amiko Mutie.

SLD : Kaj poste, mia generalo ?

GNR : Poste ? Poste ? Ni decidus tion. Ni havas tempon por pripensi pri tio... Nu ? Kion vi diras ?

SLD : Ankoraŭ nenion, mia generalo, mi petas tempon por pripensado, ĉivespere mi ne havas la kapon kun mi kaj mia koro tute estas por miaj infanoj.

GNR : Bone, mia kara, mi donas al vi ĝis la nupta festo de Elfia kaj Mutie. Morgaŭ, ni decidus la tagon kaj mi skribos al Parizo por la vespermanĝo kaj la akcesoraĵoj. Ni duope, mia eta Elfia ! Ni daŭrigu nian malnovan interrompitan interparolo pri via geedziĝo. Hodiaŭ estas lundo. Morgaŭ, mardon, mi skribos; oni ekspedos al mi mian vespermanĝon kaj la ceteran sabaton; ĉio alvenos lundon kaj ni manĝos tion elirante el la ceremonio.

ELF : Neeble, mia general, necesas fari la publikigadojn, la kontrakton.

GNR : Necesas do multe da tempo en Francio por ĉio tio ? Ĉe ni en Rusio, tio okazas pli rapide ol tio. Tiel, mi vidas sinjorinon Blidot^{on}; vi plaĉas al mi, mi plaĉas al vi; ni iras trovi la popon, kiu legas preĝojn en slava, kantas ion, diras

ion, trinkigas vin en mia kaliko kaj mi en la via, kiu trifoje promenigas nin ronde ĉirkaŭ ia pupitro, kaj ĉio estas finita. Mi estas via edzo, vi estas mia edzino, mi rajtas bati vin, krevigi vin pro malsato, malvarmo, mizero.

GST ridanta : Kaj mi, kiuj estas miaj rajtoj ?

GNR : Plori, krie, insulti min, bati homojn, ŝiri viajn vestaĵojn, eĉ bruligi la domon ĉe la senesperaj okazoj.

GST ridanta : Bela konsolo ! Al kiu terura sorto mi eskapis !

GNR : Ho ! Sed mi, tio estas alia afero ! Mi estus bonega edzo ! Mi prizorgus vin, mi grasigus vin, mi superŝutus vin per donacoj, juveloj, mi donus al vi la robojn kun trenaĵo por iri al la kortego, diamantojn, plumojn, florojn !

Ĉiuj ekridis, eĉ la infanoj, la generalo ankaŭ ridis kaj deklaris ke en la estonteco, li nomos sinjorinon Blidot^{on} : "Mia edzineto". Post esti babilinta kaj ridinta dum kelka momento, la generalo iris enlitigi ĉar li estis laca. Derigni, post esti fininta sian servon ĉe la generalo, iris kun siaj infanoj en iliajn ĉambrojn, helpi ilin senvestigi, enlitigi post fari kun ili fervoran dankopreĝon. Li ne kapablis decidi sin forlasi ilin, kaj kiam ili estis dormantaj, li rigardis ilin kun ĉiam pli viva feliĉo, delikate tuŝetis per siaj lipoj iliajn vangojn, ilian frunton kaj iliajn manojn. Finfine, la laciĝo kaj la dormemo ekprenis lin, kaj li endormiĝis sur sia seĝo inter la du litoj de siaj infanoj. Li dormis per tiom paca kaj tiom profunda dormo, ke li vekigis nur kiam Mutie, malkvietigita pro lia longa foresto, iri serĉi lin kaj kontraŭvole kunprenis lin por kuŝigi lin en la liton kiu estis pretigita por li. Estis tamen malfrue, noktomezo ĵus sonoris ĉe la horloĝo de la akceptejo, sed Mutie ne jam havis tempon por babilo kun Elfia kaj ŝia fratino. Ili havis mil aferojn por rakonti unu la aliajn, kaj la horoj tro rapide fluis. Fine, sinjorino Blidot

sentis ke la dormemo trafis ŝin. La horloĝo sonoris, Mutie stariĝis, instigis la fratinojn iri enlitiĝi kaj iris serĉi Derigni^{on} kiun li ne trovis en lia ĉambro apud la generalo. Li pripensis ankoraŭ kelkan momenton antaŭ mem endormiĝi. Liaj pensoj estis sorbigita de feliĉo, kaj liaj songoj sentis la efikojn de tiu dolĉa inspiro.

21 Netaviŝtuko senvualigita.

La morgaĵon, kiam oni estis rekuniĝintaj, brakumintaj pridemandintaj unu la aliajn, kaj kiam oni estis matenmanĝintaj, sinjorino Blidot demandis al la generalo ĉu li rigardis siajn vestaĵojn kaj ĉu li retrovis ĉion.

GNR : Mi rigardis nur mian liton, mia edzineto. Mi estis laca pro la vojo kaj pro la trovaĵo de tiu diablo Derigni. Nenio lacigas min tiom kiom reteno miajn sentojn; kaj mi detenis min por ne plori kiel diknazulo. Kaj plie, ĉiufoje kiam mi rigardis tiun viron tiel feliĉa kaj liajn infanojn, mi diris al mi : Kaj vi, kompatinda Durakino, vi estas sola kun via oro, kaj via mono, kaj viaj kasteloj ! Neniu por ami vin, por heredi de tio ĉio. (La generalo frapis al si la kapon per la du pugnoj, li stariĝis, elspiris, promenis tien kaj reen, trankviliĝis, ridis kaj daŭrigis). Sed mi bone dormis tiun nokton, jen mi lerta kaj gaja. Nu ! Mia edzineto, vi ridas, kial ? Elfia ankaŭ ridas ? Kaj Mutie ? Derigni ne ridas, li, li ĉiam rigardas siajn infanojn kun ĝisorela buŝo !

- Mia generalo ? diris Derigni kiu aŭdis elparoli sian nomon, sed kiu ne komprenis la reston.

GNR : Nenion, nenion, mia amiko. Daŭrigu vian okupon... Jen vidu; li rekomencas.

La pordo malfermiĝas perforte. Netaviŝtuko sin deĵetas en la ĉambron. Li kuris al la generalo, ĵetis sin en liajn brakojn, kisis al li la ventron, ne kapablante atingi pli alten kaj ekkriis : "Mia kara generalo ! Mia patro ! Mia bonfaranto !"

La generalo, tre surprizita, penis liberigi sin, retropuŝis lin, faletis. Netaviŝtuko alkroĉiĝis al li, daŭrigis siajn ĉirkaŭpremojn, siajn ekkriojn.

GNR : Mutie ! Derigni ! Pro la Diamo, liberigu min ! Mi falas ! Tiu diablo de arlekeno kuntiras min... Lasu min, bubaĉo ! Iru for !

NTV : Ne, mia patro, mia bona patro ! Mi forlasos vin nur kiam vi agnoskos min kiel via infano, la heredonto de via nomo, de via riĉaĵo.

GNR : Helpon ! Forpelu ĉi tiun frenezulon ! Mutie, mia brava amiko, prenu lin, eltiru lin de sur mia mizera ventro kiun li premas.

Mutie jam tiris Netaviŝtukoⁿ kiu platigis des pli bone la ventron de la generalo. Fine, li sukcesis doni al li skuon kiu maltenigis al li la prenon, sed tiom subite ke la generalo perdis la ekvilibron kaj falis sur li kaj Mutie. Ĉiuj tri ruliĝis surgrunde, la generalo blasfemante kaj svenbatante per siaj fortikaj pugnoj Netaviŝtukoⁿ kiun li premegis per sia pezego kaj kiu kriis per la tuta forto de siaj pulmoj. Mutie apenaŭ tuŝis la plankon kaj lerte restariĝis antaŭ ol la peza falo de la generalo estis ĝisplanka. Li kaj Derigni restarigis la generalon. Li feliĉe havis nur ne alian doloron ol la skuon tre mildigita de Netaviŝtuko kaj Mutie. Lia kolero kontraŭ Netaviŝtuko reakiris novan forton.

- Bubaĉo, besto li ekkriis, mi instruos al vi afabliĝi kun mi, krii al miaj oreloj viajn azenaĵojn, ruligi min surgrunde kun preteksto kisi min !

Netaviŝtuko, kiu enkapigi al si fari adopti sin kaj ekzaltita de la generalo, ekkriis : "Pardonu min, mi pardonpetas, mia bonfaranto, mia patro ! Prenu min kun vi, kunprenu min".

- Kunpreni vin, bubaĉon ! Kiam mi kunprenos vin, estos por knuti vin, sendi vin en Siberioⁿ. Se vi volas knuton, mi avertigos vin kiam mi foriros, estu certa pri tio.

- Mi volas ĉion kion vi volas, mia patro, ekkriis Netaviŝtuko kiu ne sciis tion kion signifis aŭ knuto aŭ

Siberio.

- Vere ! Nu, jen tio kion mi volas.

La generalo ekprenis Netaviŝtukoⁿ per la haroj, donis al li survangon, pugnofrapon, plurajn piedbatojn; tiris lin ĝis la pordo kaj elpelis lin eksteren malgraŭ liaj krioj. Li refermis la pordon, ventumis sin per sia poŝtuko, paŝis senvorte kaj eniris en sian ĉambron.

PAŬ : Kiel li batis tiun kompatindan Netaviŝtukoⁿ !
Estas malafabla, tio. Mi tute ne plu amas lin.

JAK : Mi ne komprenas tion kio okazis al Netaviŝtuko.
La generalo ekkoleris kaj Netaviŝtuko ankoraŭ daŭrigis.

MUT : Li verŝajne duonsciiĝis pri la ideo kiu pasis tra la cerbo de la generalo, kaj li esperis realigigi ĝin afektante grandan tenerecon.

BLD : Netaviŝtuko estas malbona knabo, perversigita de la Burniero^j, mi ja timas tion. Kaj pri Netaviŝtuko diru al mi, Jozefo, ĉu la generalo kunprenis al kuracbanejo pokaleton kaj manĝilon el orarĝento ?

MUT : Nek la plej malgrandan orarĝentaĵon, nek ion ajn.

BLD : Estas ĉar ordigante liajn aferojn disĵetitajn tra lia ĉambro, mi neniam sukcesis trovi pokaleton kaj manĝilon kies loko estas kavigita, sed malplena, en lia ilaro.

MUT : Eble ili mankis antaŭe.

BLD : Ne, Jakobo diris al mi ke la ilaro estis plena kaj kompleta kiam la generalo vidigis ĝin al ili.

MUT : Sed kial vi parolas pri tiuj perditaj pecoj okaze de Netaviŝtuko ?

BLD : Ĉar li venis en la ĉambron dum ni ordigis, Jakobo kaj mi la disĵetitajn aferojn de la generalo, kaj ĉar li estis tre malbona.

Sinjorino Blidot rakontis al Mutie la scenon kiu okazis. Ŝi aldonis ke ekde tiam ŝi malpermesis al Jakobo kaj al Paŭlo ludi kun Netaviŝtuko kaj paroli al li.

Ili ankoraŭ interbabilis dum kelka tempo. La generalo eniris tre maltrankviligita kaj tre malkontenta.

- Sinjorino Blidot, li diras, vi akceptas hejme multajn homojn; unu el tiuj friponoj ŝtelis al mi du pecojn de mia vojaĝilaro : Pokaleton kaj manĝilon.

BLD : Mia generalo, mi bedaŭras pri tio, mi rimarkis tiun pardon unu horon post via foriro, ordigante vian ĉambron kun Jakĉjo; ĝi estis iom senorda.

GNR : Kiel iom ? Ĝi devis esti tute renversita. Estas ĉar mi sciis ke kun vi kaj la viaj, mi tute ne endanĝeriĝis. Mi konfidus al vi miajn tutajn riĉaĵojn sen ajna maltrankvilo, mia edzinetto. Jen kial mi diris ke la objektoj estis ŝtelitaj de ŝtelisto.

BLD : Mia generalo, neniu eniris en via ĉambro, nur mi, Jakobo kaj Netaviŝtuko.

- Netaviŝtuko ? Ha ! diris la generalo abrupte haltante.

PAŬ : Estas Netaviŝtuko kiu havas la belajn aferojn. Mi vidis ilin kiam li petis al mi kaŝi ilin en la matraco de Jakobo.

GNR : Netaviŝtuko petis al vi... kiam ?... kie ?... Rakontu tion al mi, mia beletulo.

PAŬ : Mi revenis de la lernejo tutsole, antaŭ Jakobo. Netaviŝtuko alkuris al mi : "Mia Paŭlo, ĉu vi volas pralinojn ?" - "Jes, mi ja volas", mi diris. - "Do prenu tiujn oraĵojn, rapide kuru kaŝi ilin, tre bone kaŝi, en la matracon de Jakobo poste vi revenos kaj mi donos al vi viajn plenajn manojn da pralinoj". - "Atendu minuton", mi diris, "mi tuj demandos al Jakobo ĉu li volas". - "Ne, ne, ne demandu al Jakobo, diru nenion al li. Se vi ne akceptas, vi ne havos pralinojn". - "Mi bonvolas, sed mi antaŭe volas demandi al Jakobo". Li diris al mi : "Stultulo !" Kaj li foriris, kaj li kunportis siajn belajn oraĵojn.

- Kanajlo, fripono ! ekkriis Derigni. Se mi tenus lin, mi donus al li draŝado kiun li memorus ! Malŝatindulo ! Voli

Ŝajnigi mian filon kiel ŝteliston kaj sendankulon, mia povra Jakĉjo ! Mia bona kaj honesta Jakĉjo !

GNR : Kaj estas tiu mizerulo kiu aŭdacas peti al mi kunpreni lin kun mi ! Kiu senhonte nomas min lian patron ! Kiu havas la aŭdacon voli esti grafo Durakino kaj heredanto de miaj riĉaĉoj ! Mutie, mia amiko, iru venigi al mi tiun senhontan friponon, tiun ŝteliston, tiun kanajlon.

MUT : Mia generalo, permesu ke antaŭ venigi lin, mi rakontu al S^{ro} preposto tion kio okazis, kaj ke mi metu lin en lia ĉeesto.

GNR : Pro kion fari ? La preposto estas tro bona ! Li ne kapablos draŝi lin. Donu lin al mi, mi taskas al mi tani al li la dorson por forigi al li la deziron havi min kiel patron kaj akompani min al Rusio.

MUT : Jes, mia generalo, mi tuj kuros serĉi lin.

22 Kolero kaj pento de la generalo.

Mutie fakte iris ĉe la preposton, sed ne por venigi Netaviŝtukoⁿ al la generalo, kies kolero estis timinda. Furioza kiel li estis kontraŭ ĉi tiu mizera Netaviŝtuko, li estus svenbatinta, disrompinta lin sen kompatato. Li do iris ĉe la preposton, trovis lin laborantan en lia ĉambro. Netaviŝtuko restis en la enireja ĉambro.

- Pardonu, sinjoro preposto se mi ĝenas vin, temas pri gravaj aferoj, kaj mi bezonas vian helpon por elturniŝi sendamaĝe.

Mutie mallonge rakontis al la preposto tion kio ĵus okazis kaj tion kio estis malkaŝita de la naiva raporto de la eta Paŭlo.

- Vi komprenas mian embarason, sinjoro preposto, se la generalo vidas Netaviŝtukoⁿ, li mortigos lin sen voli kaj sen scii tion. Aliflanke, se mi reiras sen li, li tuju volos mem veni preni lin. Kaj plie, la patro de la infanoj estas tiom indignigita pro la malico, la nedankemo de Netaviŝtuko rilate al Jakobo, ke ĉe tiu flanko, ekzistas ankoraŭ danĝero por eviti.

PRP : Vi bone faris, mia bona amiko, veni paroli al mi. Mi vidas nur unu eblon por eviti ĉi tiujn du danĝerojn, estas forigi Netaviŝtukoⁿ.

MUT : Kien sendi lin, sinjoro preposto ? Ĉe kiu ? Kun kiu ?

PRP : Mia servistino kondukos lin ĉe ŝian fraton, ĝendarmo en Domfronto; tien li estos sub bona gardado, kaj ni kredigos al li ke li estas sub stato de arestito. Ĉu vi volas alvoki mian servistinon ?

Mutie estis respondonta, kiam krioj, sekvitaj de teruraj

hurladoj, aŭdiĝis. Li kuregis al la flanko el kie ili foriris, la preposto sekvis lin kun pli da malrapideco. Alvenintaj ĉe la pordo de la ĉambro el kie tiuj abomenaj krioj foriris, ili trovis ĝin duturne ŝlosita.

- Oni tranĉas la gorĝon de mia kompatinda servistino, ekkriis la preposto kun teruro.

- Necesas ĉiariske eniri, kriis Mutie.

Li premis kontraŭ la pordo, sed ĝi malfermiĝis eksteren; ĝi estis el kompakta kverko. La seruro estis solida. La tuta forto de Mutie estis nesufiĉa por rompi ĝin. La kriegoj daŭris. La voĉo raŭkiĝis kaj mallaŭtiĝis.

- Tra la fenestro ! ekkriis Mutie.

Kaj ĵetante sin eksteren, li rompis iun fenestran vitron, turnis la espanjoleton, saltis en la ĉambron kaj vidis viron kiun li ne rekonis unuatempe, svenbatanta per vipfrapoj iun knabeton duone senvestigitan, kiu tordiĝis kaj muĝis sub la tenado kaj batado de la viro. Ĉiu bato markis sur lia karno palegan spuron.

Mutie ĵetis sin sur la nekonaton, ekprenis al li la vipon el la manoj, bruske forpuŝis lin kaj estis fraponta lin kiam li mem preskaŭ falis pro surprizo : la viro estis la generalo, la infano estis Netaviŝtuko. La generalo, ne vidante reveni Mutie^{on} kaj konjektante perfidon, milde eliris el la gastejo, iris al la prepostejo kie li trovis Netaviŝtukoⁿ en la ĉambro. La generalo estis armiĝinta per sia vipo por hundoj. Li diris nenion, sed liaj okuloj ĵetis fajron kiam li vidis Netaviŝtukoⁿ, plena de espero, miele alpaŝi al li nomante lin sian karan generalon. Li ĵetegis sin sur lin, elŝiris al li en malpli ol minuto liajn vestojn, duturne ŝlojis la pordon, kaj komencis regali per knuto kun vigleco kiu kaŭzis la hurladojn de la kulpulo.

Kiam Mutie ĉesigis la torturon de Netaviŝtuko, la generalo demandis al ĉi tiu lasta ĉu li nun sciis tion kio estis

la knuto. Netaviŝtuko daŭrigis kriegi kaj ruliĝi pro la eksceso de sia suferado. Mutie en la ĉambro, kaj la preposto ekster la fenestro, restis senmovaj, ne sciante kiun flankon elekti. Laŭmezure kiel la kolero de la generalo disiĝis, honto ŝajnis trafi lin. Ankaŭ li restis sur la sama loko, sen moviĝi, sen diri vorton. Mutie estis la unua kiu parolis : "Sinjoro preposto, bonvolu sendi al mi vian servistinon. Mi tuj malfermos la pordon de la ĉambro. Tiu infano bezonas helpon".

PRP : Mi baldaŭ mem revenos kun ŝi, mia amiko.

Necesas al tiu knabo seriozan bandaĝon. Ni kovros lin per vino kaj oleo, la balzamo de la samariano de la Evangelio.

Mutie iris malfermi la pordon. Nek li, nek la preposto, nek la servistino atentis al la generalo kiu pli kaj pli ŝajnis honta kaj embarasita. La servistino kaj Mutie kunportis Netaviŝtukoⁿ en sian ĉambron. La generalo haltis per la brako la preposton kiu sekvis ilin.

- Sinjoro preposto, mi donos al vi dek mil frankojn por ĉi tiu ŝtelisto, li diris mallaŭte.

La preposto ĵetis al li severan rigardon. "La mono ne elaĉetas la malbonon, Sinjoro, ĝi ne pagas la suferadon".

GNR : Sed kion vi volas ke mi faru ?

PRP : Nenion, sinjoro, neniu petas ion al vi, necesis deteni vin de tio kion vi faris. Nun vi povas nur pardonpeti al Dio pro via perforto kaj bremsi ĝin en la estonteco.

GNR : Sinjoro preposto, ne rigardu min per tiom severaj okuloj, ili maltrankviligas miajn konsciencojn kaj koron. Mi ne estas malbona, mi certigas al vi, nur iom tro vigla.

PRP : Ne malbona, Sinjoro ? Iom tro vigla ? Kiam vi kruele svenfrapas infanon tro malfortan por kontraŭstari vin ? Mi ripetas al vi, sinjoro, pardonpetu al Dio. Mi ne havas alian konsilon por doni al vi.

Kaj la preposto eliris, lasante la generalon pli senkuraĝa ol kolera.

- Stultulo kiun mi estas ! li murmuris. Jen ĉiuj kontraŭ mi. Mi forte batis lin, estas vere ! Sed ankaŭ, kia kanajlo tiu friponeto !... Tio kio frenezigas min, estas lia fiksa ideo, stulta, sensenca, adoptigi sin de mi. Kaj opinii ke mi mem havis dum kvin minutoj tiun penson ! Ke mi estis povanta koncepti tian deziron ! Nu, kion fari nun ? Foriri. Ĉe la Gardanĝelo, ili ĉiuj estos kiel erinacoj. Ili ĵetos rigardojn al mi ! Ili malvarme traktos min ! Ŝtipkapulo kiun mi estas ! Mi havas nur tion kion mi meritas.

Tiel parolante, la generalo alvenis al la Gardanĝelo. Li malrapide malfermis la pordon, hezitis eniri, fine decidis tion, kaj trovis sin vidalvide al Elfia.

- Nu ! Generalo, demandis ŝi ridante, ĉu vi aranĝis vian aferon kun Netaviŝtuko kiel vi deziris ? Laŭ via kontentiĝo ?

GNR : Kiel mi volis, jes; laŭ mia kontentiĝo, ne ĉar mi estas tre malkontenta.

ELF : Kaj pro kio do, generalo ? Kio malkontentigis vin ?

GNR : Estas mi mem, evidente. Mi kondukis kiel stulto, kiel furioza frenezulo, kiel kruela besto. Anstataŭ vipi Netaviŝtukoⁿ kiel li meritis tion, por admono, mi batis lin... per knuto, ĝis dispecigi lin.

SLD : Vi bone agis, mia generalo ! Mi estus same aganta sur via loko.

GNR konsolita : Vi opinias, mia amiko ? Mi kredas ke vi eraras. La preposto diris ke mi estis malbona, kruela, kaj ke mi devis nur pardonpeti al Dio. Kaj tiu preposto, komprenu, mia kara, ĉi tiu preposto estas sperta; li estas bona, kaj plie mi fidis lin. Mi tro malmole frapis, estas vere ! Mi rabie koleris ! Mi mortigus tiun mizerulon kiu, post esti ŝtelinta min, post esti volinta suspektigi kaj akuzigi la kompatindan Jakoboⁿ, havas la senhontecon miele alveni al mi kaj nomi min

lian karan generalon... Mi mortigintus lin tiom mi estis ŝokita, indignita, se Mutie ne venus ĵeti sin sur min kaj elŝiros el mi mian knuton.

ELF : Kaj kion diris al vi Mutie, mia generalo ?

GNR : Nenion, infano mia ! Nenion ! Ne iun vorton, ne iun rigardon. Li pli ĉagrenis min per tiu silento, tiu malŝato, ol se li batadis min. Tiu bona Mutie ! La indigno estis pentrita sur lia vizaĝo ! Kaj la okuloj de la preposto ! Kia rigardo malvarma, pezega !... Jes, jes, mia Elfnjo, ili estas tre koleraj kontraŭ mi. Kaj mi ja estas tute malfeliĉa kaj konfuzita, tio kio pravas ke mi malpravas kaj ili pravas. Elfia, Derigni, riparu mian pacon kun Mutie. Mi ŝatas tiun knabon, kaj mi ne povas toleri la penson ke li serioze havas rankoron kontraŭ mi. Mi rekomendas min al vi, miaj amikoj, kaj al vi, mia edzineto. Mi kredas ke mi aŭdas lin alveni, mi forkuras, alvoku min kiam vi trankviligos lin.

Kaj la generalo per pli da lerteco ol oni povis supozi en li, malaperis malantaŭ sian pordon ĝuste kiam Mutie malfermiĝis tiun de la Gardanĝelo.

Elfia alkuris al li. Ŝia gaja kaj dolĉa rideto sensulkigis la afliktitan frunton de Mutie.

ELF : La generalo estas malgaja kaj honta, mia amiko, honta pro sia kolero, malĝoja pro via silento kaj pro via videbla malkontenteco.

MUT : Li pravas, mia kara Elfia, kaj mi vidas ke li komisiis al vi pledi lian kazon; ĝi estas tre malbona, vi havas multe por klopodi.

ELF : Mia bona Jozefo, pensu do ke la generalo estas tre kolera...

MUT ridetanta : Unua kaj bona eskuzo.

ELF : Lasu min fini. Kiam li koleras, li realigas aferojn kiujn li poste bedaŭras...

MUT : Kaj kiuj tamen estas realigitaj.

ELF : Estas vere, mia amiko, sed li estas tiom malkontenta ke oni pardonas lin kontraŭvole. Kaj plie, pensu pri la malafableco, pri la maldankemo de tiu malbona Netaviŝtuko; pri tio kio okazus se li sukcesis meti en la matraco de nia kompatinda Jakĉjo la objektojn ŝtelitajn al la generalo. Li meritis severan punon ĉar mi mem kiu ne estas kruela, mi estus regalinta lin kun vera plezuro.

SLD : Kaj mi, mia kara Mutie, mi diras kiel via bona Elfia, tiu knabo estas fiulo, kaj mi estus doninta al li teruran bastonadon.

BLD : Kaj fine, Jozefo, necesas diri ke la generalo estas ruso, kaj ke en Rusio la vipobatoj estas pli facile donitaj ol ĉe ni.

MUT : Eble vi pravas, miaj amikoj, mia eta Elfia estas bonega advokato. Sed ĉu la generalo reale domaĝas mian aprobon aŭ mian malkontentiĝon ?

ELF : Multege, mia amiko. La kompatinda viro ĉagrenis min; li estis tiom honta, tiom malfiera, tiom malgajiga ! Li forkuris kiam li aŭdis vin veni. Li kuris ! Mi ne opiniis ke li estis tiel facilmovi.

Mutie ridetis, ameme premis la manon de Elfia kaj iris frapi sur la pordon de la generalo.

GNR : Kiu estas tie ? Eniru.

Mutie eniris, haltis dum momento. La generalo rigardis lin preskaŭ timete. Lia rigardo petegis kompaton. Mutie, kortuŝita de ĉi tiu nevertigita konfeso de lia kulpo, respondis al tiu rigardo per bona kaj sincera rideto. Li paŝis al li kaj premis unu el liaj manoj en la siaj, respektoplene klinante sin. La generalo sin ĵetis al lian kolon, brakumis lin, preskaŭ faligis lin, sufokis lin, kaj diris al li nur unu vorton : "Dankon, mia amiko". Sed per tono tiel amika, tiel emociita, ke Mutie sentis foriĝi la lastan spuron de malkontentiĝo, kaj ke li redonis al li lian brakumon kun la tuta varmeco de vigla kaj

sincera korinklino.

"Uf ! diris la generalo, mi havas cent funtojn malpli sur la koro ! Mia bona Mutie ! Tia generalo kia mi estas, mi bezonas vian estimon, vian amikecon, proporcie al la estimo kaj al la amikeco kiujn mi donas por vi. Antaŭ momento mi estis malfeliĉa ! Mi sentis vin kolera kontraŭ mi, kaj mia konscienco diris al mi ke vi pravis. Nun mi sentas min feliĉa kaj malpeza kiel plumo.

- Dankon... dankon, mia generalo, diris Mutie siavice kortuŝita.

GNR : Ni iru vidi la aliajn tien. Mi ne plu hontas pri neniu. Sed antaŭe, diru al mi, mia amiko, kiel fartas la kompatinda kanajlo ?

MUT : Ne tro bone, mia generalo, sed nenio serioza. La balzamo de la preposto bone sanigas.

GNR : Estas ke estas tiu de la Evangelio. Tio ne estas mirinda ke ĝi brile sukcesas.

Kaj la generalo eniris en la ĉambro sekvata de Mutie.

23 Plena riparo.

La gaja mieno de la generalo vidigis al Elfia ke ŝi tute sukcesis en sia traktado. Ŝi antaŭeniris al li kun rideto sur la lipoj. La generalo plurfoje premis al ŝi la manon.

- Bona koro ! Bonega infano ! li ripetis. Kaj vi aliaj, etuloj, li daŭrigis direktante sin al la infanoj kiu revenis de la ĝardeno, ĉu vi opinias min tre malafabla ?

PAŬ : Tre malafabla, kaj se mi estus panjo, mi pentigus vin.

GNR : Kiu puno ? Kion vi farus al mi ?

PAŬ : Mi donus al vi sekan panon por vespermanĝi tute sola en malgranda angulo.

GNR : Kaj vi, Jakobo, kiu nenion diras, kion vi opinias ?

JAK : Mi opinias ke vi malbone agis, sed ke necesas tamen ami vin, ĉar ne estas intence ke vi estas malafabla.

GNR : Lasu do Derigni, lasu lin paroli, mi volas koni lian ideon kiu eble estas tre bona. Parolu, Jakĉjo; klarigu tion kion vi ĵus diris. Kiel, laŭ vi, mi estas ne intence malafabla ?

JAK : Ĉar vi tiom ekkoleras ke vi ne plu scias aŭ tion kion vi diras aŭ tion kion vi faras. Kaj tio ne estas via kulpo. Neniu diris al vi ke estas malafable ekboli. Kaj ĉar vi estas tre bona kiam vi ne estas kolera, ĉiuj tamen amas vin.

GNR : Mi dankas vin, mia infano, mi provos ne plu ekboli. Kiam mi bezonos furioziĝi, mi pensos pri tio kion vi diris al mi; dankon, dankon, infano.

Derigni havis akran antaŭtimon pri la replikoj de siaj infanoj. La vortoj de la generalo trankviligis lin. Li ĵetis al Jakobo patran ameman rigardon kiun la generalo sentis ĉar li iris al li, premis al li la manon kaj diris al li : "La Gardanĝelo havigas feliĉon; viaj infanoj estas ĉarmaj kaj bonegaj kiel sia

dua panjo kaj sia onklino.

La tago ne pasis sen tio ke la generalo reparolis pri la vespermanĝo ĉe Ĉelito kaj pri la tago de la geedziĝo kiu estis finfine decidita je dusemajno. La generalo tuj izoligis por skribi. Li faris siajn mendojn, sendis bileton por sia bankisto en Parizo, mendis taŭgan dotaĵon laŭ la rango de Elfia, nenombreblan manĝilaron, broĉojn, pinglojn, orelringojn, ŝalojn, ŝtofojn; donacojn por sinjorino Blidot, por Derigni, por la preposto, por la infanoj; aldonon de meblaro por la gastejo Burniero kiu estis por vendi kaj kiun li volis tuj aĉeti por afero kiun li havis en la kapo.

Li skribis al Domfronto por alvenigi notarion, li volis lin ĉe la vespero mem. Mutie esprimis al li ke estus tro malfrue, ke ĉi tiu tujfaremo pagigus al li la gastejon ĝis triono super ĝia valoro.

GNR : Kion gravas al mi, mia kara, kelkaj miloj da pliaj rubloj ? Kion vi volas ke mi faru ĉi tie pri miaj sescent mil rentaj rubloj ?

MUT : Uzu ilin bone, mia generalo, vi trovos por meti ilin.

GNR : Sed kiel ? Mi ja ne petas pli bone, sed kiel diris Jakobo la saĝulo, neniu diras al mi tion kio estas bona aŭ malbona.

MUT : Nu, mia generalo, pardonu se mi permesus al mi direkti vin pri la uzo de via mono; sed... Ŝajnas al mi...

GNR : Kio, mia amiko ? Parolu. Vi ne havas sufiĉe kun dudek mil frankoj, ĉu ne ? Petu ĉion kion vi volos, mi anticipu konsentas pri ĉio.

MUT : Ho ! mia generalo ! Kiel vi povas havi tian penson ? Mi havas tro kun dudek mil frankoj kiujn mi ŝuldas al via malavareco. Sed mi pensas ke, se vi volus... iom ripari la malbonaĵon kiun vi faris al tiu fiulo kiu ŝtelis vin kaj kiu meritis vian tutan indignon, sed kiun vi reale tro frapis, vi

lianome metus kelkajn milojn da frankoj kiuj certigus liajn vivrimedojn.

GNR : Gratulojn ! Mia amiko, tre bone pensita ! Kaj poste ? Mi ŝatus fari pli bone ol tio, ion por la vilaĝo, ion kiu restos !

MUT : Nenio pli facila, mia generalo. Babilu pri tio kun S^{ro} preposto; li konas la bezonojn de la komunumo, li diros al vi tion kio mankas al ĝi.

GNR : Bonege ! Perfekte ! Rapide, mia amiko, iru venigi la preposton, diru al li ke li rapidu, ke mi brulas pro senpacienco.

MUT : Mia generalo, mi timas ke post la sceno de ĉi tiu mateno, li ne volos veni.

GNR : Estas vere ! Kaj tamen, necesas ke mi vidu lin hodiaŭ, tuj. Mi havas ideon. Donu al mi mian ĉapelon, mi tuj iros.

MUT : Mia generalo, bonvolu atendi momenton. Permesu ke mi unue iru sciiĝi ĉu li ne...

GNR : Estas nenio por scii. Mi volas mem tuj iri. Mi malpravus, mi scias tion, kaj mi iras akordiĝi kun tiu preposto kiu estas brava kaj bonega viro.

La generalo kaptis sian ĉapelon kaj foriris preskaŭ kurante, sekvita de Mutie kiu vane petegis lin atendi ke li antaŭsciigis la preposton. Tiel ili transiris la ĉambron kie laboris la du fratinoj. Ili ŝajnis surprizitaj kaj pridemandis per rigardo Mutie^{on} kiu povis nur respondi per trankviliga rideto, ŝultrolevo kaj gesto kiu indikis novan strangan ideon kiu pasis tra la kapo de la generalo.

Post du minutoj la generalo estis antaŭ la pordo de la preposto. Li eniris kiel uragano, flankenpuŝis la servistino kiu troviĝis sur sia irado, kaj alvenis, ankoraŭ kurante, en la ĉambron kie staris la preposto. Lia bruema enirado ekstremitis tiun ĉi.

GNR : Sinjoro preposto, mi venas diri al vi ke mi malpravas, tre malpravas, mi venis prezenti al vi miajn ekskuzojn.

PRP : Ne estas mi, Sinjoro, kiun vi ofendis. Vi ŝuldas al mi neniun senkulpigon.

GNR : Jes ja, kompreneble ! Estas vi ĉar vi estas la homo de Dio. Sed Mutie pardonis min, ĉu ne, Mutie, ke vi pardonis min (turnante sin al Mutie kiu kapjesas ridetante). Do, S^{ro} preposto, mi venas diri al vi ke, por pentofari mian koleron, mi unue volas certigi la monrimedojn de via malbona stranga Netaviŝtuko. Vi diros al mi tion kio necesas kaj ne ĝenu vi, petu tion kion vi volos. Kaj poste, Mutie diris al mi peti de vi konsilon pri la cetero. Kio necesas ke mi faru ? Kion vi volas ke mi faru ? Kion oni bezonas ĉi tie ? Rapidu, ĉar la notario venos morgaŭ, kaj se necesas aĉeti ion, mi tuj faros tion.

La preposto restis konsternata antaŭ tiu fluego de paroloj, tre rapide kaj tre vigle diritaj. Li rigardis Mutie^{on} kiu ne povis reteni sin rideti pro la videbla malpacienco de la generalo kaj pro la ne malpli videbla embaraso de la preposto.

GNR : Nu do ! Nenian respondon ? Kiu silentas, tiu konsentas. Mi atendas, sinjoro preposto, la liston de viajn bezonojn.

PRP : Generalo ! Mi tute ne scias... mi ne tre bone komprenas...

GNR : Diable ! Estas tamen tre facile por kompreni. Mi agis kiel diablo, mi volas agi kiel gardanĝelo por kompensi.

La preposto ne sukcesis reteni sin rideti, la kazo estis gajnita. La generalo premis lin en siajn brakojn, poste devigante lin sidiĝi, sidigis sin apud li, kaj provante afekti gravan mienon : Nun, sinjoro preposto, disvolvu por mi vian rozarion. Kion vi bezonas ?

PRP : Vi ne kredas tiom bone diri, Sinjoro, ĉar estas tre vere ke estas iu tuta ĝeno da urĝaj bezonoj.

- Des pli bone, diris la generalo, gaja kaj frotanta al si la manojn. Ni komencu.

PRP : Unue, helpodonacojn por mia malriĉuloj, vestojn, panon, kuracilojn por la malsanuloj, ktp. Poste, ĝeneralan riparadon de mia mizera preĝejo, plus la internan ornamon, farbadojn, vitralojn, oritaĵojn, ktp. Konstrui kaj ornami iun sakristion, niaj ornatotoj kaj niaj sakralaj vazoj estas en plorinda stato.

GNR : Estas unu. Tio estas kvindek mil frankojn.

Poste ?

La preposto saltis el sur sia seĝo.

PRP : Kvindek mil frankojn ! Estas duono tro, generalo.

GNR : Nu bone ! Kun la resto, vi riparigos, aranĝigos vian prepostejon kiu disfalas en ruinojn kaj ĉifonaĵojn.

Poste ?

PRP : Se ni povus havi kvar religiajn flegistinojn, generalo, ni havus bonan instruadon por la knabinoj, azilĉambron por la malriĉaj infanoj, kun helpoj kaj kuraciloj por la malsanuloj.

GNR : Ĉu vi povos havi ĉion per cent mil frankoj ?

PRP : Per cent mil frankoj, ni povus plie konstrui kaj komenci malsanulejon por ses aŭ ok malsanuloj, generalo. Tio estus la feliĉo de la lando.

GNR : Vi ricevos cent kvindek mil frankojn por tio ĉio post nelonge, sinjoro preposto, kaj se tio ne sufiĉas, vi diros al mi. Mi aldonas dek mil frankojn kiujn vi investos por tiu fripono Netaviŝtuko. Li ŝuldas ilin al mia pento. Se mi ne batadis lin tiel terure, mi neniam estus donanta al li pinglon al tiu ŝtelisto, al tiu mensogulo, al tiu kalumniulo, sendanka, malbona, trompema, unuvorte al tiu fiulo. Mi ne volas revidi lin dum mia vivo. Mi ne responsas pri tio kiun mi farus se li

aŭdacus denove prezenti sin ĉe mi.

La preposto ne sciis la detalon pri tio kio okazis. La generalo tion rakontis al li kun multaj epitetoj kaj insultojn kontraŭ Netaviŝtuko. La preposto tiam pli bone komprenis la koleron de la generalo, parte pardonis lin kaj deklaris ke tuj post la resaniĝo de Netaviŝtuko, li metus lin ĉe la Fratoj de la kristana doktrino, solaj kapablaj reteni kaj korekti la malvirtajn inklinojn de tiu bedaŭrinda infano. Koncerne la ŝtelitajn aĵojn, la preposto tuj iris traserĉi en la ĉambron de Netaviŝtuko. Li ne malfacile trovis funde de tirkesto de komodo, sub pako da vestaĵoj, la pokaleton kaj la manĝilon kiujn li redonis al Mutie.

La generalo kaj la preposto disiĝis tre kontentaj unu de la alia. La generalo invitis la preposton por veni vespermanĝi.

"Ne ĝenu vin, mia bona preposto, ofte venu manĝi kun ni, la fratinoj de la Gardanĝelo tre amas vin, ankaŭ Mutie, ankaŭ la infanoj. Ilia patro amas vin, kaj mi, mi respektas vin kaj amas vin. Ke la elspezo kiun vi kaŭzos al ili ne haltigu vin. Estas mi kiu pagas ĉion ekde la tago kiam mi unuafoje enpaŝis en la domon... Vi, Mutie, vi ne bezonas balanci la kapon kaj barakti kiel diablo en sanktakvujo. Mi diras al vi ke estos tiel. Mi pagas ĉion aŭ mi ne ĉeestos en la geedziĝofesto. Ha! Ha! La minaco estas efika! La amiko Mutie trankviliĝas! Bone, mia knabo, bone!

La generalo foriris ridante, Mutie sekvis lin ankaŭ ridante. La preposto rigardis ilin malproksimiĝi kaj residiĝis post momento: "Stranga originalulo, li diris. Bonulo, bravulo! Malavara, justa, sed terura por vivi. Kian tanadon li donis al mia povra Petro Netaviŝtuko! Tiu lasta tamen meritis tion. Nun ke tio estas farita, tio plaĉas al mi. Li komencis komplete deflankiĝi.

24 Misteroj.

La morgaŭon, la notario kiun la generalo venigis la antaŭtagon per la ekspreso, por grava afero, alvenis frumatene. La generalo enfermiĝis kun li longtempe. Ili eliris el tiu konferenco, ambaŭ kontentaj kaj konkure ridantaj. La generalo diris neniun vorton al neniuj pri tio kio okazis inter ili, kaj kiam la notario foriris, li metis fingron sur lian buŝon por admoni al li silenton, kaj promesis lin reveni tre ekzakte por la geedziĝa kontrakto de Elfia, la antaŭtagon de la geedziĝofesto.

- Ne forgesu, mia tre kara, ke vi partoprenos en la geedziĝofesto, ĉefe en la tagmanĝo, tagmanĝo de ĉe Ĉelito. Ne maltrankviligu vin pri via enlitiĝo, estas mi kiu gastigos.

- Sed generalo, flustre diris al li sinjorino Blidot, ni ne havas lokon.

- Ta, ta, ta, mi ja havas lokon, estas mi kiu gastigos, ne estas vi. Trankviliĝu, zorgu pri nenio; ni malordigos nenion ĉe vi.

La notario salutis kaj foriris. La generalo frotis al si la manojn kiel kutime kaj ruze ridetis. Li proksimiĝis la fenestron rigardante al la ĝardeno.

"Estas beletaj ĉi tiuj herbejoj kiuj bordas vian ĝardenon! Kaj la malgranda arbaro kiu estas dekstre, kaj la rivero kiu fluas en la mezo. Estus tre oportune havi ĉion tute. Kia domaĝo ke tio ne estas por vendi!

Sinjorino Blidot kaj Elfia ne respondis. Estis por vendo, la ruza generalo sciis tion antaŭ horo. Li ankaŭ sciis ke la fratinoj ne havis la necesan fonduson por aĉeti tion. Necesis havi dudek kvin mil frankojn, ili havis nur tri mil.

- Domaĝe, ripetis la generalo. Kian beletan malgrandan

bienon tio farus al vi ! Kaj, se fremdulo aĉetas tion, li povas konstrui ĉe la fino de via malgranda ĝardeno, malpermesi al vi ĉerpi akvon en la rivero, ĝeni vin per mil manieroj. Ĉu ne estas vera tio kion mi diras, Mutie ?

MUT : Tre vere, mia generalo; tial mi ne diras ke ni ne havas fortan deziron akiri ĝin. Kaj se Elfia konsentas, la dudek mil frankoj, kiujn mi tenas pro via bonkoreco, mia generalo, povos servi al la pago de granda parto, sed ni atendos ĝis kiam la propraĵo estu por vendi.

La generalo petole ridetis, li estis antaŭkalkulinta ĉion, aranĝinta ĉion. La notario ricevis ordonon respondi en okazo de peto, ke ĉio estis vendita. Ekde tiu tago, la generalo alprenis misterajn sintenojn kiuj multe mirigis Mutie^{on}, Derigni^{on} kaj la du fratinojn. Li luprenigis al Domfronto kabrioleton jungita de fortika ĉevalo. Li ĉiutage enveturiĝis post tagmanĝo kaj revenis nur vespere. Kutime li foriris sola kun la koĉero, kelkfoje li kunprenis kun si la preposton.

Ni plurfoje demandis al la koĉero kien li veturigis la generalon, ni neniam sukcesis eltiri vorton, krom : Mi estas malpermesita paroli, se mi diras vorton, mi perdos trinkmonon de cent frankojn.

Kelkaj homoj sekvis la kabrioleton, sed la generalo ĉiam ekvidis tion. Tiujn tagojn, li iris, iris kiel la vento, ĝis la sciemulo devis ĉesi sian postkuron sub minaco de krevigi siajn ĉevalojn.

Alia kaŭzo de surprizo por la vilaĝo, estas ke, malmutajn tagojn post la vizito de la notario, amaso de laboristoj de Domfronto venis ekloĝi en la gastejo de Burniero. Ili laboris per tia fervoro ke, en ok tagoj, ili faris kompletan ŝanĝon. La fronto estis ebenigita, sablita kaj borderita de trotuaro; beleta perono el ŝtono anstataŭis la ŝtupojn el duonrompitaj brikoj kiuj iam troviĝis tie. La duklapaj fenestroj kun malgrandaj malhelaj kaj malpuraj vitroj estis anstataŭigitaj

de belaj duklapaj fenestroj kun grandaj vitroj. La tuta domo estis riparita kaj refarbata; la korto, plivastigita kaj purigita; la staloj, la porkejo, la ŝtipejo, la lesivejo, la keloj, la fojnejo, ventolitaj kaj aranĝitaj. Veturiloj kun mebloj kaj objektoj necesaj por gastejo ĉiuvespere alvenis sed neniu vidis tion kion ili enhavis ĉar oni atendis la nokton por malŝarĝi ilin kaj loki ĉion. Tage, la laboristoj malpermesis la alproksimiĝon al la domo.

Same estis en la herbejoj kaj la arbaro kiuj bordis la proprietaĵon de la Gardanĝelo. Amaso da laboristoj ellaboris tie irejojn, starigis tie benkojn, metis tie korbojn da floroj, superpontis pontojn super la rivero, reguligis al ĝi la randojn. Ili konstruis tuj videblan de la Gardanĝelo malgrandan tegmentitan enŝipejon al kiu oni alligis per ĉeno beletan promenadan boaton. Ĉiu tago donis novan ĉarmon al tiu ĉi malgranda posedaĵo deziregita de Elfia kaj Mutie, kaj ĉiu tago kreskigis ilian seniluziigon. Estis evidente ke ĉi tiu posedaĵo estis antaŭnelonge aĉetita. La nova proprieto verŝajne volus konstrui loĝejon por ĝui la laborojn kiuj tiel beletigis la lokon.

- Kara Elfia, diris Mutie, ni ne deziru pli ol tion kion ni havas. Ĉu ni ne estas tre feliĉaj per tio kion jam donis al ni la bona Dio? Cetere, por mi, feliĉo en ĉi tiu mondo estas vi, la resto estas bagatelo. Ĝi nur utilas por plibeligi mian feliĉon, kiel beleta tuaeto plibeligos vin dum la tago de nia geedziĝo.

ELF: Vi pravas, mia amiko, tial mi donos ĉiujn herbejojn kaj ĉiujn arbarojn de la mondo por gardi vin apud mi. Mi nur trovas ĉagrena esti kapablaj aĉeti ĉion tion kaj esti por ĉiam senigitaj de tio, pro manko esti pensante al tio pli frue.

- Estas tuteĝuste tio kion mi pensis, miaj povraj amikoj, diris la generalo per dolĉa voĉo. (Li rehejmeniris de la ĝardeno post esti ekzameninta la laborojn kiuj progresis laŭ

eksterordinara rapideco). Sufiĉus nur tratrii la heĝon de via malgranda ĝardeno, kaj tie vi tiam havus ravan bienon.

MUT : Pardonu, mia generalo, se mi rimarkigas al vi ke estus pli bone ne pliigi la bedaŭrojn de mia povra Elfia. Ŝi estas ankoraŭ tre juna, kaj estas facile vigligi ŝian imagon.

GNR : Ba ! Ba ! Ĉu ŝi ne diris antaŭ momento, ke vi valoris por ŝi ĉiujn arbarojn kaj ĉiujn herbejojn ? Vi estas por ŝi la ombro de la arbaroj, la malvarmeteco de la riveroj, la suno de la herbejoj. Ha ! ha ! ha ! Iom da korsento, kompreneble ! Anstataŭ afekti mienojn de ĉefanĝeloj, vi ambaŭ rigardas min per preskaŭ malafabla mieno. Ha ! ha ! ha ! Mutie estas furioza ĉar mi ne faras jeremiadojn kun lia Elfia, kaj Elfia estas furioza ĉar mi fajfas pri ŝiaj sopiroj kaj pri ŝiaj bedaŭroj pri la herbejoj kaj la arbaroj. Ĝis revido, miaj amikoj, mi devas iri butikumi.

Kiam li estis foririnta : Jozefo, diris Elfia al Mutie (kiu mordis siajn lipharojn por reteni la humoron kiun estigis al li la generalo), Jozefo, la generalo estas neeltenebla ekde kelkaj tagoj. Mi estus kontentega vidi lin foriri.

MUT : Mia kompatinda Elfia, li estas bona, sed petolema. Kion fari ? Estas lia naturo. Necesas akcepti ĝin kaj ne forgesi la bonon kiun li faris al ni. Sen li, mi neniam kuraĝus peti vian manon.

ELF : Sed mi, mi ĝin donintus al vi, mia amiko, mi estis tute decidinta dum via dua vizito.

MUT : Tio kio ne maleblas ke, post vi, estas al la generalo ke mi ŝuldas tion kaj ia bonfaro kiel tia pardonigas multajn neperfektaĵojn.

25 La kontrakto.

La tago de la geedziĝfesto proksimiĝis. La generalo estis flugema kiel vento. Li el- kaj en-iradis dudek fojojn tage. Li alportigis amason da kestoj de la gastejo Burniero : li volis venigi la robon, la vualon kaj la tutan edziniĝan tualeton de Elfia. Li postulis de Mutie ke li farigu al si en Domfronto iun zuavan uniformon el bela fajna tolo. Li tiucele alkondukis lin ĉe la plej bona tajloro en Domfronto kaj faris mem la mendon. La depono de la dek mil frankoj por Netaviŝtuko estis finita, la elspezo de cent kvindek mil frankoj kiujn li donis al la preposto por la preĝejo, la prepostejo, la religiaj flegistinoj kaj la hospitalo estis finita. Netaviŝtuko, bone resanigita, estis translokita ĉe la fratoj de Domfronto. La kestoj de la vestaro kaj la donacoj estis alvenitaj. Escepte tiujn kiuj enhavis la tualetojn por la kontrakto kaj por la geedziĝa tago, kiujn la generalo volis liveri nur la lastan tagon. Ili estis malfermitaj kaj malplenigitaj por la ĝojego de Elfia kiu ĉiujn pardonis al la generalo kaj por la granda kontentigo de sinjorino Blidot, de Mutie, de la infanoj kaj de Derigni. Sinjorino Blidot ĉar ŝi trovis grandan aldonon de tukoj, de vazaroj, arĝentaĵoj kaj de diversaj objektoj utilaj por sia gastejo. Mutie ĉar li ĝuis la ĝojon de Elfia pli ol siajn proprajn ĝojon. La infanoj ĉar ili helpis por elpaki, por ordigi, kaj ĉar ĉio ŝajnis tiel bela al ili ke iliaj feliĉaj ekkrioj sin sekvis senĉese. Derigni ĉar li plu vivis nur por siaj infanoj, ĉar ĉiuj iliaj ĝojoj estis liaj ĝojoj, kaj ĉar iliaj malĝojoj estis por li pli ol la liaj. La generalo ne tuŝi la teron, li estis lerta, vigla, nelacigebla. Li kuris preskaŭ tiom kiom Jakobo kaj Paŭlo. Li ridis, li elpakis, li lasis sin puŝi, elpeli. Liaj dikaj mallertaj manoj ĉifis la

artiklojn de tualetoj, lasis eskapi la vazaron kaj aliajn rompiĝemajn objektojn.

De tempo al tempo, li kuris al la gastejo Burniero pretekstante bezoni aeron, poste al la laboristoj de herbejoj kaj arbaroj, por ricevi, li diris, iom da malvarmeto. Oni lasis lin fari, ĉiu estis tro agrable surprizita por ĝeni liajn irojn-reirojn.

La gastejo Burniero similis al formikejo, la laboristoj estis ankoraŭ pli multaj kaj pli aferemaj ol la antaŭajn tagojn. Alvenis pluraj belaj sinjoroj de Parizo kiuj ekloĝis tie kaj kiuj aĉetis en la vilaĝo kaj la ĉirkaŭaĵoj, tiel abundajn proviantojn da freŝaj legomoj, da butero, da ovo, da laktaĵo, ke oni pensis en Lumigni ke oni tre baldaŭ gastigos regimenton aŭ almenaŭ batalionon.

Mutie kaj Derigni ŝajnis esti perdintaj la konfidon de la generalo, li petis al ili nenion pli ol la nepre necesajn zorgadojn por sia persona servo.

Ili estis malpermesitaj tuŝi la pakojn kiuj sinsekvis. La generalo mem elkestigis ilin kaj ne permesis iun ĵeti ekrigardon. Elfia kelkfoje timis ke tio estus simptomo de malkontenteco. Mutie trankviligis ŝin. "Mi konas lin, li diris, estas kelka strangaĵo kiu pasas tra lia kapo kaj kiu eliros kiel tiom da aliaj kiujn mi vidis kun li.

Sinjorino Blidot zorgis pri la manĝo de la geedziĝfestoj, pri la vespermanĝo, pri la kontrakto. Kiam ŝi volis okupiĝi pri tio kaj pretigi ilin kun Elfia, la generalo malebligis ilin ĉiufoje ripetante : "okupiĝu pri nenio, ne turmentu vin pri io ajn, estas mi kiu prizorgas pri ĉio, kiu faras ĉion, kiu pagas ĉion.

BLD : Sed, mia kara bona generalo, ĉu ne necesas almenaŭ pretigi tablojn, vazaron, refreŝigaĵojn kaj lumilojn ? Mi havas nenion krom mian ordinaraĵon.

GNR : Estas bonege, mia kara sinjorino Blidot ! Estu trankvila. Fidu vin al mi.

Sinjorino Blidot ne sukcesis deteni ekridon al kiu aliĝis Elfia kaj Mutie. La generalo, kontentega, ridis pli laŭte ol ili ĉiuj.

BLD : Sed, mia bona generalo, pro la Diamo, lasu nin fari niajn invitojn por la vespermanĝo de la kontrakto kaj por geedziĝtago. Se ni ne faras invitadojn, ni faros al ni tiom da malamikojn kiom ni nun havas da amikoj.

GNR : Ba ! Ba ! Ne pensu pri tio ĉio. Estas mi kiu faras ĉion, kiu aranĝas ĉion, kiu invitas, kiu regalas, ktp.

BLD : Sed generalo, vi eĉ ne konas la nomojn de niaj parencoj kaj de niaj amikoj ?

GNR : Mi konas ilin pli bone ol vi ĉar mi scias el ili kiujn vi neniam vidis aŭ konis.

GST kun afliktita tono : Dio mia ! Dio mia ! Kion tio ĉio fariĝos ?

GNR kun spitema mieno : Vi vidos tion, morgaŭ estas la kontrakto, vi vidos.

BLD : Kaj pensu ke ni havas nenion preta, ne eĉ sufiĉe por servi tagmanĝo !

GNR ridanta : Ĝis baldaŭ, mia povra amikino, mi bezonas eliri, spiri freŝan aeron.

kaj la generalo kuris plivole ol paŝis al la domo Burniero. La laboristoj elfaris ĉion, oni finis alkroĉi super la pordo grandan ŝildon kovrita per tolo kiu tute kaŝis ĝin. Amaso da homoj estis ariĝinta antaŭ tiu ĉi ŝildon. La generalo alproksimiĝis al la grupo kaj demandis per seninteresa mieno : Kio estis tie ? Kion reprezentas ĉi tiu vualita ŝildo ?

Iu viro : Ni ne scias, generalo. (Oni komencis koni lin en la vilaĝo). Okazas strangaj aferoj en ĉi tiu gastejo, ekde ok tagoj, oni faras tie tumulton por nenion kompreni.

GNR : Eble estas por la proceso.

Iu bonulino : Estas tio kion iuj diras. Oni diras ke la Burnieroj estos mortkondamnataj kaj ke oni pretigas la

gastejon por ekzekuti ilin en la ĉambro kie ili malsukcesis murdi vin, generalo.

La generalo pene bridis la ridon kiu kaptis lin. Li dankis la bravajn homojn pro la bonaj informoj kiujn ili donis al li, daŭrigis sian promenadon, kaj vikle revenis al la gastejo de malantaŭo sen esti vidata de iu. Li eniris, rigardis kaj aprobis ĉion, stimulis per malavaraj trinkmonoj la homojn kiuj interne pretigis diversajn aferojn, kaj elŝteliĝis sen esti ekvidata de la loĝantoj de Lumigni.

26 Neatendita malavaraĵo.

La morgaŭo estis la tago de la kontrakto. Ĉiu estis malkvieta en la Gardanĝelo, oni vidis nenion veni. La generalo estis trankvila kaj babilema. Oni matenmanĝis. Nur Jakobo kaj Paŭlo estis gajaj kaj viglaj.

La generalo stariĝis kaj sciigis ke estis tempo por vestiĝi. Ĉiu iris en sian ĉambron, kaj el ĉiuflanke oni aŭdis foriri kriojn de surprizo kaj ĝojo. Elfia kaj sinjorino Blidot havis robojn el ŝanĝbrila silko, simplajn sed ĉarmajn; fajnajn ŝalojn el brodita silko; kufojn el bela punto. La rubandoj de Elfia estis ĉielbluaj, tiuj de ŝia fratino estis verdaj kaj ĉerizruĝaj. La kolumoj, la manikoj, la ŝuoj, la gantoj, la poŝtukoj, nenio mankis. Mutie trovis kompletan komfortan kostumon, Derigni same. Jakobo kaj Paŭlo, ĉarmajn ĵaketojn el pasamentita drapo kun la resto de la vestaĵoj. Ili ne forgesis siajn poŝhorloĝojn, ĉiu havis la sian.

La tualetado estis rapide finita, tiom oni urĝiĝis vidigi sin. Kiam ili ĉiuj kuniĝis en la ĉambro, la generalo majeste malfermis sian pardonon. Tuj li estis ĉirkaŭita kaj dankita kun vigleco kiu plenigis lin per ĝojo.

GNR : Nu, miaj infanoj, ĉu vi alifoje kredos la malnovan Durakinoⁿ kiam li diros al vi : Fidu al mi, ne maltrankviliĝu pri io ?

- Bone ! kara generalo ! oni kriis de ĉiuj flankoj.

GNR : Mi ripetas al vi, miaj infanoj, ne turmentu vin pri io; ĉio estos farita kaj bone farita. Nun, ni iru akcepti niajn gastojn kaj la notarion.

ELF : Kien tio, generalo ? Kie ili estas ?

GNR : Estas tio kion vi tuj vidos, mia infano. Nu ! Ni ekpaŝu ! Vice maldekstren !

La generalo eliris la unuan, li estis vestita per senceremonia uniformo kun sola insigno sur la brusto. Li direktis sin al gastejo Burniero, sekvata de ĉiuj loĝantoj de la Gardanĝelo. La generalo donis la brakon al Elfia, Mutie al sinjorino Blidot, Derigni donis la manon al siaj infanoj. La tuta vilaĝo metis sin al la pordoj por vidi ilin pasi.

- Sekvu, kriis la generalo, mi invitas vin ĉiujn ! Sekvu nin, miaj amikoj.

Ĉiuj tuj akceptis la inviton, kaj oni alvenis grandnombre al la gastejo Burniero. Ĝuste kiam ili estis antaŭ la pordo, la tolo de la ŝildo estis elprenita, kaj la entuziasmigata homamaso povis vidi pentraĵon bildigante la generalon piedstare. Li estis en kompleta uniformo, kovrita de medaloj kaj de insignoj. Super la pordo estis skribita per dikaj oraj literoj : "Al la dankema generalo".

La pentraĵo ne estis el alta kvalito, sed la simileco estis perfekta, kaj la brileco de la koloroj pliigis la belecon laŭ la okuloj de la popolamaso. Dum kelkaj momentoj, oni aŭdis nur bravokriojn kaj klakfrapojn de la manoj. Samtempe, la preposto aperis sur la perono, li faris signon ke li volis paroli. Ĉiu silentis.

- Miaj amikoj, li diris, miaj infanoj, la generalo aĉetis la gastejon en kiu li estus pereinta, viktimo de malŝatindaj murdistoj, sen la kuraĝo de S^{ro} Mutie kaj de vi ĉiuj kiu alkuris je la alvoko de nia brava serĝento. Li volis montri sian dankemon al la familio kiu fariĝas tiu de Mutie, akirigante al si ĉi tiun gastejon por disŝuti siajn bonfarojn en nia lando. Multe pli, miaj infanoj, li bonvolis dediĉi la grandegan sumon de cent kvindek mil frankoj por ripari kaj plibeligi nian plorindan preĝejon, por starigi domon de religiaj flegistinoj, hospitalon, azilĉambron kaj helpojn por la malsanuloj kaj kripluloj de la komunumo. Jen, miaj infanoj, tio kion ni ŝuldos al la donacemo de la dankema generalo. Tiu

ĉi ŝildo por ĉiam memorigu liajn bonfarojn !

La krioj, la vivuoj duobliĝis. Oni ĉirkaŭis la generalon, oni volis porti lin ĝis la interno de la domo. Li kontraŭbatalis tion unue kun kvieto kaj digno, poste kun ruĝiĝaj vangoj, per kelkaj duonvoĉaj sakraĵoj kaj iom tro fortaj svingadoj de brakoj, de kruroj kaj de ŝultroj, poste finfine per tiel perfortaj moviĝadoj ke ĉiu retropaŝis kaj lasis al li liberan pasejo.

Ni supreniris la peronon, eniris en la ĉambron. Elfia kaj Mutie trovis sin antaŭ densa homamaso : la notario, la parencoj, la geamikoj, la genajbaroj, ĉiuj estis invititaj kaj plenigis la ĉambron, plivastigita, plibeligita, farbita kaj meblita. Seĝoj estis sufiĉe nombre pretigitaj por ĉiuj gastoj. La generalo sidigis Elfiaⁿ inter li kaj Mutie, sinjorinon Blidot^{on} ĉe sia maldekstro, poste Derigni^{on} kaj la infanojn. La notario troviĝis kontraŭe kun tablo antaŭ li. Kiam ĉiuj estis lokitaj, la notario komencis la legadon de la kontrakto. Kiam temis pri la riĉaĵo de la geedzoj, la notario legis : "La edzinĝonto dote ricevas la herbejojn, arbarojn kaj dependaĵojn apudmetitaj de la domo nomata la Gardanĝelo".

Elfia eligis krion de surprizo, saltis de super sia seĝo kaj ĵetis sin preskaŭ surgenuje antaŭ la generalo kiu leviĝis, brakumis ŝin kaj kisante al ŝi la frunton : "Jes, mia kara infano, estas mia geedziĝa donaco. Vi baldaŭ iĝos la edzino, la amikino de mia brava Mutie, dufoje mia savanto kaj ĉiam mia amiko. Mi ne kapablas sufiĉe agnoski tion kion mi ŝuldas al li, sed helpante al la geedziĝo kun vi, mi esperas esti kvitiĝinta parton de mia ŝuldo".

La generalo etendis manon al Mutie, altiris lin al si kaj premis li kun Elfia en siaj brakoj.

- Ho ! mia generalo, diris mallaŭte Mutie, permesu ke mi kisu vin.

- Tutkore, mia infano. Kaj nun, ni daŭrigu nian

kontrakton.

La notario elfinis la legadon; ununura klaŭzo kiu ruĝiĝigis sinjorinon Blidot^{on}, ŝajnis rilati al la strangeco de la generalo. Estis dirita : "En la okazo, se la sinjorino vidvino Blidot volus reedziniĝi, ŝia parto de la propio de la Gardanĝelo revenus al sia fratino Elfia, kaj estus kompensita de la domo kun la ŝildo : "Al la dankema generalo" kiun la generalo grafo Durakino cedus al ŝi plenposede, sed kondiĉe ke sinjorino Blidot edziniĝus kun la viro indikita de la generalo grafo Durakino kaj kiun li gardas la rajton sciigi al ŝi".

La notario ne sukcesis deteni sin rideti vidante la miron kiun kaŭzis ĉi tiun klaŭzon de la kontrakto, kiun li vane provis elstrekigi. La generalo volis aparte gardi tion. Li ne volis cedi. Sinjorino Blidot ruĝiĝis, miris, kaj poste ekridis, dirante : "Bone pripensite, mi devigas min pri nenio, kaj neniu povas devigi min edziniĝi se mi ne volas".

- Kiu scias ? diris la generalo, kiu scias ? Vi eble volos kiam vi konos la edziĝonton.

- Neniu danĝero ke mi reedziniĝu.

- Necesas subskribi, Sinjoroj, Sinjorinoj, diris la notario.

- Kaj poste tagmanĝi, diris la generalo.

Sinjorino Blidot estis tute ne timigita de tiun anoncon de la generalo, kvankam nenio ŝajnis al ŝi organizita por ajna manĝo sed komencis kalkuli je tia feaĵon kiu faris ĝustatempe ĉion okazi.

Elfia subskris, poste Mutie, poste la generalo, poste sinjorino Blidot, la preposto, Jakobo, Paŭlo, Derigni kaj la homamaso. Kiam ĉiu estis surmetinta sian nomon aŭ sian krucon malsupre de la kontrakto, la generalo proponis reiri tagmanĝi à la Gardanĝelo. Sinjorino Blidot ne sukcesis deteni sin tremeti de la kapo ĝis la piedoj. Kiel tagmanĝi sen

tagmanĝo, sen manĝiloj, sen tablo !

- Generalo, ŝi diris kun peteganta mieno, se ni tagmanĝus ĉi tie, estas tiel bele !

GNR petoleme : Tute ne, mia edzineto, ni tagmanĝos ĉe vi. Ĉu vi ne vidas ke Elfia kaj Mutie estas sopirantaj promeni en sian novan proprieton ? Nu, ni ekiru.

La generalo malsupreniris la peronon, kuntirante sinjorinon Blidot^{on}, sekvata de Elfia kiu donis la brakon al Mutie, kaj de la cetero de la ĉeestantaro. Jakobo kaj Paŭlo kuris antaŭen kiel skoltoj. Ili alvenis la unuajn ĉe la Gardanĝelo, kaj faris senfinajn ekkriojn de ĝojo. La antaŭo de la domo estis garnita per kestoj de oranĝarboj kaj aliaj florantaj arbustoj. La ĉambro estis tapetita per blua ŝtofo, same kiel la kuirejo. Tabloj estis metitaj en ambaŭ ĉambroj. La generalo sidigis ĉiujn gastojn; li, Elfia kaj Mutie prezidis la unuan tablon; sinjorino Blidot, Derigni kaj la infanoj faris la honorojn de la dua. Pluraj servistoj, venintaj de Parizo, faris la servon, ili pasigis la pladojn, la vinojn. La kuiristoj superis sin mem. Oni neniam manĝis nek trinkis, nek vidis similan aferon en Lumigni. La preposto estis ĉe la maldekstro de la generalo, Elfia troviĝis lokita inter la generalo kaj Mutie, poste la notario kaj la aliaj gastoj. La tagmanĝo estis longa kaj gaja.

- Estas hodiaŭ malpermesite misdigesti, kriis la generalo, ni devas domaĝi sin por morgaŭ. Tio ja estos aliaĵo.

Iu gasto : Kio okazos morgaŭ ?

GNR : Kiu vivos, tiu vidos. Estos festeno de Baltazaro !

La gasto : Kiu tiu estas, Baltazaro ?

GNR : Baltazaro estis kanajlo, rimarkinda frandemulo, sed subtila spertulo de vinoj kaj de ĉiuj specoj de manĝeblaĵoj, kaj kiam oni volis bone manĝi, oni iris ĉe Baltazaroⁿ.

- Ha ! Jes ! Kiel en Parizo, kiam oni iras ĉe Verioⁿ,

diris unu el la gastoj kiu havis pretendon esti instruita kaj koni Parizoⁿ, ĉar li iam travivis tie tri tagojn kiel atestanto en krima afero.

- Tute ĝuste! Estas tio, diris la generalo ekridegante. Mi konstatas, S'joro, ke vi konas Parizoⁿ.

La instruita gasto : Iom, S'joro, mi pasigis tie kelkan tempon.

GNR : Ĉu vi vizitis spektaklon, S'joro ?

La instruita gasto : Jes, S'joro, multfoje. Mi tre ŝatis spektaklon.

GNR : Al kiu teatro vi iris ?

La instruita gasto : Ĉe la granda teatro de Pulĉinelo, kaj ĉe alia kies mi forgesas la nomon, ankoraŭ pli bela.

GNR : Ha! Ĉe la Elizeaj kampoj, ĉu ne ?

La instruita gasto : Jes, S'joro, granda malbone regita arbaro, kaj kiu apenaŭ aspektas kiel kampon. Arboj difektitaj, mallongigitaj. Perdita arbegejo.

La generalo pli kaj pli ridis, pli kaj pli trinkis. Ni ĉetable kunsidis ekde du horoj. Elfia proponis al la generalo promenon en sian novan posedaĵon.

GNR kun petola mieno : Kaj kiel vi transiros tien de via ĝardeno, mia infano ?

ELF : Ho ! Generalo, Mutie malfermos breĉon; la transiro baldaŭ estos farita.

GNR : Ĉu ni finis la kafon, la postkafan brandeton, nu ĉion ?

- Plimulte finita, mia generalo, respondis Mutie, lacigita trinkadi kaj manĝadi.

- Nu, ni foriru. Mi antaŭpaŝas kun Elfia.

La generalo stariĝis, ĉiu faris same. Li mem malfermis la pordon de la ĝardeno. Elfia eligis ĝojan ekkrion, forlasis la brakon de la generalo, kaj kuris, malpeze kiel birdo, al la eleganta barilo kiu estis muntita kaj malfermita al la herbejo

dum la mallonga foresto de la proprietuloj.

Jakobo kaj Paŭlo sekvis ŝin en ŝia kurado, kaj estis baldaŭ ne plu videblaj.

GNR : Mutie, mia amiko, kuru post la forkurantoj, kaptu ilin, revenigu ilin al mi ! Mi estos ne tre for... Nu ! Jen ĉiuj foririntaj !... Jen ili kiuj kuras ĉiuj kiel fuĝantaj ĉevaloj... eĉ la notario !... Kaj tiu kompatinda Derigni kiun sinjorino Blidot kuntiras ! Li kuras, vere li kuras !

La generalo, kontentega, frotis al si la manojn, iris kaj reiris saltetante malgraŭ siaj dikaj gamboj, sia dika ventro kaj siaj larĝaj ŝultroj. De tempo al tempo, oni vidis aperi en la herbejo, en la arbaro, Elfiaⁿ kaj la infanojn. Mutie rekuniĝis kun ŝi per du paŝegoj, kaj ĝuis la feliĉon de Elfia kun la tuta viveco de ŝia korinklino. Baldaŭ la arbaro kaj herbejo vidigis la plej viglan spektaklon. La junuloj kuris, kriis, ridis; la saĝuloj promenis, admiris kaj ĝuis la feliĉon de Elfia pro esti renkontinta dum sia vivo generalon Durakinoⁿ. Elfia kaj sia fratino estis ĝenerale tiom amataj, ke ilia feliĉa fortuneo ne kaŭzis ĵaluzon por neniu, kaj male okazigis ĝeneralan kontenton.

La preposto sole restis apud la generalo.

- Vi devas esti tre feliĉa, li diris al li ridetante amike, pro la tuta feliĉo kiun vi estigas. Vi vere estas Providenco por ĉi tiuj bonegaj fratinoj, por via brava Mutie kaj por nia tuta komunumo. Neniam en ĝi oni perdos vian memoron, generalo, kaj koncerne min, mi preĝos por vi ĉiutage de mia vivo.

GNR : Dankon, mia bona preposto. Sed nia tasko ne estas finita, necesas ke vi helpus min por kompletigi ĝin.

PRP : Ĉio kiun vi volos, generalo, tute disponu pri mi.

GNR : Nu, mia amiko, jen la afero. Mi tre amas sinjorinon Blidot^{on}, kaj mi pene konstatas ke la edziniĝo de ŝia fratino ŝanĝos ŝian situacion.

PRP : Ho ! Generalo, ili amas unu la alian tiel multe, kaj Mutie estas viro tiel bona, tiel honorinda, tiel pia !

GNR : Ĉio ĉi estas vera, mia amiko, sed... sinjorino Blidot venos plu nur duarange. Estas la juna paro kiu jam havas la plej dikan parton en la proprieto de la Gardanĝelo, viro en gastejo ĉiam estas pli mastro ol virinoj. Kaj poste venos la gefiloj, Jakobo kaj Paŭlo povus suferi de tio, sinjorino Blidot kiu amas ilin tiel tenere, protektos ilin. Kaj poste alvenos la malkonsento, kaj sekve ĉagrenoj por tiu kompatinda virino izolita.

PRP : Estas vere, generalo, sed kion fari, krom atendi, esperi, kaj se necese kuraĝigi ŝin ?

GNR : Mia kara preposto, jen mia ideo al mi. Kiam la milito finiĝos, tio kio okazos iun el tiuj ĉi tagoj, necesos ke mi reiru en Rusioⁿ. Mi kunprenos Derigni^{on}. Atendu, vi ne scias tion kion mi estas dironta al vi... Mi kunprenos liajn infanojn. Jen ili jam restas kun sia patro kaj ili estas ŝirmigitaj kontraŭ tio kion mi antaŭtimas por ili. Kiel pago de la sinofero kiun faros al mi la patro, mi aĉetas, kun via helpo, kaj donas al li la terenojn kiuj ĉirkaŭas mian gastejon "Al la dankema generalo". De nun ĝis tiam, mi decidigas lin rekunigi liajn infanojn kun panjo Blidot kiun li faros sian edzinon kaj veran patrinon de liaj filoj. Mi donas al la paro la gastejon kaj terenojn. Kaj, post foresto de unu jaro, mi venos morti en Francioⁿ, ĉe vi; ĉar inter ni, mi kredas esti baldaŭ mortonta. De nun ĝis tri jaroj, mi estos kuŝita en via tombejo, post morti inter viaj brakoj. Kaj jen kie mi bezonas vian helpon : estas konsentigi panjon Blidot^{on} fariĝi sinjorinon Derigni^{on}. Vi esence sciigos ŝin pri ĉio kion mi ĵus diris al vi.

PRP : Mi timas ke ŝi ne deziras reedziniĝi, ne ĉar ŝi multe bedaŭris sian edzon, kiun ŝi edzigis preskaŭ devigita de siaj gepatroj, kaj kiu estis maljuna, malafabla kaj

malagrabla, sed ĉar tiu malfeliĉa edziniĝo forigis al ŝi la deziron kontrakti alian.

GNR : Kaj Jakobo kaj Paŭlo kiujn ŝi tiom amas kaj kiuj estas tiel ĉarmaj ! Estus la rimedo por ne plu perdi ilin.

PRP : Aŭskultu, generalo, mi provos. Mi kiom nur eble baraktos ĉar mi havas bonan opinion pri Derigni.

GNR : Kompreneble ! Perfekta knabo, milda kiel ŝafido, koro el oro. Vidu lin kun siaj buboj. Brava soldato, bela knabo, kion vi plie bezonas ?

PRP : Tio kio estas, generalo, kaj tio kiun vi ne parolas : pri religio kaj pri moraleco.

GNR : Ĉar li havas tion, vi ne havas ion pli por peti al li.

PRP : Tial mi trovis min tre kontentan, generalo, kaj mi deziras ke sinjorino Blidot pensas kiel ni.

GNR : Tiu ĉi koncernas vin, mia bona preposto, parolu kun ŝi kiam Derigni kaj mi, ni ne plu estos ĉi tie. La afero rapide finiĝos pelante ŝin vigle.

La konversacio estis interrompita de Elfia, Mutie kaj la infanoj, kiuj revenis apud la generalon. Elfia havis larmojn en la okuloj.

ELF : Mia bona generalo, kiom da ŝuldosento ! Ne eblas esti pli bone, pli oferema, pli patra ol vi estis por mi kaj por Jozefo. Kiom da aferoj vi donas al ni ! Kaj kun kia graciaeco, kia kompleza bonkoreco !

Elfia kaptis unu el liaj manoj kaj plurfoje kisis ĝin.

GNR : Mia infano, lasu min. Mi baldaŭ ploros se vi daŭrigas. Vi nervozigas min ! Lasu min, mi diras al vi. Mutie !

Mutie kaptis lian alian manon, kaj premante ĝin ĝis dispremi ĝin, metis siajn lipojn.

MUT : Mia generalo, mi neniam kisis la manon de iu ajn viro, la via estas por mi tiu de bonfaranto, de patro.

GNR : Nu, vi diras kiel Netaviŝtuko.

Mutie ridetis, la larmoj de Elfia estis anstataŭitaj de ĝoja ridado kaj kormoliĝo de la generalo forbloviĝis kvazaŭ per magio.

GNR : Uf ! Estas finite ! Mi estas kontenta. Iom imagu la belan vizaĝon kiun mi farus plorante kun Elfia kaj Mutie. Dia tondro ! Mi ŝvitas pro pensi tion. Generalo en kompleta uniformo ploranta kiel infano kiu ricevis la vipadon ! Nun, miaj bonaj amikoj, vi vidis ĉion, vi estas tre kontentaj kiel mi, sed tre lacaj kiel mi, kaj vi bezonas esti solaj kiel mi. Lasu min reirigi ĉi tiujn homojn, promenu tute kviete sur viaj terenoj babilante, kaj lasu min priatenti la revenon de la ordo en via hejmo... Neniu rebato ! Mi volas tion kion mi volas. Sendu al mi Derigni^{on} kaj la infanojn, diru ke mi deziras ke ni iru kaj petu al la notario veni paroli al mi.

Elfia kisis la manon de la generalo en signo de submetiĝo kaj iris kun Mutie plenumi liajn ordonojn. Baldaŭ la homoj sekvis unu la alian antaŭ li kaj ĉe ĉiu, li diris : "ĝis morgaŭ, en la urbodomo".

Li rememorigis al la notario ke li dormas en la gastejo de la Dankema Generalo. "Via ĉambro estas preta, mia kara, tiel kiel kelkaj aliaj por la foraj gastoj".

La notario kapsalutis, premis la manon kiun etendis al li la generalo, kaj eliris por fumi promenante kun kelkaj amikoj antaŭ ekokupi la ĉambrojn kiuj estis pretigitaj por ili.

27 La geedziĝfesto.

La generalo iris kontroli la kuiradojn de la festo por la morgaŭo kaj ĉiujn pretigadojn por la festo kiu nepre finiĝis per balo kaj piroteknikaĵoj. Ĉe la noktiĝo, li iris enlitiĝi, la tago estis laciga, li ronkis dum dek horoj seninterrompe sen moviĝi.

Ni kuniĝis je la sepa por matenmanĝi : la feliĉo estis sur ĉiuj vizaĝoj.

ELF : Ankoraŭ iu danko aldirektita al vi, mia bona generalo, ni trovis en niaj ĉambroj niajn tualetojn por ĉi tiu mateno.

GNR : Ĉu vi opinias la viajn laŭ via gusto, sinjorinoj ?

ELF : Ĉarmaj, belegaj, kaj centoble super tio kion ni donus al ni, se ni devus aĉeti ilin, mia bona generalo.

GNR : Mi ŝatus vidi tiun ĉiun sur vi, mia Elfnjo, kaj mi ankaŭ volas vidi vian fratinton en pompa tualeta.

La du fratinoj apartiĝis kun la infanoj kiuj ne regis sin pro la ĝojo surmeti la belajn vestojn, la lakitajn altajn ŝuojn, la ĉemizojn kun manikoj kun butonoj pretigitaj por ili.

La generalo kaj Mutie restis solaj. La rigardoj de Mutie esprimis profundan dankemon kaj puran feliĉon. Li renovigis siajn dankojn per vortoj kiuj kortuŝis la generalon.

- Estu certa, mia amiko, li respondis al li, ke via feliĉo tre feliĉigas min mem, mi ne plu sentas min sola aŭ forlasita. Mi scias ke vi ĉiuj amas min malgraŭ miaj azenaĵoj kaj miaj strangaĵoj. La memoro kiun mi kunprenos de ĉi tie, ĉiam estos al mi milda kaj kara. Sed necesas ke ankaŭ ni, ni pensu pri nia tualeta. Necesas ke ni feste vestu nin, vi la edziĝanto, kaj mi anstataŭanta la patron de la edziniĝanto... kaj ankaŭ la via, mia kompatinda infano.

Mutie denove dankis lin intense, kaj ili disiĝis. Derigni atendis la generalon por helpi dum lia tualeta kiu estis longa kaj kiu vidigis la tutan amplekson de sia persono. Parada uniformo de general-leŭtenanto, uniformo brodita de oro, blanka pantalono, lakitaj botoj, la granda kordono de Sankta-Anna kaj de Sankta-Aleksandro, ordenoj el diamantoj, la spado kun tenilo el diamantoj, kaj amaso da dekoracioj de eksterlandoj de Rusio.

Elfia ne malfruis aperi, beleta kaj ĉarma, kun sia robo el blanka tafto, sia vualo el punto, sia krono el blankaj rozoj kaj folioj de oranĝarbo. Orelringoj, broĉo kaj harpingloj el oro kaj perloj kompletigis la belecon de ŝia tualeta kaj de ŝia persono. Sinjorino Blidot havis elegantan tualeton konvenan por sia dudek naŭ jaroj kaj por sia vidvina stato. Mutie havis sian tute novan riĉan kostumon de Zuavo kiu valorigis la belecon de lia talio kaj de lia vizaĝo. La infanoj estis agrablaj kaj belegaj. Derigni estis taŭge vestita, sen eleganteco kaj tutnigre. Nur li havis malĝojan nuancon sternita sur sia vizaĝo. Tiu ĉi geedziĝo memorigis al li pri lia propra, malpli brila, kun perspektive la sama feliĉo, kaj tiu feliĉo finiĝis per longa suferado. Li ankaŭ timis por siaj infanoj la ŝanĝojn kiujn certe okazigus tiu geedziĝo. Kaj plie, ĉu sia reveno al li ne devigus lin disigi siajn infanojn de Sinjorino Blidot kiun ili tiom amis? La propono de la generalo senĉese revenadis al li. Li ne sciis kiun decidon preni: rifuzi ĝin, estis reŝovi siajn infanojn en mizero; akcepti ĝin, estis sekurigi ilian estontecon, sed per kiu kosto! Kia vojaĝo! Kia necerta situacio! kia klimato por alfronti! Kaj kia ĉagreno suferigi ilin senigante ilin de la zorgoj kaj de la tenero de sinjorino Blidot! Estis ĉi tiuj pripensoj, vekitaj de la geedziĝo de Elfia kiuj afliktis lian fizionomion. La generalo rigardis ĝin dum momento, divenis liajn zorgojn: "Kuraĝon, mia amiko, li diris al li. Ĉu mi ja

estas for. Mi aranĝos vian vivon kiel mi aranĝis tiun de Mutie. Vi havos viajn infanojn kaj ankoraŭ feliĉon antaŭ vi".

Derigni malgaje ridetis dankante la generalon kaj strebis forskui la dolorajn pensojn kiuj obsedis lin.

La atestantoj, la geknaboj de geedziĝo ne malfruis alveni. Ili ĉiuj rigardis kun admiro la brilan generalon, la belegan zuavon kaj la tualeton de la edziniĝanto. Estis belega vetero, bela suno de la monato de aŭgusto, sed sen tro de ardo, kaj neniu vento.

Ni ekiris al la urbodomo. Kiel la antaŭtagon, la generalo donis la brakon al Elfia kaj Mutie al sinjorino Blidot. Derigni kaj la infanoj sekvis. Ĉe la urbodomo, la laika geedziĝo rapide finiĝis, kaj oni direktis sin al la preĝejo. Tie atendis ilin nova surprizo. La tuta preĝejo estis drapirita de bluo, blanko kaj oro. Riĉa garnituro de altaro, kandeligoj, vazoj kaj floroj, ĉirkaŭis la tabernaklon el orita bronzo arte ellaborita. La preposto surmetis belegan kazublon el ŝtofo dirita oran pluvon. La kantoj havis ruĝajn kaj orajn ĥormantelojn. Preĝoseĝoj, novaj kaj brilaj, estis pretigitaj por la helpantoj; la preĝoseĝoj de la geedziĝantoj estis kovritaj de tegaĵoj el ruĝa veluro. La generalo kaj sinjorino Blidot metis sin unu dekstren, alia maldekstren de la geedziĝantoj. Ĉiu lokiĝis, kaj la ceremonio komencis.

Jakobo kaj Paŭlo tenis la kovrotukon^[4] super la kapo de la juna paro. Ili estis, post Mutie kaj Elfia, la plej feliĉaj de la tuta kunveno, ĉar neniu zorgo, neniu maltrankvilo, neniu dolora memoro sin miksis kun ilia ĝojo. Sinjorino Blidot kontemplis ilin kun amo kaj orgojlo. Sed subite ŝia vizaĝo malgajiĝis, ĵetante simpatian ekrigardon al Derigni. La malĝojo de lia rigardo malkaŝis al ŝi la maltrankvilojn kiuj turmentis lin, kaj ankaŭ al ŝi, la apartigo de la infanoj ŝajnis terura kaj proksima. Ŝi provis forpeli ĉi tiun kruelan penson

⁴ Ĉe tiu ĉi ligilo, la teksto estas france, sed troviĝas pluraj bildoj de kovrotuko.

kaj antaŭdecidis malkonfuzi la problemon kun Derigni ekde la plej sekvonta okazo.

La ceremonio estis finiĝinta. Elfia estis la edzino de Mutie kiu ricevis ŝin en la sakristio el la manoj de la generalo. Ili ambaŭ aspektis radiantaj. Mutie kunprenis sian edzinon, kaj laŭ la rekomendo de la generalo, kondukis ŝin en la domon de la Dankema Generalo, kien devis kuniĝi la gastojn. La tuta festantaro sekvis la geedziĝintojn, la generalo ankoraŭ antaŭe, sed ĉifoje kondukante sinjorinon Blidot^{on} anstataŭ Elfiaⁿ.

GNR : Kiam estos via geedziĝofesto, mia edzineto ?

BLD : La mia ? Ho ! Generalo, neniam ! Vi povas kredi min. Mi sufiĉe ricevis de la unua.

GNR : Kiel vi diras tion, mia povra edzineto ! Vi havas funebran mienon.

BLD : Ho ! Generalo ! Estas ke mi estas senesperigita !

GNR : Iu tago kiel tiu ĉi ? Nekredebla !

BLD : Generalo, vi scias ke Jakobo kaj Paŭlo estas mia plej kara, mia plej arda korinklino. Jen ilia patro reveninta, ĉu li forlasos ilin al mi ? Ĉu li iam konsentos disiĝi de ili ?

GNR : Sincere, mi ne kredas tion, mia bona amiko. Sed diable, ni ne jam estas tie ! Kaj plie, ĉu mi estas for, mi. Do fidu al la maljuna generalo. Vidu la geedziĝofeston, la kontrakton, la tagmanĝon kaj ĉion, vi estis zorgoplena, malkvieta ! Nu ! Kion vi diras pri tio ? Ĉu mi bone estris la aferon ? Ĉu io mankis al ni ? Same por la infanoj, mi diras al vi. Estu trankvila, dependos de vi ĉiam gardi ilin, kun la decidpovo de patrino.

BLD : Ho ! Se tio dependus nur de mi, tio estus farita !

GNR : Bone ! Memoru tion kion vi ĵus diris. Mi ĉiatempe kaj ĉialoke memorigos tion al vi, kaj vi havos viajn infanojn. Jen ni estas alvenintaj, ne plu da malĝojo, ni pensu nur amuziĝi, sen forgesi trinki kaj manĝi.

La generalo forlasis sinjorinon Blidot^{on} por ĵetis ekrigardon al tagmanĝo. Ĉio estis preta, li estis kontenta pri la ĝenerala aspekto kaj revenis apud Elfia por informi ŝin ke oni tuj servos. La funda pordo malfermiĝis, kaj ĉefservisto, en pompa pariza uniformo, anoncis : "La generalo estas servita".

Grandega ĉambro prezentis sin ĉe la vido de la gastoj mirigataj kaj de Elfia ravata. La korto estis ŝanĝita al manĝoĉambro. Ruĝaj tapetoj ornamis ĉiujn murojn, ĉiu vitrotegmento lumigis ĝin de supre, la tablo kun kvindek du manĝilaroj estis belege provizita kaj ornamita per kristalaĵoj, per bronzaĵoj, per kandelabroj, ktp.

La generalo donis la brakon al Elfia kiun li sidigis siadekstre, siamaldekstre, la preposton, apud Elfia, ŝian edzon, apud la preposto, la notarion. Vidalvide al la generalo, sinjorinon Blidot^{on}, ŝiadekstre, Derigni^{on} kaj liajn infanojn, ŝiamaldekstre, la urbestron kaj la adjunkton. Poste la aliaj gastoj metis sin laŭ sia oportuno.

- Krustaca supo kun kankroj ! Testuda supo ! anoncis la ĉefservisto.

Ĉiuj volis gustumi ambaŭ por scii kiu estis la plej bona. La demando restis sendecida. La generalo gustumis, aprobis, kaj ripetis dufoje. Oni frande ĝui, la potlekistoj rigardis kun avidaj okuloj tion kio restis pri la nekonataj kaj admirindaj supoj.

- Rombo saŭco salikoko ! Salmo imperia saŭco ! Fileoj de kapreolaĵo madejrovina saŭco !

La silento regis inter la gastoj, ĉiu manĝis, frandis. Kelkaj maljunuloj ploris pro kormoliĝo fare de la bongusto de la tagmanĝo kaj de la malŝparemo de la generalo. La civitano kiu tiel bone konis Parizoⁿ kaj ĉiajn teatrojn laŭte laŭdis : "Bone ! Bonege ! Bone kuirita, bona saŭco ! Kiel ĉe Verio".

- Flugiloj de perdrikidaĵoj kun trufoj !

Ĝenerala movado, neniu el la gastoj gustumis aŭ flaris en sia vivo trufon. Tial la ĉefservisto rigardis sin tre feliĉa pro povi disdoni tion al la tuta tablo. La plado malpleniĝis ĉiun minuton, sed ĉiam estis anstataŭo, dank'al la antaŭzorgo de la generalo kiu diris : "Ni estos kvindek du, kalkulu je cent kvar manĝeguloj, kaj vi ne havos restaĵojn".

- Kortobirdaĵoj kun kremsaŭco ! reparolis la ĉefservisto kiam la perdrikidaĵoj kaj la trufoj malaperis sen lasi spurojn de ilia pasado.

Jakobo kaj Paŭlo manĝis ĝis tiam sen diri vorton. Ĉe la vido de la kortobirdaĵoj, ili fine distingis tion kion ili manĝis.

- Ha ! Finfine jen viando, ekkriis Paŭlo.

- Viando ? vortigis la generalo indignigita, kie vi vidas viandon, mia knabo ?

JAK : Jen, generalo, en ĉi tiu plado. Estas la kokidaĵoj de onklino Elfia.

GNR indignigita : Mia bona sinjorino Blidot, mi petegas, klarigu al tiuj infanoj ke estas kaponinaĵoj de Manso, la plej fajnaj kaj la plej delikataj kiu eblas manĝi !

ELF ridanta : Ĉu vi opinias, generalo, ke miaj kokidaĵoj ne estas fajnaj kaj delikataj ?

- Viaj kokidaĵoj ! Viaj kokidaĵoj rebatis la generalo katenante sian indignon. Mia infano, sed ĉi tiuj bestoj kiujn vi manĝas estas kaponinoj plenŝtopitaj de graso, la karno pro tio estas frandinda...

- Kaj miaj kokidaĵoj ?

GNR : Ne kredeble ! Viaj kokidoj estas sekaj bestoj, nigraj, mizeraj, kiuj tute ne similas al ĉi tiuj grasaj kaj admirindaj kortobirdoj.

ELF : Pardonu, mia bona generalo; tio kion mi diras pri tio, estas por senkulpigi la etuloj, tie, kiuj nenion komprenas pri la grandioza tagmanĝo kiun vi faris nin manĝi.

GNR : Bone, mia infano ! Ni ne perdu nian tempon por

paroli, ni ne perturbu nian digeston por diskuti, ni manĝu kaj trinku.

La generalo ektrinkis sian dekan glason da vino. Oni jam servis madejra-, bordoza- (Lafito), burgonja-, rejnlanda-vinojn el tre alta kvalito. Ni komencis vigliĝi, ne plu manĝi per sama ardeco.

- Rostitaj fazanaĵoj! Tetraĵoj! Bonaziaĵo!

Ia tremeto de surprizo kaj de kontenteco trairis la ĉambron. La generalo rigardis kun mieno de triumfanto tiujn ĉiujn vizaĵojn kiuj esprimis la admiron kaj la dankemon.

Kompleta sukceso, restis nur kelkajn ostojn kiujn la malbonaj dentoj ne sukcesis krakmaĉi.

- Ŝinkoj de aprido! Omaroj salatpreparite!

Ĉiu gustumis, ĉiu manĝis, kaj ĉiu petis tion denove.

La vico de la legomoj finfine alvenis. Ni sidis ĉetable de du horoj. La infanoj de la geedziĝofesto, kun unuatempe Jakobo kaj Paŭlo, ricevis permeson eltabliĝi kaj iri ludi eksteren; oni devis venigi ilin dum la dolĉaĵoj.

Post la asparagoj, la freŝaj pizoj, la verdaj fazeoloj, la farĉitaj artiŝokoj, venis la kremojn kirlitajn, ne kirlitajn, glaciigitajn, unuigitajn, dolĉacidajn. Poste la kukaĵoj, babaoj, **Blanka Monto**, **Sankta Honorato**, fromaĝkukoj, **krokembuŝoj** plenumis la triumfon de la moderna Vatel kaj tiun de la generalo. La infanoj estis revenintaj akiri sian porton de frandaĵoj, kaj ili forlasis la lokon nur kiam ni estis trinkintaj je la sanoj de la generalo, de la genovedzoj, de sinjorino Blidot, per ĝuinda ĉampano, tro ĝuinda, ĉar la plejmulto el la gastoj forlasis la tablon ŝanceliĝante kaj estis devigitaj pasigi la efikon de la ĉampano en brakseĝoj, kie ili dormis ĝis la vespero.

Ĉe la fino de la tagmanĝo, post la glacioj el diversaj specoj, la ananasoj, la fruktoj el ĉiuj sezonoj, la bombonoj kaj aliaj dolĉaĵoj, Elfia proponis trinki je la sano de la artisto

farinto de la mirinda tagmanĝo kiun ni ĵus delektiĝis.

La generalo ricevis tiun proponon kun senegala dankemo. Li vidis ke Elfia sciis taksu bonan kuiradon, kaj en sia ĝojo, li proklamis ŝin la perlon inter virinoj. Ni trinkis je tiu sano antaŭ la heroo artisto kiun la generalo venigis por komplimenti lin kiu brustoŝvelis, kiu dankis kaj kiu ekŝiĝis rekompencita de siaj laciĝoj kaj siaj zorgoj.

La tago fluis. La generalo demandis ĉu ni ne ŝatus finiĝi per balo. Ni aŭde akceptis, sed kie trovi violonon? Neniu pensis pri tio.

- Tio ne turmentu vin, ĉu mi estas for, mi? Ni iru danci sur la herbejon de Elfia, ni certe trovos muziketon. Ne necesas pli por danci. La unua violonaĉo taŭgos al ni.

La geedziĝofesto direktiĝis al la Gardanĝelo kiun ni trovis ornamita kiel la antaŭtagon. Ni transiris la ĝardenon. Sur la herbejo, estis starigitaj du tendegoj: unu por danci, la alia por manĝi. Bufedo triflanke ĉirkaŭis tiun lastan kaj estis, ĝis la morgaŭo, kovrita de malvarmaj viandoj, de fiĝoj, de kukaĵoj, de kremoj, ĵeleoj. La tendo de balo estis malfermita ĉe unu flanko kaj ornamita ĉe la tri aliaj de kandelabroj, floroj kaj kusenbenkoj el ruĝa veluro kun oraj franĝoj. Funde, sur podio, estis orkestro konsistanta el ses muzikistoj kiuj komencis kvadrilon tuj kiam la generalo faris sian eniron kun la novedzino.

La infanoj, la junuloj, la maljunuloj, ĉiuj dancis. La generalo komencis la balon kun Elfia, valsis kun sinjorino Blidot, dancis, valsis dum la tuta nokto, preskaŭ la tutan nokton, kiel vera vicleŭtenanto. Li abunde ŝvitis, sed la ĝenerala gajo trafis lin, kaj li efektivigis la aŭdacaĵojn de junulo. Elfia kaj Mutie dancis ĝis elĉerpigi. Ĉiuj faris same, interrompante la dancojn per vizitoj al la bufedoj. Necesis fari multe por kontentigi la apetiton de la dancistoj.

Je la deka, estis kvaronhora paŭzo por vidi ekbruligi

piroteknikaĵon kiu duobligis la admiron de la gastoj. Neniam en Lumigni oni eksplodigis nur petardojn. Tial la memoro de la geedziĝofesto de Mutie al Gardanĝelo estas tiom viva kiom la morgaŭo de ĉi tiu festo tiel kompleta kaj tiel pompa. Sed ĉio havas finon, kaj la laceco sonoris la retiriĝon je malfrua horo de la nokto. Ĉiu povis finfine enlitiĝis, feliĉa, gaja, elĉerpita.

Jakobo kaj Paŭlo dormis ĝis la morgaŭa vespero, vespermanĝis kaj denove reenlitiĝis ĝis la morgaŭo. Okazis pluraj misdigestoj sekve de tiu festeno de Baltazaro. La ĉiamulo de Parizo preskaŭ mortis pro tio. La notario nekapablis dum tri tagoj redakti ajnan akton.

La generalo, kiu enlokiĝis hejme en la eksa gastejo de Burniero kun Derigni, estis iom malsaneta kaj trafita de muskoldoloroj. Li gardis por sia servado unu el la kuiristoj alvenintaj de Parizo, rekomendante al li sendigi al si proviantojn el ĉiu speco.

28 Geedziĝo sen geedziĝofesto.

La morgaŭon de la geedziĝofesto, la generalo, vidante Derigni^{on} pli malĝoja ol li jam estis ekde la tago kiam li retrovis siajn infanojn, interese demandis al li tion kion tiel malĝojigis lin, kaj instigis lin sincere paroli.

GNR : Malkaŝe parolu, mia amiko, ne timu ke mi ekkolerus. Mi vidas vin malĝoja kaj malkvieta, kaj mi tiom interesigas pri vi ke mi ne povas koleriĝi pro tio kion vi povus diri al mi.

SLD : Mia generalo, mi pardonpetas, sed ekde la propono kiun vi faris al mi por gardi min ĉe via servo, por eĉ kunpreni min en Rusioⁿ kun miaj infanoj, mi ne scias al kio decidiĝi. Mi vidas ke estas por ili grandegan intereson akompani vin kun mi. Sed mia generalo (pardonu min tiel malkaŝe paroli al vi), kiom da malĝojoj kaj da malagrablajtoj por ili, kaj konsekvence por mi, devas rezulti el tiu situacio ! Miaj kompatindaj infanoj amas tiel tenere sinjorinon Blidot^{on} ke disigi ilin de ŝi dum jaroj, kaj eble por ĉiam, estus trudi al ili aflikton el la plej kruelaj. Kaj kiel mi, okupiĝinta de mia servo apud vi, mia generalo, sukcesus priatenti miajn infanojn, daŭrigi ilian edukadon tiel bone komencita ? Kaj plie, mia generalo, se tiuj infanoj lacigus vin, tedus vin, ĉu sur vojo, ĉu en Rusio, kio ni fariĝus ?

Derigni haltis malgaja kaj pensema. La generalo atente aŭskultis lin kaj sen kolero.

- Kaj se vi forlasus min, mia amiko, kio vi fariĝus, kion vi farus pri viaj infanoj ?

Derigni prenis sian kapon en siaj manoj kun dolora gesto kaj diris per konsternita voĉo : "Jen, mia generalo; tio estas, tio ja estas. Sed kion mi povas, kion mi devas fari ?

Pardonu, se mi tiel sincere parolas al vi, mia generalo; vi kuraĝigis min, kaj mi dediĉas min al via boneco".

GNR : Derigni, mi jam pensis pri tio ĉio, mi eĉ parolis pri tio al preposto. Viaj infanoj povas nek forlasi sinjorinon Blidot^{on}, nek resti kie ili estas. La edzineco de Elfia donas mastron en la domo kaj nuligas la aŭtoritaton de sinjorino Blidot, ŝi kaj la infanoj ne malfruus esti malkomfortaj. Estas nur unu rimedo, ununura, por vi gardi viajn infanojn kaj lasi al ili tiun bonegan patrinon kiu tiel bone anstataŭas tiun kiun ili perdis. Edzinigu ŝin.

Derigni faris eksalton kiu eksaltigi la generalon.

SLD : Mi ? Mia generalo ! Mi, sen havaĵo, sen familio, sen estonteco, edzinigi sinjorinon Blidot^{on} kiu estas riĉa, kiu ne pensas needziniĝi ? Ne eblas, mia generalo ! Neeble !... Jes, bedaŭrinde neeble.

La generalo ridetis pro la "bedaŭrinde". Derigni ne estis do malema al tio; li akceptus tiun geedzecon por siaj infanoj kaj eble por sia propra feliĉo.

GNR : Mia amiko, ne estas neeble. Vi sincere parolas al mi, mi tuj faros same. Mi estas maljuna, mi estas kripla, mi malŝatas ŝanĝon. Mi amas vin kaj mi estimas vin, via servo multe plaĉas al mi kaj estas necesa al mi. Se vi edzinigus sinjorinon Blidot^{on} kaj ke vi konsentus resti ĉe mi kun ŝi kaj viaj infanoj, kaj akompani min en Rusio, ankoraŭ kun ŝi kaj la infanoj, mi certigus vian estontecon aĉetante kaj donante al vi la terenojn kiuj ĉirkaŭas mian gastejon. Vi scias, ke laŭ la terminoj de la kontrakto de Elfia, mi donos la gastejon al sinjorino Blidot se ŝi edzigas vin, ĉar estas al vi kiun mi pensis enskribigante ĉi tiun klaŭzon. koncerne mia restado en Rusio, ĝi ne estos longa, mi aranĝos miajn aferojn, mi forlasos la aktivan servon pro miaj multaj vundoj, kaj mi revenos loĝi en Francio. Pripensu, mia amiko, decidu. Ĉu vi volas ke mi parolos kun sinjorino Blidot ?

SLD : Mia general, kiom da bonkoreco ! Miaj karaj infanoj ! Ili ŝuldos ĉion al vi, tiel kiel ilia patro. Ho ! jes, mia generalo, parolu al ŝi, petu al ŝi, je la nomo de miaj infanoj, ke ŝi fariĝu sia reala patrino, ke mi povu doni ilin al ŝi konservante ilin.

GNR : Eĉ hodiaŭ, mia kara Derigni. Mi ĝojas trovi vin tiel racia. Iru venigi al mi sinjorinon Blidot^{on}, ke mi tuj parolu al ŝi. Sed ne, ne eblas, vi ne povas iri tien por tio. Sendu al mi la preposton. Mi miavice delegos lin al ŝi, li alkondukos ŝin al mi, kaj ni ambaŭ, ni faros vian aferon. Iru, mia amiko, rapide, rapide, kaj poste iru vidi viajn infanojn.

Derigni volontege akceptis. Li ne jam vidis siajn infanojn, li ne sciis ke ili ankoraŭ dormis. Li saltete iris ĉe la preposto plenumi la komision de la generalo kaj kuris al la Gardanĝelo. Li tie trovis sinjorinon Blidot^{on} sola. Li sentis dummomente embarason.

- Mi sola estas vekinta, ŝi diris ridetante. Ili ĉiuj estas elĉerpitaj, kaj ili ankoraŭ dormas.

SLD : Mi venis viziti miajn infanojn, mia bona sinjorino Blidot.

BLD : Sinjoro Derigni, mi tre ĝojas ke ni estas solaj, mi volas paroli kun vi pri la infanoj. Mia kara sinjoro Derigni, vi scias kiom mi amas ilin, perdi ilin estus mia morto. Ĉu vi bonvolas lasi ilin al mi ?

Derigni hezitis antaŭ ol respondi. Sinjorino Blidot restis tremanta antaŭ li. Ŝi angore rigardis lin, ŝi atendis sian respondon.

- Neniam mi kuraĝos denove perdi ilin je la dua fojo, diris mallaŭte Derigni.

- Dio mia, Dio mia ! ekkriis sinjorino Blidot kaŝante sian vizaĝon en siaj manoj, mi antaŭvidis tion !

Ŝi plorsingultis, Derigni sidiĝis apud ŝi.

SLD : Kara sinjorino Blidot, se vi scius kiom via

tenereco por miaj infanoj kortuŝas min !

BLD : Ĝi kortuŝas vin, kaj vi volas nenion fari por kontentigi ĝin !

SLD : Pardonu min, mi estas preta multe fari por lasi ilin al vi, sed mi ne kapablas, mi ne mem kuraĝas diri tio al vi. La generalo parolos al vi pri tio, kaj se vi akceptos la proponon kiun li faros al vi je mia nomo, miaj infanoj estos la viajn.

GST surprise : La generalo ! La infanoj ! Ha ! Mi komprenas. (etendante la manon al Derigni) Mia kara sinjoro Derigni, mi ne volas fari nek la prudulinon, nek la stultulinon. Vi proponas al mi fariĝi via edzino por gardi viajn infanojn ? Jen mia mano, mi akceptas kun plezuro kaj feliĉo. Dankon pro lasi al mi tiujn karajn etulojn por zorgi, por eduki, por neniam forlasi ilin, por fariĝi ilia patrino, ilia vera patrino ! Rapide ni kuru ĉe la generalo; ke mi iru danki lin, ĉar estas li kiu havis la ideon, mi estas certa pri tio.

Derigni restis sen vorto, feliĉa sed surprizita. Li ne sukcesis reteni sin ridi pro tiu facila elnodiĝo.

SLD : Sed vi ankoraŭ nenion scias. Vi ne scias ke la generalo donas al mi...

BLD : He ! Li donu tion kion li deziras ! Tute ne gravas al mi ? Vi donas al mi la infanojn. Tie estas mia feliĉo, mia vivo ! Mi ne volas aliaĵon.

Kaj sen atendi Derigni^{on}, ŝi eliris kurante, iris ĉiam kurante al la generalo, senhezite eniris, trovis lin diskutantan kun la preposto, ĵetis sin al li, kisis siajn manojn plorsingultante kaj ripetante : "Dankon, bona generalo, dankon".

La generalo, mireganta, nenion komprenanta, nenion divenanta, kredis ke okazis malfeliĉo al la Gardanĝelo, kaj stariĝante tute konsternita, li relevis sinjorinon Blidot^{on} kaj maltrankvile demandis al ŝi tion kio estis.

Derigni samtempe eniris; li estis rakontonta al la generalo tion kio okazis, kiam sinjorino Blidot, vidante lin eniri, pafiĝis al li, ekkaptis liajn manojn, alkondukis lin antaŭ la generalo, kaj diris per tremanta voĉo : "Li donas al mi la infanojn. Jakobo kaj Paŭlo estos por mi, por mi, generalo ! Mi estos ilia patrino ĉar mi estos lia edzino".

La generalo eksplodis en ridego : "Ha ! ha ! ha ! kaj ni kiuj faris diplomation, sinjoro preposto kaj mi, por sukcesi konsentigi vin. La bona farso ! La bona rakonto ! Mi adresas al vi mian komplimenton, mia bona Derigni. Vi vidas, mia amiko, ke la terenoj bone efikis.

SLD ridanta : Ili kaŭzis nenion, generalo; ŝi eĉ ne sciis ke vi donos ion al mi.

GNR : Kiel ! Vi ne diris tion al ŝi ?

SLD : Mi ne havis tempon, mia generalo. Kiam tiu bonega virino komprenis ke edzigante min ŝi ne disiĝis de miaj infanoj, ŝi dankis min kiel pro bonfaro, kaj ŝi kuris al vi por esprimi al vi ŝian dankemon por esti aranĝinta ŝian feliĉon, ŝi diris.

GNR kortuŝita : Kompatinda virino ! Kompatinda edzineto ! Estas ja pro amo por la infanoj ! Kun tia koro, Derigni vi estos feliĉa, kaj ankaŭ la infanoj.

SLD : Dio aŭskultu vin, mia generalo !

Sinjorino Blidot babilis dum tiu tempo kun la preposto.
- Mi ne plu havas maltrankvilon, ŝarĝon sur la koro, ŝi diris. Sinjoro Preposto, diru morgaŭ meson por mi, por dankopreĝo. Nu, adiaŭ, ĝis baldaŭ, sinjoro Preposto; ĝis nelonge, mia bona generalo, ni venos vidi kiel vi fartas pri viaj laciĝoj de hieraŭ. Sen adiaŭo, mia kara Derigni; mi tuj kuros vidi la infanojn kaj sciigi la bonan novaĵon al Elfia.

Sinjorino Blidot malaperis tiel rapide kiel ŝi eniris, lasante Derigni^{on} kontentan sed mirigitan, la generalon ridantan kaj frotantan al si la manojn, la preposton

partoprenantan en la gajeco kaj kontentiĝo de la generalo.

GNR : Nu, mia amiko, vi kiu ne pensis pri tio, vi kiu saltis kiel leono, kiam mi parolis al vi pri tio, vi kiu trovis tiun geedziĝon nebla antaŭ apenaŭ unu horo, jen vi preskaŭ edziĝinta.

SLD : Jes, mia generalo, mi havas por vi ardan dankemon pro via bonvolo aranĝi la aferon. Tiu kompatinda virino estas vere kortuŝanta per ŝia tenereco por miaj infanoj. Mi certas ke mi amos ŝin, ne kiel mian kompatindan Magdalenaⁿ, sed kiel la anĝela patrono de la infanoj de Magdalena. Karaj infanoj ! Ili estos feliĉaj ! Kiam mi pensas pri ilia ĝojo, mi volus kiel sinjorino Blidot, povi geedziĝi morgaŭ. Kaj mi estas sekvonta vian konsilon, mia generalo, peti al la urbestro afiŝi nin, al la notario redakti la kontrakton, kaj al sinjoro preposto rezervi al ni lian meson por la lundo de la semajno kiu sekvos tiun en kiu ni eniras.

GNR : Estas agi laŭ saĝulo, mia amiko. Vi ambaŭ estas pelitaj de viaj infanoj, decidiĝu kiel eble plej baldaŭ. Ek, mia kara, rapide iru pro timo ke urbestro kaj notario eskapu de vi. Mi liberigas vin de deĵoro ĝis la vespero. Sinjoro preposto akceptas kunrestadi kun mi, kaj Mutie venos se mi bezonas ion. Mi verdire estas tiel malpacienca kiel vi, vidi la geedziĝon plenumita kaj vian edzinon instaliĝinta ĉe mi kun vi kaj viaj infanoj.

Derigni malaperis kaj uzis sian tempon. Li skribis al sia lando por ricevi la necesajn paperojn, aranĝis ĉion kun la notario kaj la urbestro, poste kuris al la Gardanĝelo kien li alvenis ĉirkaŭ la vespero, ĝuste kiam la infanoj ĵus vekiĝis kaj petis por manĝi.

Sinjorino Blidot alkuris : "Miaj infanoj, miaj karaj infanoj, via paĉjo akceptas ke mi ĉiam vivas kun vi kaj kun li. Li edzinigos min, mi estos lia edzino, kaj vi estos miaj infanoj.

JAK : Ho ! Mi estas kontenta, panjo. Mi timis ke paĉjo forprenus nin for de vi, aŭ ke li lasus nin ĉi tie forirante sen ni. Dankon, mia kara paĉjo, vi estas tre bona.

SLD : Estas via panjo kiu estas tre bona bonvoli tion, miaj karaj infanoj. Mi estas tiom feliĉa gardi vin apud mi kun tiu bonega panjo ke mi tutkore dankas ŝin pro esti dirinta jes.

BLD : Kaj mi, mia amiko, mi tutkore dankas vin pro paroli al mi pri tio. Estas ke mi tute ne pensis pri tio. Ni estos feliĉaj, Dio mia ! Ĉiuj kune, ĉiam !

Elfia kiu pretigis la vespermanĝon, venis tiel kiel Mutie partopreni en ilia ĝojo, kaj la infanoj saltis kaj kapriolis sen forgesi la vespermanĝon ĉar Paŭlo ekkriis : "Kaj la supo ? Mi tiom malsatas !

- Jen ! Tio estas ! diris Mutie kiu alportis ĝin.

Ili gaje altablĝis. Ĉiuj estis la plej feliĉaj homoj sur la tero. La generalo estis glorita ĝisĉiele, oni diris pri li nur bonon. Sinjorino Blidot eĉ trovis ke li estis tre bela viro, tio kio ekscitis ridadojn de la familio. La vespermanĝon finitan, la infanoj, malbone ripozintaj de sia laciga nokto petis reenlitiĝi. Sinjorino Blidot ne volis esti helpita de Elfia, ŝi anstataŭigis ŝin per Derigni ravinta varti siajn infanojn kaj vidi klopodi sinjorinon Blidot^{on}.

Mutie kaj Elfia iris vidi la generalon. Derigni kaj sinjorino Blidot kuniĝis al ili kiam la infanoj estis dormantaj. Oni lasis por varti ilin servistinon kiun oni dungis ekde la alveno de la generalo kaj kiun Elfia volis gardi kiam ŝi eksciis ke sinjorino Blidot forlasos ilin.

29 Konkludo, sed sen fino.

La dek aŭ dek du tagoj kiuj apartigis la edziĝpeton kaj la ceremonion rapide kaj gaje fluis. La geedziĝontoj malmulte forlasis la generalon kiun la gajeco kaj vikleco de sinjorino Blidot ĉiam amuzis. La geedziĝo okazis sen bruo aŭ festo. Du gevidvoj kiuj geedziĝas ne okazigas geedziĝfeston kiel junuloj. Oni tagmanĝis ĉe la generalo, kun la preposto kaj la notario. Posttagmeze, sinjorino Derigni ekloĝis ĉe la generalo kun la infanoj. Sinjoro kaj Sinjorino Mutie iĝis solaj mastroj de la Gardanĝelo. La generalo deziris ke la gastejo de la Dankema Generalo restu malfermita al ĉiuj militistaj vojaĝantoj kaj mem plezuris servi ilin kaj kaŝe ŝovis orajn monerojn en iliajn poŝojn. Li ankoraŭ vivadis gaja kaj feliĉa en Lumigni dum unu monato : la paca interkonsento devigis lin forlasi tiun dolĉan vivon kaj la uniformon kiu plaĉis al li... almenaŭ dum kelka tempo.

Necesis foriri. Laŭ iliaj konvencioj, Derigni akompanis lin, kunprenante sian edzinon kaj siajn infanojn, ĉiuj kontentegaj pro la vojaĝo kaj feliĉaj pro ne disiĝi. Sinjorino Blidot korligiĝis al sia edzo tiom kiom al la infanoj. Derigni surprize konsciis ke li amis sian duan edzinon kiel li amis Magdalenaⁿ, sia unua gajeco estis reveninta. La generalo trovis sin la plej feliĉa el la homoj. Antaŭ ol eliri Lumigni^{on}, li donis la domon kaj ĝiajn kromdomojn al sia edzineto, kiel li ankoraŭ nomis ŝin, la herbejojn, la ĉirkaŭajn terenojn al Derigni kiu tiel akiris personan proprajon je pli ol kvardek mil frankoj.

Mutie kaj Elfia taskis al si la mastradon kaj la gardon de la domo kaj de la terenoj de la Dankema Generalo dum la foresto de Derigni kaj de lia familio. La disigo de la du

fratinoj estis dolora, Elfia ploris, Mutie videble estis emociita. La generalo kisis Elfiaⁿ kun korelverŝado kaj diris redonante ŝin al Mutie : "Ĝis revido post unu jaro, miaj infanoj, miaj bonaj amikoj. Atendu min por la bapto de via unua infano, estas mi kiu estos la baptopatro. Adiaŭ, miaj infanoj, pensu pri la maljuna generalo ĉiam dankema".

La veturilo foriris, Mutie kunprenis sian edzinon kiu ploradis malpli amare ekde la promeso de la generalo.

ELF : Ĉu vi kredas, mia amiko, ke ili revenos post unu jaro, kiel promesis la generalo ?

MUT : Mi estas certa, mia Elfnjo. Li amas nin ĉiujn, li amas nur nin kaj li deziras nian feliĉon.

Mutie viŝis la okulojn de Elfia kaj elkondukis ŝin inspekte rondviziti la herbejojn kaj la terenojn de Derigni. Ili ordigis ĉion en la domo kiu restis fermita ĝis la reveno de ĝiaj proprietuloj.

Netaviŝtuko iĝis sufiĉe bona knabo kaj eliris el la Fratoj por dungigi kiel komizo en komerca domo.

La proceso Burniero finiĝis kun la mortkondamno de Burniero kaj de lia edzino, kaj kun la vivdaŭra laborpuno de la frato de Burniero. La edzino Burniero ne estis ekzekutita, ŝi estis internigita en frenezulejo, fariĝinte furiozfreneza sekve de la bato al la kapo kiun ŝi ricevis de Mutie. Burniero estis senkapigita kaj mortis elkraŝante malbenojn kontraŭ Mutie kaj la generalo.

Oni aŭdis de li kaj dum ĉi tiu proceso, ke li forkondukis la veturilon de la generalo por kredigi lian foriron; ke li veturis ĝis iu arbaro kie li frakasis kun sia frato per hako kaj poste bruligis ĝin, kaj ke ili nokte revenis al Lumigni sen esti viditaj de iu ajn.

La preposto plenumigis la laborojn kiujn determinis la generalo. La preĝejo de Lumigni fariĝis la plej beleta de la lando, kaj estis ofte vizitata de eminentaj vojaĝantoj kiuj

haltis ĉe la Gardanĝelo, sola bona gastejo de la vilaĝo.

Ni nenion diros pri la generalo nek pri liaj vojaĝakompanantoj, kies rakonton ni intencas daŭrigi en alian volumon. Ni kontentos nin konstati ke ilia vojaĝo estis gaja kaj feliĉa, kaj ke ili ĉiuj alvenis en bona stato en la lando de Gromilino, apud Smolensko, post esti preterpasintaj tra Petersburgo kaj Moskvo. La detaloj en la sekvan volumon.